

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 239 (319)

MELBURNO

January-February, 1987

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA NI INTERLIGU LA MANOJN POR JUBILEA KUNLABORO

La Jubilea Jaro longe atendata nun staras antaŭ ni: Esperanto fariĝis centjara. Ke ĝi plene maturiĝis, tio estas evidenta jam delonge. Ne plu oni povas nomi Esperanton interesa eksperimento; ne plu oni povas priskribi nian lingvon kiel ambician provon al internacia kompreniĝo. Hodiaŭ Esperanto jam pruvis sian taŭgecon en ĉiuj medioj, kaj estas nenio tro komplika nenio tro subtila — se entute lingve esprimebla — kio ne povus esti esprimata en la Internacia Lingvo. Kiel lingvo. Esperanto plene sukcesis.

Ankoraŭ ne plene sukcesa estas la disvastigo de tiu lingve sukcesa fenomeno. La granda plimulto de la homaro neniam aŭdis pri Esperanto. Inter tiuj, kiuj scias, kio ĝi estas, ekzistas multaj homoj, kiuj ne plene komprenas ĝian grandan kapablon aŭ dubas pri la asertoj kaj pretendoj de tiuj, kiuj konas ĝin pli bone. Necesas dum la Jubilea Jaro atingi tiujn homojn, kiuj nenion scias pri Esperanto, kaj konvinki ilin lerni la lingvon. Necesas atingi ankaŭ la skeptikulojn por forigi ilian skeptikecon. Necesas, entute, sukcesigi ne nur la lingvon sed ankaŭ la movadon por disvastigi tiun lingvon.

Okazoj tiel bonaj kiel la Jubileo ja venas malofte: necesas, ke ĉiu parolanto kaj uzanto de Esperanto streĉu sin ĝis maksimumo dum la Jubilea Jaro. Kion ni povas fari?

- Unue, ni povas instrui la lingvon, ekzemple per starigo de loka kurso, aŭ ni povas helpi aliajn tion fari.
- Due, ni povas verki artikolon aŭ artikolojn pri la lingvo kaj proponi ilin al loka aŭ nacia ĵurnalo aŭ gazeto.
- Trie, ni povas atentigi niajn amikojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj ĝiaj atingoj, kaj klopodi konvinki ilin esplori ĝin pli profunde.
- Kvare, ni povas kunlabori en alia agado, loka aŭ nacia, por informi la publikon pri Esperanto.
- Kvine, ni povas subteni la Esperanto-movadon per aĉeto de libroj, per partopreno en kongresoj kaj konferencoj, kaj per financaj kontribuadoj al lokaj, naciaj aŭ internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

Efika informado pri Esperanto postulas efikan informiĝon: ni devas mem koni nian lingvon kaj nian movadon. Necesas prezenti la faktojn, klare kaj sen troiĝo aŭ subtakso. Necesas zorge kaj saĝe esprimi la argumentojn por Esperanto. Do, la

Arthur Cocking, laŭ sia kutima, neimitebla, humura maniero, instruis 13 POSTKOMENCANTOJN, kiujn li, je la fino de la kurso, prezentis dum Distra Vespero.

Klason por PROGRESINTOJ instruis Ray Ross. La celo estis prepari studentojn, por ke ili povu sukcese partopreni ekzamenojn pri Elementa aŭ Supera Diploma de AEA. Per diktaĵo kaj tradukado studentoj alkitimigis al diversaj facetoj de la lingvo; ĉiuj progresis dum la dusemajna periodo kaj gajnis memfidon, speciale pri la parolo.

En la komenco estis 18 studentoj kaj, post kelkaj transiĝoj al aliaj grupoj, 14 restis ĝis la fino. Tre kontentiga klaso entute, kaj ĉiuj sukcesis, kiuj partoprenis ekzamenojn.

EKZAMENOJ:

Dum la Somerlernejo en Armidale **KATHLEEN MONTEFIORE** sukcesis en la Supera kun Honoro. Ankaŭ **BERILO LOH**, **KAY HOWE**, **RITA DUNBAR**, kaj **BETH AULSEBROOK** sukcesis en la parola parto de la Elementa, kaj **IRINA TIMONIN** en la parola parto de la Supera.

—RALPH HARRY.

LA INAŬGURO DE LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO

La Aŭstralia Esperanto-Asocio inaŭguris la Centjaran Jubileon de Esperanto per festkunveno en la Kolegio Duval de la Universitato de Nov-Anglio en Armidale, N.S.K.

Gustateme por la Inaŭguro alvenis el Melbourne la bela "Migranta Esperanto-Ekspozicio", sperte preparita de Gerald kaj Ruth Tuffman. La preskaŭ cent partoprenantoj de la Inaŭguro havis la oportunun inspekti la Ekspozicion antaŭ ol eniri la salonon, kie okazis la festkunveno. Tiu Ekspozicio nun iras tra tuta Aŭstralio dum 1987 kaj grupoj, kiuj deziras ricevi la Ekspozicion nepre kontakti A.E.A. ĉe P.O. Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

Prezidis la festkunvenon Profesoro Ronald Gates, A.O., iama estro de la Universitato kaj Prezidinto de la Aŭstralia Nacia Komisiono pri Unesko. Li eklernis Esperanton speciale por tiu aranĝo antaŭ nur kelkaj monatoj, sed jam bone komprenas kaj parolas la lingvon.

La Manifestacio komenciĝis per muzikaj kaj de Handel kaj Mozart, luditaj de talenta loka triopo (Peter Sanders, violono; Elizabeth McDonald, violonĉelo; Sue Metcalfe, piano). Post kanto de la Nacia Himno, Profesoro Gates malfermis oficiale la kunvenon. En bona Esperanto li diris, ke estas nor li granda honoro prezidi ĉi tiun inaŭguron de la Centjara Jubileo. Li esprimis "Bonvenon" al ĉiuj ĉeestantoj, kiuj alvenis en Armidale el ĉiuj ŝtatoj de Aŭstralio por kune festi la Centjaron de Esperanto.

Sekvis la Gastparolanto, S-ro Yosimi Umeda, Vic-Prezidanto de U.E.A., kies viziton al Aŭstralio subvencis la Aŭstralia Registraro, en la kadro de la Internacia Jaro de Paco kaj la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Li transdonis al la AEA-Prezidanto donacon de \$100 por la Jubilea Fonduso de AEA. (Vidu aliloke lian prelegon.)

Sekvis AEA-Prezidanto Ralph Harry, kiu parolis anglalingve por la ne-esperantistaj gastoj, pri la temo "Esperanto after its First Hundred Years — The Living International Language whose Time has come" (Ni esperas represi lian prelegon venontnumere).

Salutis nun ŝtataj reprezentantoj: Max Wearing (Suda Aŭstralio), Herbert Koppel (Viktorio), Marj Ellvard (Kamboro), Sylvia Burkitt (N.S.K.) kaj Ray Ross (Kvinslando). Oni ankaŭ laŭtlegis saluttelegramon de Rene Smeets (Perto).

Per kantado de "La Espero" finiĝis la Inaŭguro. Ĉiuj ĉeestantoj ĉeestis ceremonion en la ĝardeno, kiam S-ino E. Ridgway, kolegia dommastrino, plantis memorigan kverkon.

REKORDA LIBROVENDADO EN ARMIDALE

La AEA-Libroperanto deziras danki al la multaj personoj, kiuj ebligis la vendon de libroj por \$2,400 ĉe la Somerlernejo en Armidale. Tiu rekorda sukceso estis atingita per la dediĉa laborego de la helplibroperantino Joan Green, kiu sukcese varbis Evonne Arthur, kiu ankaŭ dediĉis ĉiun liberan momenton al la vendado de libroj.

Mi deziras ankaŭ danki al Jack Harvey (Perto) kaj Lilian Newman (Brisbano), kiuj disponigis al la lernejo necesan suplementan stokon el siaj kluboj, kaj aparte al Ray Ross, kiu multflanke helpis.

Pro la falinta valoro de la aŭstralia dolaro la kostoj al la libroservo preskaŭ

duobliĝis en unu jaro, tiel malfaciligante la aĉetadon de novaj libroj. Nun dank' al la sukcesego de la vendoj kay al la konsento de la komitato (gvidata de Ray), ĉi-foje ne akcepti kluban rabaton, ni nun troviĝas en stato, ke ni povas pli libere mendi novan stokon eksterlande.

Fine, mi deziras danki al la partoprenantoj, kiuj ebligis tian sukceson.

—TOM ELLIOTT.

MONATO

Internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN

ESPERANTO

Gazeto pri aktualaj aferoj kaj

kulturaj fenomenoj.

Aerpoŝte \$44, ŝipe \$35.

Mendu de:

Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,

Parramatta, NSW, 2150.

VERA PAYNE INSTRUOS EN USONO

AEA Vic-Prezidanto Vera Payne (Perto) instruos ĉe la Somer-Universitato en San Francisko de la 29-a de junio ĝis la 17-a de julio, 1987. Ŝi estos la unua virino-instruisto en tiuj kursoj la unua aŭstraliano. Aliaj instruistoj estos David K. Jordan, Universitato de Kalifornio, San Diego, kaj Profesoro Fabrizio Pennacchietti de la Universitato de Torino, Italio.

Detalajn informojn kaj aligilojn donos S-ino Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010, USA.

LETEROJ AL LA REDAKCIO

Mi gratulas vin por via konstanta produkto de bonkvalita revuo, kiu informas pri la diversaj agadoj vialande. Lastatempe montrigis multe da intereso pri Aŭstralio pro viaj filmoj kaj la jakto-konkursoj.

(Cathy Schulze, redaktoro de ELNA Newsletter, San Francisko.)

"LA ESPERO" PER KARILJONO

Nia himno "La Espero" estos ludata p'urfoje en 1987 per la granda kariljono de Kanbero.

Antaŭ 20 jaroj, dum kongreso de la Belea E-Asocio, Jo Haason, profesia kariljonisto, el la urbo Michelen, ludis sur la urba kariljono de Leuven nian

himon. Ankaŭ dum la Olimpiaj Ludoj en Munkeno Jo ludis la himnon, kiel gastkariljonisto, kaj tiel tre ĝojigis Esperantistojn inter la homamasoj en la grandega stadiono.

Rememorante tiujn spertojn, Ralph Harry proponis al la Kanbera kariljonisto, John Gordon, ke li ludu la himnon de tempo al tempo dum la centjara jubileo de Esperanto en 1987.

La granda kariljono de Kanbero, situata en moderna turo apud la Lago Burley Griffin, estis donaco de la Brita Registaro en 1963, okaze de la 50-a datreveno de la fondo de la urbo, en 1913. John Gordon estas samtempe kariljonisto por la Sidneja Universitato, kaj ludos "La Esperon" ankaŭ du tri-foje per tiu kariljono en 1987. —RALPH HARRY.



• **PERTO:** La ĝenerala kunveno okazis je 6-a nov., 1986. Prezidanto Shirley Gradussov raportis pri la klasoj, kiuj okazis semajne kaj ne du-semajne kiel en la pasinteco. Ŝi raportis plue pri ekspozicioj kaj piknikoj dum 1986. Sekretario Bill Clarke emfazis la bezonon de alloga propaganda materialo, preta por forsendi al tiuj, kiuj petas sciigojn pri la lingvo. Shirley Gradussov legis raporton de Vera Payne rilate ties klasoj kaj emfazis, ke tiuj klasoj estis sukcesaj.

Elektigis nova Estraro: Prezidanto: Shirley Gradussov; Vic-Prezidantoj: D-ro John Mills, Margaret Chandler; Sekretarioj: Rene Smeets, Vera Payne; Kasisto: Dulcie Sawkins; Informado: Len Eddington, David Poulson; Libroservo: John Harvey; Biblioteko: Hugh Malcolm.

Membrokotizo por 1987 estas \$20, por pensuloj \$10.

La **Zamenhofa Festo** okazis je 15/12/1986 kaj 65 personoj ĉeestis. Impresis teatraĵo prezentita de lernantoj de Vera Payne. La kulmino de la vespero estis la festparolado de S-ino Christine Venables, kiu traktis la vivon kaj batalon de D-ro Zamenhof.

Je la 26-a de decembro okazis **pikniko** en la hejmo de S-ino Pianta. Ĉeestis proks. 30 personoj, inter kiuj la ĉef-

gasto S-ro Yosimi Umeda (Tokio), vicprezidanto de UEA. Oni pasigis la tempon sen formalajoj, naĝis, manĝis, kantis kaj babilis. Antaŭ ol hejmeniri ni jam vidis filmon, faritan per videoaparato pri tiu pikniko.

Bedaŭrinde mankis unu el niaj plej malnovaj kaj plej estimataj anoj, D-ro Einihovici, kiu devis submeti sin al operacio. Feliĉe li jam bone resaniĝis kaj ni esperas revidi lin baldaŭ en nia rondo.

—RENE SMEETS.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de
Ĉina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$14,
2 jaroj \$24, 3 jaroj \$34.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:
Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
Parramatta, NSW, 2150.

• **ADELAJDO:** Nia Zamenhofa Festo okazis la 15-an de decembro en la ejo de la Kvakeroj kaj proks. 20 personoj ĉeestis. Bob Felby faris bonvenigan paroladeton, en kiu li dankis al Thea v. d. Boogaard pro ŝia gastama akcepto de niaj membroj en ŝia hejmo dum la pasinta jaro. Ni havis la plezuron saluti inter ni s-ron Kam Li, el Hobarto. Li venis kunportante sian gitaron kaj ni kantis multajn E-kantojn.

De la 28-a de decembro, 1986 ĝis la 10-a de januaro, 1987 okazis en "Hotelo Adelajdo" internacia ŝak-turniro en kiu partoprenis la familio Polgar el Budapeŝto. La tuta familio parolas Esperanton. Pri la 17-jara Zsuzsa Polgar ni raportis en "AE" en oktobro, 1986, p. 52, sed ankaŭ ŝiaj 10-kaj 12-jara fratinoj estas bonegaj ŝakludantoj. Ili ankaŭ partoprenos ŝakturnirojn en Melburno kaj Sidnejo.

—BOB FELBY.

• **MELBURNO:** La Zamenhof-Festo okazis la 13-an de decembro, 1986 en la halo de la skoltinoj. Tridek du esperantistoj kaj amikoj partoprenis. Bonvenaj vizitantoj estis Harold Gilbert kaj Ges-roj Tronerud, iamaj Melburnanoj, kiuj

nun loĝas en Kvinslando. F-ino Isabel Gale distris per "Stylophone" — muziko kaj ŝi gvidis membrojn de la Waverley-grupo per Kristnaskaj kantoj. Membroj de la Oakleigh-grupo prezentis diversajn erojn. Herbert Koppel deklamis poemojn kaj Jack Fallu donis la "Revuon 1986". La Festparoladon faris Ann Hearn. "Ni Fidu" estis la titolo de ŝia rakonto pri la ekzemplo de Zamenhof, per kiu ŝi kuragiĝis nin pri la estonteco de Esperanto.

Je la 27-a de decembro, 1986, alvenis en Melburno Yosimi Umeda. La esperantistoj de Melburno piknikis kun la gasto en la bestrezervejo en Healesville. Samvespere okazis amika vespero en la hejmo de Ges-roj Tumman, dum kiu S-ro Umeda alparolis la ĉeestantojn.

• **KANBERO:** La Zamenhof-Vespero okazis en la hejmo de Jack Walters, 13-a Dec. Partoprenis 28 personoj, inkuzive de infanoj.

Post naĝado kaj komuna manĝo apud la naĝejo sekvis la tradiciaj tributaj al D-ro Zamenhof:

- bonvenigo fare de Jack Walters kaj respondo de la Prezidanto,
- parto de la poemo "En Amara Horo", de Kalman Kalocsay, deklamita de Will Firth ("poeto sen popolo"),
- originala poemo "Unueco", legita de la aŭtoro, Petro Munibi,
- kantado "kun la Londona Esperanto-Klubo",
- parolado "Kion opinias Zamenhof pri la nunaj Esperantistoj?" (Ralph Harry),
- skeĉo "Ĉu la informo sufiĉis?" de Stefan MacGill (Marj Ellyard kaj Ralph Harry),
- ludo "Kunigu la pecojn de la poemo!", organizita de Marj Ellyard,
- "La Espero" (kiun ludos en 1987 la kariljono de Kanbero).

—RALPH HARRY.

• **MANLY:** Post la fina klaso en la Eduka Centro (18-11-1986), ni iris al la hejmo de Marjorie Duncan, kie ni adiaŭis nian amikon de San Francisco,

Martin Parlan, kaj festetis lian naskiĝtagon. Li forflugis la 22-an de novembro, sed espereble li revenos por partopreni la Pacifikan Kongreson en 1988.

Je 25-11-86 ni estis feliĉaj bonvenigi rondvojaĝantan Jack Hawks el Perto, kiu restis mallongan tempon kiel gasto de kelkaj Manlianoj.

La 7-an de decembro, 35 membroj kaj geamikoj ĉeestis la kutime ĝuidan Kristnaskfeston en la hejmo de ĉiam gastigema Marjorie Duncan. Post festlunĉo Arthur Cocking gvidis kantadon de kristnaskaj kantoj. Je la tria horo la membroj kunvenis por aferkunveno kaj diskutis diversajn arandojn por Zamenhof-Vespero kaj la venonta jaro.

—EUNICE GRAHAM.

• **BRISBANO:** La jarkunveno elektis la jenan Estraron por 1987: Prezidanto: Trevor Steele; Vic-Prez-oj: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Cath. Sullivan; Kasisto: Jack Carroll; Libroperanto: Lilian Newman; Biblioteko: Ruth Morrison, Annie Spencer; Komitatanoj: Merv Schramm, John Paroz, Peggy Ross, Gilbert Shonhan, Ted Duffy, Mina Sprok, Peter Keates.

Tridek anoj kaj amikoj ĉeestis la Zamenhof-Feston la 13-an de decembro. Plejparte estis neformala okazaĵo: La Prezidanto, Trevor Steele, proponis la toston aŭ la memoro de D-ro Zamenhof dum la vespermanĝo kaj poste ĉiuj tostis la gefianĉigon de Hadie Robinson kaj John MacLeod. Sekvis la distraĵo, kiam eta David Steele dufoje kantis. La kantgrupo prezentis 3 erojn; Decia kaj Gilbert Shonhan, per rond-dancoj grande kontribuis al la vespero. —RAY ROSS.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** Ĉe la unua kunveno en 1987 (24 Jan.) Joyce Turner, Kay Howe kaj Kath. Montefiore raportis ĝoje pri la ĵus multe ĝuita Somera Lernejo ĉe la Universitato de Armidale. Tie Kay gajnis la Elementan Diplomon, kaj Kath la Superan. Kaj ĉiuj gajnis novajn geamikojn.

—JOHN MOORE.

• **SCHOOL ESPERANTO CLASSES** at Gattin, Qld.: At the school of Our Lady of Good Counsel, Gattin, about a year ago, the whole class of Year 4 started learning Esperanto at school in normal hours; to continue up to and including

Year 8. The original class is already corresponding with children overseas.

Now Sister Cecelia reports: "Next year (1987) the Principal has asked me to take on Years 6 and 7 as well, so there will be nearly 100 pupils doing Esperanto, we hope." —JOHN MOORE.

• **SIDNEJO:** Fine de januaro vizitis min ĉe mia hejmo, la familio POLGAR, el Hungario. Ili venis al Aŭstralio por konkursi en ŝakludo, ĉefe la plej aĝa filino, Susan. La patro, patrino, kaj la tri filinoj, ĉiuj estas ŝertuloj pri ŝako. Susan fakte estas la supera virina ŝakludanto en la mondo.

Estis granda plezuro renkonti ilin. Ili havis nur mallongan tempon por viziti. Susan devis konkursi, tamen ili invitis min viziti ilin en Budapeŝto post la kongreso en Varsovio . . . eble, kiu scias?

—BETTY CLEMINSON.

La ZAMENHOFFESTO okazis je la 13-a de decembro en la Esperanto-Domo, kiam Manlianoj kaj Sidnejanaj kunvenis por festi tiun gravan eventon. Sylvia Burkitt faris la fest-paroladon. Sekvis legado de poemoj kaj prezentado de amuzaj teatraĵetoj de verkistino de la Manlia Klubo. Ni kantis sub gvidado de Marjorie Duncan, kaj Elsa Brandman muzikis per sia akordiono.

—MARGARET CHALDECOTT.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$2735
S-ino O. G. Wolff, Melbourne	50
S-ino Margaret Sanders, Melbourne	5
F-ino Hertha Mueller, Sydney	150
D-ro J. Somogyi, Port Hedland	200
		<hr/>
		\$3155

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1987

Herbert Koppel, Melburno	\$10
Fav Koppel, Melburno	10
Melbourne Esperanto Societo	10
S-ino Margaret Sanders	5
S-ino O. G. Wolff, Melbourne	20
S-ino I. Toth, Melbourne	10
		<hr/>
		\$65

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

34. ISABEL GALE

"The Gentle Warrior"

Isabel's appearance belies her years. She's still the same weight as 30 years ago and attributes this to the fact that she has never owned a car. More likely though, it's a matter of genes, for her father reached the age of 104 and on his 100th birthday played a solo on his tenor horn.

Not that life has been easy: Isabel nursed her father for 21 years and spent her working lifetime waging war against the problems of the underprivileged — the lonely, "misfits", migrants, servicemen, the sad and the sinful. Her forte has been the organisation of friendship clubs — in addition to her other duties as a Salvation Army Officer for 35 years. In 1972 she was awarded the M.B.E. for community service. She was also interested in youth work. For some time she edited "The Young (Salvationist) Soldier" and even included a small section about Esperanto. She taught Sunday School for 55 years. A record? Successfully, she tries to be young in heart and never says, "Now, in my day . . ."

Music has always played a significant part in her worship and in her leisure. A good singing voice and an inborn, inbred "feeling" for music have meant that she has always been a choir member and/or conductor. The Scots Glen Singers (women's group), of which she is still a member, is much in demand in the community. Their repertoire ranges from Bacherach to Bach.

In Esperanto gatherings including our Congresses, she can always be relied on to help in the "Di-servo" and/or to entertain with a small singing group or by playing the "stylophone". The "Carols by Candlelight" group, of which she was a committee member for 11 years, has been so popular that on one occasion 2,000 people attended. Of course in the Salvation Army "Meetings" she has always been a "Songster" as well as singing in duets, quartets and other small groups.

To help her in her chosen work, Isabel took Adult Education classes in sociology and enjoyed them immensely, but nowadays considers that "learning how" must give place to "doing".

Esperanto came under Isabel's notice when she was 11. Her teacher had said, "In 10 years' time Esperanto will be taught in schools". When told, her father commented, "That's the International Language". He knew, for he was of the generation which welcomed Esperanto. Dad's positive attitude contributed to Isabel's early interest in the language but, alas, that interest received no further stimulation for 8 years. Then, she bought a little old manual on Esperanto. A shared treasure, especially its comments on the ideals of the language!

An article about Esperanto had appeared in an international Salvation Army youth publication. It was written by Londoner Harry Smith with whom Isabel corresponded for some time but, despite Harry's encouragement, this early attempt to learn Esperanto proved abortive. Too many demands on time and energy. But Isabel retained her appreciation of Esperantism and when approaching retirement she renewed her learning in earnest. She noticed an advertisement about classes in her suburb and joined up. Finally — well, almost — she did the B.A. course in Ivan Maddern's Independent University, "majoring" in Esperanto. The good Brigadier even met up with Harry Smith when she attended an Esperanto Church Service in London in 1978.

Last year Isabel went to Israel. She wrote for the "War Cry" a series of articles on interesting people that she had met — including some Esperantists. A delight to read

Nowadays, as a happy Christian, leader, enthusiast and communicator, Isabel conducts 3 over-50s groups, works with a Companions' Club among neighbours and one for married couples. She represents the Salvation Army on the Women's Inter-Church Committee of which she is Past President. Also, she conducts a teenage Bible Study Group, a Sunday School and an Esperanto class.

Our Brigadier fully believes that "the Lord loveth a cheerful giver". She has given and is now grateful for what she is receiving in return.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 240 (320)

MELBURNO

Marto, 1987

LA MEMORŜILDO

APUD LA KVERKO EN KOLEGIO DUVAL (ARMIDALE)
SURHAVOS LA JENAN TEKSTON

TO COMMEMORATE
THE CENTENARY
OF ESPERANTO,
THE INTERNATIONAL LANGUAGE,
THIS TREE WAS PLANTED
BY MRS. E. RIDGWAY,
PRINCIPAL OF DUVAL COLLEGE
9 JANUARY 1987

POR MEMORIGI
LA CENTJARAN JUBILEON
DE ESPERANTO,
LA INTERNACIA LINGVO,
ĈI TIU KVERKO ESTIS PLANTITA
DE S-INO E. RIDGWAY,
ESTRO DE KOLEGIO DUVAL
LA 9-AN DE JANUARO 1987



AEA SOMERLERNEJO 1987

Kanto de la Lernantoj

*

En Somerlernejo, kun Arturo kaj Ray-o
Ni strebas por lerni la lingvon de pac',
Kaj ni studas dumtage, pervorte kaj age,
Kantante, mimante kun instruisto.
Kun instruisto, kun instruisto,
Kantante, mimante kun instruisto!

Ni estas bonsanaj kaj samideanaj
Ĉar ĉiun matenon ni naĝas en rond',
Sed ni studas dumtage, pervorte kaj age
Kantante, mimante en Esperanto
En Esperanto, en Esperanto
Kantante, mimante en Esperanto!

Ni manĝas komune, nin banas plensune,
Vespere ni distras nin kun plena ĝoj',
Ĉar ni listojn kompilas kaj ne krokodilas
Kantante, ludante kun Manjo-Manjo
Manjo kaj Manjo, Manjo kaj Manjo,
Kantante, ludante kun Manjo-Manjo.

Ni librojn aĉetas kaj ĉiam ridetas
 Ĉar Joan siajn varojn proponas kun
 ĉarm'
 Kaj plenigas ni pakojn, valizojn kaj
 sakojn
 Kontente pagante — Dolar' dolaro!
 Dolar' dolaro, dolar' dolaro,
 Kontente pagante — Dolar' dolaro!

Nun ni stilas Trevore kaj tradukas
 fervore

Kaj venis la fino de nia feri'.
 Sed ni verde eltenos kaj iam revenos
 Kantante, studante en Esperanto
 En Esperanto, en Esperanto
 Kantante, studante en ESPERANTO!

—R. L. HARRY.

MONATO

Internacia magazino sendependa
 UNIKA REVUO EN
 ESPERANTO

Gazeto pri aktualaj aferoj kaj
 kulturaj fenomenoj.

Aerpoŝte \$44, ŝipe \$35.

Mendu de:

Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
 Parramatta, NSW, 2150.

LA NOV-ZELANDA KONGRESO

La 52-a kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio okazis en Masterton, en bela varma somera vetero, de la 8-a ĝis la 13-a de januaro. Partoprenis preskaŭ 40 personoj.

La kongreson oficiale malfermis la vicurbestro de Masterton. Li paroladis precipe pri la avantaĝoj de la urbo Masterton kiel kongresloko. Post lia parolado la Prezidanto de NZEA (Donald Rogers) parolis pri la nescio kaj ksenofobio, kontraŭ kiuj ni devas batali por informi la publikon pri Esperanto. Li citis kritikojn el ĵurnala artikolo kaj refutis ilin sinsekve. Tiam li parolis pri la lastatempa progreso de Esperanto en kaj ekster la movado, citante la gazeton "Monato", la Internacian Akademion de la Scienco en San Marino, la kiberneti-

kajn konferencojn, kiuj uzas Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj, kaj la provuzon de Esperanto kiel pontolingvo en permaŝina tradukado.

Tri eksterlandaj geesperantistoj, gesroj Helga kaj Johano Rapley (Britio) kaj s-ro Josefo Delpino (Usono), salutis la malferman kunvenon kaj ili kontribuis multon al la programo dum la resto de la kongreso.

Dum la unuaj du tagoj okazis la afer- kaj komitatkunsidoj de la asocio. La kongreso elektis la jenan estraron: Prezidanto Donald Rogers, Vic-prezidanto Ralph Dearnley, Gen. Sekretario Ross, Moore, Kasisto Mary Richardson, Help-Sekretario David Ryan kaj Estraranoj Fred Adams kaj Gwenda Sutton.

Sekvis tri tagoj da klasoj je kvin diversaj niveloj, ekde veraj komencantoj ĝis tre spertaj jam diplomitoj.

Kongresanoj ekskursis aŭtobuse al la centro por sovaĝaj vivaĵoj ĉe Monto Bruce, kelkajn kilometrojn for de Masterton. Tie kongresanoj spektis vidbendon pri la centro, kiun povas spekti ĉiuj vizitantoj al la centro, sed ĉifoje ĉi havis esperantlingvan komentaron faritan de tri el niaj membroj. Post tio ili ĉirkaŭmarŝis kaj rigardadis la sovaĝajn birdojn, bestojn kaj plantojn kaj piknikis subĉiele. Poste ili ankaŭ vizitis farmmuzeon.

Dum la vesperoj diversaj membroj prezentis teatraĵetojn kaj paroladojn. Kelkaj raportis pri sia vizito al Ĉinio nor la Universala Kongreso. David Dewar paroladis pri la historio de la telefono dum la lastaj cent jaroj.

La 53-a nov-zelanda kongreso okazos en Auckland de la 12-a ĝis la 16-a de januaro. Eksterlandaj Esperantistoj estos kiel ĉiam tre bonvenaj. Por informo skribu al **Nov-Zelanda Esperanto-Asocio P.O. Box 330, Wellington, N.Z.**

—DONALD ROGERS.

—ooOoo—

NE PLU AKTUALA

La 73-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis de la 9-a ĝis la 10-a de aŭgusto, 1986 en Oosaka, sed nur en februaro, 1987 nia japana korespondanto, Bun'ichi Ishizaki, povis aerpoŝte sendi al ni la Oficialan Protokolon pri

tiu grava kongreso, kiu aperis en la februara (1987) eldono de "Revuo Orienta".

Ĉu niaj japanaj amikoj ne povus estonte publikigi tiajn gravajn raportojn post nur unu aŭ du monatoj? Ni ja vivas en jarcento de raketoj kaj tuja interkontinenta komunikado!

EN ORIENTAJ LANDOJ

En Smalininkai (Litovio, SSR) okazis la 23-a Balta Esperantista Tendaro, en kiu partoprenis preskaŭ 500 personoj el ĉirkaŭ 120 urboj de 12 respublikoj de USSR. Tie renkontiĝis la plej juna esperantisto, 2½-jara kaj la plej aĝa partoprenanto, 85-jara.

Estis enhavoriĉa programo. Dum la somera universitato, gvidata de moskvano S. Kuznecov, estis prezentitaj proks. 50 prelegoj. Funkciis paroligaj kaj perfektigaj kursoj kaj seminario por klubestroj, en kiu partoprenis 40 klubaj prezidantoj el Sovetunio. Ĉiuvespere okazis artaj programoj. Pri la tendaro la vastan publikon informadis la respublikaj radio kaj gazetaro.

—ooOoo—

JARDEKO POR PACO

La Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj invitis aliajn organizaĵojn proponi programojn en "Jardeko por Paco".

Nia Prezidanto, post konsultado kun aliaj estraranoj kaj membroj, indikis, ke la konstanta programo de AEA estas: "Lernu komunan lingvon por Paco — Esperanton". Tiu programo, li klarigis, stimulas senperan komunikadon inter popoloj surbaze de egaleco, uzante la internacian lingvon, Esperanton, kaj celas ĝian akcepton de UN, ekzemple por traktatoj. —R.L.H.

INVITOJ AL ANGLUJO 1987

La Londona E-Klubo aranĝos Jubilean Programon Jun. 29-Jul. 5. Detaloj de S-ro W. G. Atkinson, 13 Avon Close, Worcester Park, Surrey, England, KT4 7AQ.

D-ro Marjorie Boulton, kun William Auld, Gaston Waringhien kaj aliaj, prezentos Jubilean Programon "Cent Jaroj de Esperanta Literaturo", Aug. 8-14 en Barlaston. Detaloj de The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., England, ST12 9DG.

Mary Davies invitas al "Esperanto-Hotelo", dum iu ajn periodo. Detaloj de S-ino Mary Davies, Esperanto-Hotelo, 2 Oxcliffe Road, Heysham, Morecambe, Lancs., England, LA3 1PS.

Kelkaj Manly-anoj esperas ĉeesti ĉi tiujn aranĝojn kaj volonte partoprenos kun aliaj gesamideanoj el Aŭstralio. Interesatoj bonvolu fari la proprajn aranĝojn kaj laŭplaĉe kontaktu Marjorie Duncan, 119 Bower St., Manly, 2095 (Tel.: 977 5163) ĝis meze de junio, kaj poste ĉe 27 Richmond Park Ave., Bournemouth, England, B48 9DL (Tel.: 51 4395), ĝis la komenco de aŭgusto.

La Jubilea Festo de la Esperanto-Asocio de Britujo okazos en la semajnfino de la 3-a ĝis la 5-a de julio, 1987, en la teatro "Bloomsbury", Gordon St., London, WC1. Por detaloj sendu afrankitan, adresitan koverton al Marjorie Duncan, 119 Bower St., Manly, 2095, aŭ telefonu (02) 977 5163.

En la Zoologia Ĝardeno:

—Paĉjo, ĉu ankaŭ azenoj edziĝas?
—Nur azenoj, mia filo!

Ĉu ni vere progresas?

En la septembra libera kunveno ni zorgoplene diskutis pri la ne kontentiga partopreno en la kunvenoj. Ekestis eĉ pensoj pri likvido de la Esperanto-Societo Z. aŭ almenaŭ ne plu aranĝi monatajn kunvenojn. Sekve de tio, s-ro D.S. prezentis proponon, ke la grupo Z. paŭzadu por kelka tempo. Aliflanke ni aprobis partopreni en regionaj kunvenoj. La malpli ol dek kunvizitantoj persistas ja nur pro fideleco, kaj tio ne sufiĉas por pluvivo de nia grupo. Oni povas ankaŭ aldoni, ke la vesperaj elspezoj (luprezo de kunvenejoj) estas tre malbonaj rilatale al la nombro de partoprenantoj.

La diskutado pri la stato de la societo elvokis viglan partoprenon. Unufanke parto de la ĉeestintoj same opiniis kun la prezidanto, ke diskutado de la problemo ege necesas, dum alia parto taksis eĉ la penson pri ŝanĝoj katastrofo. La estraro ĝojus transdoni la oficon kaj la gvidadon al novaj, se eble pli junaj membroj. Tio bedaŭrinde restos utopio, ĉar ja mankas la junuloj. Oni ne povas forieri la opinion, ke la junuloj kulpas pro la malĝojiga situacio. Estu kiel ajn, la rezulto de la diskutado estas, ke oni —

ANTAŬ 55 Jaroj

S-ro Percy Holmes, kiu nun vivas en Seymour, Viktorio, sendis al ni la sekvantan elĉerpajon el "La Suda Kruco" de aprilo 1932: "GEEDZIĜA SOLENO: Vespere, la 5-an de marto, 1932, s-ro Percy Holmes, prezidanto de la Melburna E-Societo, edziĝis kun f-ino Margaret Bryden. La soleno okazis en la Unitariana Preĝejo, East Melbourne, kaj inter la gastoj troviĝis kelke da Esperantistoj. La geedziĝon solenis pastro William Bottomley, kiu mem estas entuziasma esperantisto kaj antaŭ ne longe starigis grupon inter la parofanoj. Felician vivon al la geedzoj!"

S-ro Holmes kredas, ke li estas la plej aĝa, vivanta eksprezidanto de la Melburna E-Societo. Bedaŭrinde, laŭ raporto, Percv estas nun preskaŭ blinda kaj s-ino Holmes estas nun en la hospitalo de Seymour kaj probable ne revenos hejmen.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de
Ĉina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$14,
2 jaroj \$24, 3 jaroj \$34.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:
Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
Parramatta, NSW, 2150.



• **PERTO:** La kunvenoj komenciĝis merkredon, la 11-an de februaro ĉe la "Nedlands College of Advanced Education". Ni havas tri klasojn, por komencantoj, progresantoj kaj altgraduloj.

Ni havos Esperanto-semajnfinojn de la 6-a ĝis 8-a de marto, ĉe la "Ern Halliday Centre", Hilarys, inkluzive klasojn, loĝadon, mangojn kaj ludojn. Detalojn de S-ino S. Gradussov, 47 Waverley Rd., Coolbellup, WA, 6163 aŭ telefonu al (09) 337 2063. —LEN EDDINGTON.

• **MELBURNO:** La Melburna E-Societo komencis la jaron (2-an feb.) per prelego de Marcel Leereveld. Ĉi-foje nia mondvojaĝanto gvidis nin al Singapuro, sendependa insula ŝtato. Liaj diapozitivaj montris, i.a., grandajn kontrastojn, jen modernajn nubskrapulojn, jen malnovajn, modestajn dometojn.

Je la 16-a de februaro ni povis bonvenigi s-inon Janina Lyczewska el Varsovio, kiu montris diapozitivajn pri la urbo de la ĉi-jara Universala Kongreso.

La jara ĉefkunveno okazis semajnon poste. Pro la neĉesto de la prezidanto (s-ro H. Beechey), la vic-prezidanto (Gerald Tumman) prezidis. La sekretario (Herbert Koppel) raportis, ke en 1986 la societo havis 30 membrojn kaj 6 lernantojn, entute do 36, ses pli ol en 1985. La kasisto (Errol Chick) raportis, ke la jaro finiĝis per pluso de \$94.57. Tamen, la kunveno akceptis proponon de la kasisto, altigi la membrotiton de \$16 al \$18 kaj de \$8 al \$9 por pensiuloj.

Oni elektis la jenan novan estraron: Prezidanto: Ken Rolls, Vic-Prez: Gera'd Tumman; Sekretario: Herbert Koppel, 2-a Sekretario: Geoff Cutter; Kasisto: Errol Chick; Bibliotekisto: Fay Koppel; Kaskontrol'isto: Gerald Tumman.

La E-Grupo en **OAKLEIGH** elektis la jenan novan estraron: Prez: S. Kanacki; Vic-Prez: Jack Fallu; Sekretario: Margaret Warr; Kasisto: Ivy Fallu.

• **KANBERO:** La jarkunveno de K.E.K. okazis la 4-an de februaro en la "Migrant Resource Centre". Partoprenis 11 membroj.

Oni elektis la jenajn oficistojn: Prezidanto: Ralph Harry; Vic-Prezidanto: Patti Anson; Sekretario: Marj Ellyard; Kasisto/Libro-peranto: Peter Munibi; Publickomisiito: Jack Walters; Helpsekretario (Bulteno kaj programoj): Robin Bailey.

Oni decidis organizi klasojn por postkomencantoj kaj progresintoj ĉiun merkredon je la 17.30-a, kun aliaj klasoj aŭ studgrupoj je 19.30-a, kun posta societa programo de paroladoj kaj ludoj.

En la distra vespero partoprenis aldone tri studentoj el la Aŭstralia

Nacia Universitato, kiuj lernis per "Teach Yourself Esperanto" kaj jam bone progresis. La Prezidanto prezentis filmon pri la Zamenhof-Vespero 1986, kaj oni ludis kelkajn lingvoludojn.

—R.L.H.

• **GUNNEDAH, NSK:** Pro spacomanko ni povas nur hodiaŭ raporti pri la Zamenhof-Kunveno, kiu okazis dimanĉe, la 14-an de dec., 1986, en la hejmo de ges-roj Leah. Ĉeestis 14 personoj, inkluzive de 2 novaj lernantoj el Tamworth. Post subĉiela vespermango en la ĝardeno de ges-roj Leah, Vera Ramsay, Aileen Corp kaj Bill Leah kantis Esperanto-kantojn. S-ro Leah prelegis pri Zamenhof kaj pri la venonta Somerlernejo en Armidale. Liaj instigaj vortoj rezultis, ke ses membroj de la malgranda grupo fakte partoprenis la Somerlernejon.

• **ORANGE, NSK:** En la kadro de la 'Plenaĝula Vespera Lernejo' mi komencis instrui Esperanton al 10 komencantoj. Partoprenas ankaŭ 10 anoj la Esperanto-klason por progresantoj. Bonega novaĵo, ĉu ne?

Mi kontaktis la redaktoron de nia ĉiutaga gazeto kaj li afable konsentis aperigi po unu artikoleon ĉiusemajne. Ĝis nun, du artikoloj aperis: "La idealo de internacia lingvo" kaj "La vivo kaj laboro de D-ro Zamenhof". Aliaj temoj estos "La sukceso de Esperanto", "Pri la Internaciaj Kongresoj", "La Strukturo de Esperanto", "Kiel profitos Esperanto al la lernantoj en la lernejoj", "La Zamenhofa Tradicio en Aŭstralio", "Aŭstralia kontribuo al Esperanta Literaturo".

Kiel kontribuon al la Jubilea Fonduso, la Orange Esperanto-Klubo sendas ĉekon de \$100 kaj esperas, ke la Jubilea Fonduso atingos sian celon de \$20,000.

—MAGDALENA ROZSA.

• **MANLY:** La 2-an de januaro 16 "Manly" — membroj kunvenis en la hejmo de Marjorie Duncan por bonvenigi Yosimi Umeda el Tokio. Li restis ĝis la 5-a ĉe Marjorie kaj dum tiu tempo kelkaj Manly-anoj havis la plezuron gastigi lin.

Dimanĉon, la 4-an, 17 anoj vizitis la Baha'ian Templon en Mona Vale, kie

Kevin Smith legis el la Esperanta traduko de la Korano. Poste ili piknikis en la ĉirkaŭaj ĝardenoj kun kelkaj Baha'ianoj.

Je la 28-a de januaro, post la reveno de multaj membroj, kiuj ĉeestis la tre sukcesan Somerlernejon en Armidale, okazis la Jarkunveno. Estis elektitaj: Prezidanto: Robby Robertson; Vic-Prezidantoj: Eunice Graham kaj Arthur Cocking; Sekretario: Betty Cleminson; Kasisto: Tony Scriven; Libro-Aganto: Helen Stone; Arangoj de Programoj: Marjorie Duncan.

—EUNICE GRAHAM.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** Ĝis sep anoj daŭre kunvenadas ĉiusabate en ĉies domo laŭvice, por praktiki la arton de konversacio kaj trinki teon kaj ludi la Esperantlingvan "Scrabble" — vortkunmetado uzante literkartojn. Nia ano Kay Howe nun estas "Onklino Esperantista" kaj regule korespondas kun du Polaj knabinoj.

—JOHN MOORE.

• **KORESPONDKURSA SERVO:** En 1986 ni vendis: De kurso unu: 23; de kurso du: 14, de kurso tri: 7; de kurso kvar: 5, kaj de kurso 5: 3; entute 52 kursojn en 1986. Mi dankas al ĉiuj, kiuj helpis pri kursgvidado, reklamado, kaj precipe disvastigo de "Your Esperanto Bulletin" al publikaj bibliotekoj, kie neesperantistoj povas ĝin legi.

—JOHN MOORE.

• **GATTON, QLD:** Dear Mr. Harry, once again, thank you so much for the Scholarship for the Summer School, which I thoroughly enjoyed. I gained much experience there which I am now using in teaching 3 classes of Esperanto — Grade V — 20 pupils, Grade VI — 23 and Grade VII — 26. Mrs. Madeline O'Dea takes Grade IV — 23 pupils.

I teach also some of the parents of the pupils and other interested persons on Tuesdays for one hour. For their first lesson, eight people came. Some more people are coming for the next lesson, I believe.

—SISTER CECELIA O'SULLIVAN.

Maljunulino eliras el la kabineto de la kuracisto kaj malkontente murmuris:

—Nun oni kuracas ne tiel, kiel antaŭe!

—Kaj kia estas la diferenco, avinjo?

—Iam la kuracisto esploris min dum horo kaj skribis tri minutojn kaj nun ĉio estas inverse.

—(Bulg. E-isto)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

35. CHRIS. DEAN

He certainly knows our North-West Frontier.

Christopher James William Dean has plenty of letters in front of his name. He also has a few after, for he has passed the Supera Exam and is a Life Member of the Esperanto League.

Though born in London and Cornish from the age of 14, he has been an Australian citizen since 1976. In Cornwall and in Yorkshire he became interested in "dialects" e.g. "Arter middlin' lahd?" — a useful basis for even more foreign languages later on.

Right from boyhood he had been language minded. His Dad had a friend who was an Esperantist, so Chris, his brother and his sister Nancie (the late Nancie Durham, well known world-wide to Esperantists) were sent off one evening per week to learn Esperanto. His teacher's wife, the son and the dog, Ino, regularly used Esperanto in the home, so Chris was introduced to Esperanto as a practical everyday language. When other members of the family were learning French and German, Chris turned to Spanish and corresponded with his pen-friend Santiago until the Spanish Civil War ended it all. Of course, Chris had kept in touch with his beloved "Step by Step" in Esperanto and still remembers most of its jokes and rhymes by heart.

In his youth, Chris was variously farmworker, gardener and gardener-chauffeur to a titled lady. He was also active in the Primitive Methodist Church as organist-choirmaster and local preacher. At a party, he was introduced to Dorothy, a young lady with a soft Yorkshire accent. What a surprise when, some time later, whilst he was hand delivering for his employer, the door was opened by the same young lady looking trim and charming in her maid's outfit!

A correspondence course in Engineering which he was then doing offered no prospects in Falmouth so he decided to move to the Midlands where D.'s family

— coal miners — thought he could get suitable work. Alas, union pressures made sure that "outsiders" were kept outside, so he was glad to accept a "pot boiler" farm job. A 600-year-old Dovecote cottage went with the job, so he married Dorothy and settled down.

About that time, the Nasties invaded Poland and Britain felt a sudden demand for fighters and for food. Chris nearly became a fighter. He was accepted for pilot training but was soon discharged because of ear trouble, so he spent the next 4 years as a food producer. His special job was draining marshlands and later in the war was in charge of P.O.W.s. So, he learned quite a lot of German and Italian.

There were several relatives in Australia, including Jack Hawks his Esperantist cousin (N.B. NOT brother-in-law as stated in No. 32 Sorry!) so in 1949, Chris, Dolly and their daughter came out to sunny Perth. He, of course, linked up with the Esperanto Movement and, after 10 years, was elected to office, being several times President or Secretary of the Esperanto League of Western Australia, especially during the '60s.

He was a road grader, and/or tractor driver for some years. Then Chris became a leading hand in a tractor factory staffed largely by migrants, so his knowledge of French, German and Esperanto came in very handy. From his home in the "bush", he travelled for his work through the trackless scrub into the almost empty North and West. Later on in life, he and Dolly often went North for fun, for they both had learned to love the "wide open spaces".

Dolly was not at first interested in Esperanto — until a study group was held in her home. Not to be left out, she soon joined in and became a proficient, enthusiastic and most, most useful member — in fact, a Life Member. She often

entertained overseas and interstate visitors. With admirable courage, she cheerfully regaled them with home-cooked meals, which, during her last few years, she couldn't eat herself, because of agonising throat cancer. When she succumbed, her death was a grievous, tragic loss not only to Chris and the family

but well beyond throughout Esperantujo.

Up to, and including, very recently, Chris has been secretary, libroperanto and Editor-printer of the "Nigra Cigno". Always active, always genially hospitable. If you ever go to Perth, give him a ring. He and Jack Hawks will brighten up your visit. —ARTHUR COCKING.

RECENZOJ

Dictionnaire Etymologique des Noms Géographiques (Etimologia Vortaro de Geografiaj Nomoj), far A. Cherpillod (Masson, Paris, 1986).

Mi ja povas imagi, ke miaj legantoj diros al si: Kial recenzi en Esperanto-gazeto libron verkitan en la franca? Nu, estas bona kialo, kiel ni vidos.

Antaŭ pli ol unu jaro, mi ricevis de la aŭtoro leteron skribitan en perfekta Esperanto petantan helpon por trovi la etimon de kelkaj loknomoj en Aŭstralio. Mi povis fari tion, kaj poste ricevis pluajn petojn helpi pri aliaj loknomoj en la pacifika kaj sudorientazia regionoj. Denove mi sukcesis plenumi tiujn petojn (almenaŭ en la plej multaj kazoj) — ĉiam en Esperanto — ofte mem petante helpon de kolegoj kaj akademianoj al mi konataj aŭ rekomenditaj.

Fine S-ro Cherpillod kompletigis sian verkon kaj eldonigis ĝin. Ĝi estas granda libro, de 543 paĝoj, kaj plena de interesajoj.

Esperanto estas plurfoje menciita — plue, eĉ sur la kovrilo, inter 138 diverslingvaj vortoj esprimantaj la koncepton de "fluanta akvo" troviĝas la Esperanta vorto "rivero" — kaj en la danklisto sur p. xiv la aŭtoro listigas tiujn, kiuj sendis al li valorajn informojn, kaj atentigas, ke en la plej multaj kazoj tiujn informintojn li povis kontakti nur pere de la internacia lingvo Esperanto. Inter la nomoj troviĝas la bone konataj William Auld, Hajpin Li kaj John Wells.

La verkinto citas ĉiujn fremdajn vortojn en la **originalaj alfabetoj** aŭ **skrib-sistemoj**, sed indikas la prononcon post ĉiu per latinaj literoj. Ĝi estas do verko de mirinda erudicio, kaj por tiuj, kiujn interesas la etimologio kaj la lingvoscienco, kaj kiuj scipovas legi la francan, ĉi tiu vortaro estas havinda trezoro kaj vera minejo da fascinaĵ informoj.

Ĉu, ekzemple, vi iam demandis al vi, de kie venas la vorto "Usono"? Laŭ S-ro Cherpillod (p. 165), ĝi devenas de la fiaskinta vorto (proponita en 1905 en la verkisto Samuel Butler) **Usona**, derivita de la komencliteroj de United States Of North America (Unuigintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko), kaj kiu nun postvivis nur en Esperanto! Simile, **Uncle Sam** (Onklo Samĉjo), populara nomo por figuro reprezentanta Usonon, onidire devenas de la mallongigo **U.S.Am.** (Unuigintaj Ŝtatoj de Ameriko).

La prezo ne estas indikita, sed la adreso de la eldonejo Masson estas 120, Bd Saint-Germain, 75280 Paris.

—ALAN TOWSEY.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$3155
(inkludis S-inon Herta Koppel \$15, preterlasita lastfoje)	
S-ro Hugh Malcolm, Perto	17
Orange Esperanto-Klubo	100
	<hr/>
	\$3272

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 241 (321)

MELBURNO

Aprilo-Majo, 1987

NI STOPU LA TRUOJN

Ĉiutage niaj amaskomunikiloj nin informas pri problemoj en Afriko — pri malsato, militoj, malpluvo, subpremado — katastrofoj naturaj kaj homkreitaj; sed neniu mencias lingvo-problemojn. Supozeble ne ekzistas tie tiaj problemoj, aŭ, se jes, ili estas ne gravaj, kaj tiuj, kiuj ne vidas utila la enkondukon de Esperanto en Afrikon pravas. Kial, do, Esperanto malrapide sed persiste disvastiĝas en tiu kontinento?

Malgraŭ la negativa sinteno de la pesimistoj, afrikanoj evidente deziras lerni kaj uzi Esperanton. Estas vere, ke la afrikaj landoj havas gravajn problemojn solvendajn, sed ne vere, kiel asertis Bernard Golden en lastatempa numero de 'Sennaciulo', ke en tiuj landoj ne estas tempo por 'luksaĵoj' kiel Esperanto. Eble Bernard Golden kaj aliaj, kiuj samopinias kun li, ne scias pri la psikologio de ludoj. Estas konate en nia civilizacio, ke en krizaj periodoj, kiam perturbas sociaj problemoj, kiel senlaboreco kaj longdaŭraj strikoj, ekzemple, la plej prosperaj entreprenoj estas la distraj, precipe tiuj, kiuj iel aktivigas la homojn, instigas al riskado per tento de gajno: vetado je bestkonkursoj, je kartludoj, je ludmaŝinoj, k.s. Homoj bezonas pli ol materiaĵojn por senti sin vivaj. Kiam mankas la bazaj materiaj bezonaĵoj, kaj ne ekzistas ebleco ilin akiri, la homoj trovas rimedojn sin distri, ĉu por forgesi siajn problemojn, ĉu por valorigi al si la vivon.

Kiu ajn estas la motivo ĉe afrikanoj, certe estas, ke ne mankas tiukontinente intereso pri Esperanto. Verŝajne la plimulto de la interesitoj estas relative bonstataj, sed ne ĉiuj. Certe kelkaj atendas, ke per Esperanto ili ricevos materiajn avantaĝojn, kaj tio ne plaĉas al la idealistoj, por kiuj 'profito' ankoraŭ estas tabua vorto rilate al Esperanto (vidu artikolon 'Spertoj kun afrikaj korespondantoj', H. de E. 1984-04-25). Sed kial ne? Kondiĉe, ke ili serioze studas kaj kun respekto uzas la internacian lingvon, ĉiuj rajtas ĝin utiligi ankaŭ por pli-altigi sian materialan vivnivelon. Al la plimulto el ni Esperanto pli ofte portas financan malgajnon ol gajnon, sed pro tio, ke tiu plimulto jam estas sufiĉe bonhavaj; al la malpli bonhavaj, ĝi rajtas porti eĉ materiajn riĉaĵojn.

Dank' al nederlanda esperantistino, grupo da junaj futbalentuziasmuloj en Afriko havas veran futbalon per kiuj praktiki sian ŝatatan sporton; dank' al svedaj esperantistoj, grupo da afrikaj studentoj posedas bonan skrib-materialon por siaj Esperanto-kursoj; dank' al itala esperantisto, afrika komercisto senpage vojaĝis al Italio por tie reprezenti sian landon ĉe ekspozicio pri fiŝkaptado. Eblecoj diversaj jam ekzistas kaj uzatas por la materia profito de esperantistoj en Afriko.

Ne mankas, tamen, afrikanoj, kiuj lernas kaj disvastigas Esperanton pro la samaj idealoj, kiuj motivas multajn el ni ne-afrikanoj. Lastatempe mi ricevis leteron en senerara Esperanto, de afrikano en Centrafrika Respubliko. Li estas 30 jara instruisto de la germana lingvo, kiu eklernis Esperanton okaze de esplora feriado pri lingvistiko, kiun li pasigis en Saarbrücken, Sarlando, FRG, en la somero de 1985. Reveninte hejmen li pliprofundigis sian lingvokonon ĝis li sentis sin preta publike akktivigi por la disvastigo de Esperanto. Li frontas, kompreneble, al ne nur pedagogiaj problemoj — mankas materialo, mankas instruistoj (ĉar li estis unuopa, sola esperantisto sialunde kiam li skribis al mi) — sed ankaŭ financaj problemoj, tamen, petante de mi pedagogian helpon, li sendis kun sia letero, internacian respond-kuponon: ĝentileco, kiun malofte memoras la pli bonstataj esperantistoj de la unua mondo!

Laŭ 'BULTĖno por GEMElantoj kaj KOREspondantoj', kiun produktas s-ro Hans Bakker, filo, respondeculo pri la UEA-agado en Afriko: 'Abundas lernantoj en Afriko. Sed ne sufiĉe abundas esperantistoj ekster Afriko, kiuj deziras ĝemele ligiĝi kun ili. Estas multaj korespondantoj, sed nura leterinterŝanĝado ne satigas la intereson de la afrikanoj'. Ĉu al komunik-soifaj triamonduloj oni respondu: 'Vi havas sufiĉajn problemojn en via lando. Zorgu pri solvo de ili. Esperanto estas por vi luksaĵo; ne malŝparu vian tempon lernante ĝin.'? Ĉu ne ankaŭ anoj de la evoluantaj landoj rajtas vivi kaj komuniki per 'la dua lingvo por la homaro' kun alinaciuloj, eĉ alikontinentuloj? Por kio Zamenhof elpensis la internacian lingvon? Ĉu ne por ebligi al ĉiuj en la mondo kiel eble plej rekte kaj facile komuniki kun ĉiuj aliaj en la mondo? Ĉu la tielnomata tria mondo ne estas parto de tiu mondo, por kies plibonigo li elspezis tiom de sia energio?

La pesimistoj domaĝas la energion elspezitan por 'pleniĝi truitan barelon', kio, laŭ ili, estas Afriko rilate al Esperanto. Sed Esperanto, kiel viva lingvo, rajtas enradikiĝi ankaŭ en afrika grundo. Se ĝi ne tuj abunde prosperas, ĝi tamen vivos, kaj laŭsezone dissemiĝos kaj plukreskos ĝis indigenigo.

En ĉi tiu jaro, kiam Esperanto jubileas, ni ĉiuj povas kontribui al tiu enradikiĝo de Esperanto en afrika grundo. Volonte Hans Bakker, Kastelenstraat 231-II, 1082 EG Amsterdam, Nederlando, sendas informojn al petantoj pri ĝemeligo kun afrikaj grupoj kaj urboj. Petu de li ankaŭ ekzempleron de lia bulteno — ne forgesu la internacian respondkuponon, ĉar la fonto 'Fondaĵo Azio-Afriko' ne estas neelĉerpebla. Precipe al la virinoj de la Movado mi alvokas. Ĝis nun elstare mankas en la listo de aktivaj afrikaj esperantistoj la nomoj de virinoj. Ni kuraĝigu ankaŭ ilin sperti la avantaĝojn, ne nepre materiajn, de Esperanto.

Ni ŝtopu la truojn de la plenigota barelo.

—AUDREY CHILDS-MEE.



SVISA RADIO INTERNACIA JUBILEO

La centjarigo de Esperanto signifas samtempan jubileon por Svisa Radio Internacia: ĝia Esperanto-fako fariĝis kvardekjara. Krome tio estas persona jubileo de D-ro Arthur Baur, ĉar li por ĝi laboris ĉiusemajne dum kvardek jaroj.

En la vintro 1946/47 Prof. Edmond Privat estis farinta la unuajn kurtondajn elsendojn pri Esperanto el Svislando, dum la 30-a de julio 1947 markas la komencon de la kunlaborado de D-ro Arthur Baur. Tiam li ricevis la taskon ĉiutage raporti pri la 31-a Universala Kongreso de Esperanto okazanta en Bern. La favora reago de la aŭskultantoj al tiuj programoj igis la tiaman direktoron, Paul Borsinger, konfidi al D-ro Baur regulajn kronikojn pri "svisaj institucioj kaj eventoj". D-ro Baur resumis sian laboron en la libro "La Fenomeno Svislando", kiun li aperigis okaze de la 64-a UK 1979 en Lucerno.

En la sama kongreso la tiama gimnaziano Andy Kuenzli aktivis kaj nun kiel studento li estas la rlej juna kunlaboranto de la Esperanto-Fako. Aliflanke, Claude Gacond, direktoro de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, transprenis post la morto de Edmond Privat en 1962 ties taskojn.

(Eŭropa tempo): 18.30

(Tutmonde: UTC 22.15/01.15/03.15/07.45/10.45/13.15/15.15/17.15)

Se vi sukcesos "kanti" la stacion, nepre skribu vian opinion al Swiss Broadcasting Corporation, CH-3000 Berne 15, Switzerland.

• **ZAMENHOF-FAMILIANOJ**, kiel gastoj, partoprenos en la Universala Kongreso en Varsovio: U.E.A. estas en kontakto kun pluraj membroj de la Zamenhofa familio, por inviti ilin al la 72-a UK. Jam respondis pozitive D-ro Ing. Ludoviko Zaleski-Zamenhof, nepo de L. L. Zamenhof, mem esperantisto kaj dumviva membro de UEA. D-ro Zaleski-Zamenhof, kiu loĝas en Francio, intertempe mem havas nepojn de filino, kiu loĝas en Usono.

UEA estas ankaŭ en kontakto kun la posteuloj de Felikso Zamehof (nepino en Francio, bofilino en Britio, nepo en Usono) kaj de Hendriko (frato de LLZ), kies filo loĝas en Usono.

Ĝis la 20-a de februaro la aliĝnombro atingis jam 3800 el 47 landoj. La plej multaj kongresanoj registritaj en la Centra Oficejo venas el Pollando (1091), Francio (164), Japanio (141), Svedio (132), Nederlando (129), Jugoslavio (118), FR Germanio (108), Finnlando (96), Usono (83) kaj Britio (82).

Aŭstraliaj Esperantistoj, kiuj deziras partopreni, nepre kontaktu la aŭstralian ĉef-delegiton, S-inon Sylvia Burkitt, 20 Grandview Street, Parramatta, 2150 (Tel.: (02) 634 1748) Ĝis nun 17 aŭstralianoj registris sin ĉe ŝi.

NOVAĴOJ EL NOV-ZELANDO

La 1988-a Nov-Zelanda Kongreso okazos en Auckland de la 12-a ĝis la 17-a de januaro. Ni sukcesis rezervi kiel kongresejon "Fowey Lodge", bela arudmara loko, kie la restado estos tre plaĉa. Ni esperas havi la okazon bonvenigi samideanojn el Aŭstralio.

Kvar membroj de la Auckland-Societo vizitis Ĉinion por la U.K. en Pekino. Ellen Limburn, Rita Aagaard, D-ro Paul Friedman kun filino Amy. Ĉiuj faris ekskursojn tra la lando kaj la vojaĝo faris fortan impreson kaj pri la lando, kaj pri ĝia popolo kaj la fervoro de la tieaj esperantistoj.

D-ro Paul Friedman, Usonano kaj Baha-iano deĵoris dum 1986 ĉe la Auckland-hospitalo kaj li, kune kun edzino,

filino kaj fileto, regule ĉeestis la ĉiusemajnajn kunvenojn kaj multe kontribuis al societaj aferoj.

Feliĉiga afero estis la alveno de Helga kaj Johano Rapley por loĝi en Auckland post trijara deĵoro en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ili estas spertaj esperantistoj, bone konataj tra la Esperanto-mondo. Ili ne prokrastis membriĝi al la Auckland-Societo kaj al la "Forumo" (antaŭe la Internacilingva Societo) kaj ni estas certaj, ke tio promesas vigligon de la agado ĉi tie.

Menciinde estas, ke denove niaj patronoj estas Damo Catherine Tizard, urbestro de Auckland kaj Richard Prebble, parlamentano kaj Ministro; ankaŭ nia ĉiujara Libro-Vespero bone sukcesis kun vendoj, kiuj superis \$300.

—RITA AAGAARD.



• **PERTO:** Post finiĝo de la klaso ĉe Mt. Lawley Kolegio en 1986, la klasanoj kunvenas en la domo de Vera Payne, ĉiun merkredon matene, por "ne-krokodila" sesio, kun la celo plibonigi la parolkapablon kaj pliatigi la konon de la Esperanto-literaturo.

Merkredvespere klasoj daŭras en la CAE en Nedlands. Shirley Gradusov instruas 7 komencantojn, dum la altgrada klaso uzas diversajn membrojn kiel klasestrojn. Vera Payne foriros el Perto la 24-an de junio por instrui Esperanton ĉe la Universitato de San Francisko.

Eric Hewitt, kiu suferis apopleksion en aŭtobuso dum revenvojaĝo de Sidnejo, pliboniĝis. Piknikoj okazos en majo kaj junio.

—LEN EDDINGTON.

• **MELBURNO:** Nia mondvojaĝanto Marcelo Leereveld, 2-an de marto, gvidis nin al Birmo, unika budhisma lando malmulte konata en la ekstera mondo.

Je 16-a de marto S-ino Fay Koppel dediĉis sian literaturan prelegon al Len Newell. Ŝi skizis lian kontribuon al la Esperanto-literaturo kaj montris liajn verkojn, inkluzive la ĵus aperintan libron "Kolektitaj Poemoj" (Vidu recenzon aliloke).

Aliaj literaturan prelegon faris Fay Koppel je 27-a de aprilo, kiam ŝi prelegis pri Kolomano Kalocsay. Ŝi montris multajn librojn verkitaĵn de tiu literatura

giganto, sendube la plej granda, kiun Esperantujo ĝis nun posedis.

La grupo en **WAVERLEY** festis la dekan datrevenon de sia fondiĝo per speciala kunveno je 26-a de februaro. Pola esperantistino, Janina Lyczewska, montris diapozitivojn kaj prelegis pri Po.lando.

• **ARMIDALE, NSK:** Sekve de invito de Profesoro Ronald Gates, grupo de kvar lernantoj starigis por komuna lernado de Esperanto. La grupo jam havis 3 kunvenojn kaj intencas kunveni ĉiun duan semajnon.

La komponisto Cecil Hill, de la Muzika Fakto de la Universitato de Nov-Anglio, sendis al A.E.A. la specialan aranĝon de "La Espero", kiun li preparis por la triopo (piano, violono, violonĉelo), kiu ludis dum la Inaŭgura Konferenco. S-ro Hill donis permeson al la Asocio uzi la muzikon laŭ sia bontrovo.

• **MANLY:** La 1-an de februaro Kevin Smith gvidis la Biblian Rondon en la hejmo de Irina Timonin. Je la 3-a, en la hejmo de Marjorie Duncan, 12 anoj bonvenigis du vizitantojn el San Francisko, Wanda Wolska kaj Gigi Harabagi, kiu parolis pri Andreo Cseh, kiun ŝi persone konis en Rumanio.

La 10-an de februaro okazis Societa Vespero en la hejmo de Les Scott, kie 7 membroj denove bonvenigis Gigi kaj Les montris sian video-bendon pri la kongreso en Pekino.

La unua trimestro en 1987 komenĉigis en la Vespera Lernejo la 17-an de februaro kun nova kurso por komencantoj kaj du por altgraduloj. Post la lecionoj diversaj eroj kaj paroladoj estas aranĝitaj por la altgraduloj. Je la 30-a de marto Robby Robertson faris interesan paroladon "Internaciaj Lingvoj", kaj la 24-an kaj 31-an Irina Timonin entuziasme parolis pri sia lastatempa vizito al Taŭlando.

Arthur Cocking gvidis la martan Biblian Rondon en sia hejmo.

Bonvena vizitanto dum februaro kaj marto estis Beth Baxter el Londono, kiun havis la plezuron gastigi kelkaj Manly-anoj. —EUNICE GRAHAM.

• **SIDNEJO:** Je 15-a de januaro ni aranĝis specialan vesperon por bonvenigi S-ron Yosimi Umeda al la Esperanto-Domo. Liaj gastigantoj, ges-roj Hart, montris al li la belan valon ĉe la rivero Hunter. Kvankam la kunveno

estis meze de la semajno kaj en la feria periodo, ni sukcesis arigi multajn anojn.

La Jarkunveno okazis je la 9-a de februaro. Elektigis: Prezidanto: Tom Elliott! Vicprezidantoj: V. Guelting and B. Currie; Kasisto: J. Harwood; Sekretariino: M. Chaldecott; Instruantoj: S. Burkitt, T. Elliott, B. Currie.

Sylvia Burkitt, 16/2, montris diapozitivojn pri la "enterigitaj soldatoj" en Xian, Ĉinio. Ne estas permesate foti per propra kamero, do la kvalito de la diapozitivoj estis iomete malbrilaj.

2-an de marto: S-ino Chaldecott renkontis en Ĉinio junan japanan viron, kiu verkis la instrusistemon "Panoramo", kaj ŝi provis instrui la grupon per tiu sistemo. Bedaŭre, la instruoj sciis tiom kiom la instruanto sciis kaj ni decidis, ke la sistemo estus pli bona en sia hejmlando ol ĉe ni.

La 23-an de marto, Tom Elliott prezentis per 2 televidiloj rememorojn pri multaj kunvenoj: Zamenhoffestoj, kongresoj ktp. Estis interese serĉi sian propran viz aĝon kaj vidi anojn de aliaj grupoj. —M. CHALDECOTT.

• **BRISBANO:** La kutimaj klasoj je 4 niveloj daŭras ĉiun lundon kaj kontentiga aspekto estas klaso por entuziasmaj komencantoj. La kantgrupo aktivas pri eroj por la venonta konferenco de la Federacio. Katalogado de la biblioteko estas preskaŭ kompleta post laboro sub la gvido de Ruth Morrison. Gaye Phillips kaj Kay Anderson pretigas specialan kantlibron rilate al la Pacifika Regiono. Inaŭgura kunveno de la L.K.K. okazis la 14-an de marto por prepari detalojn rilate al la kongreso en 1988.

Trevor Steele alparolis grupon 'Rotor-act' kaj Ray Ross parolis al grupo 'SWAP' (Vendistoj Klarcelaj); sekvis artikolo pri Esperanto en du lokaj gazetoj. La "veturanta ekspozicio" revenis al Brisbano post vizito al Too-woomba kaj en aprilo pluveturis al Sidnejo. —RAY ROSS.

EL LA FEDERACIOJ

• **KVINSLANDO:** La unua konferenco en 1987 okazis en Gatton. La semajnfino 4/5-an de aprilo. Ĉirkaŭ 40 anoj/vizitantoj ĉeestis dum la semajnfino, 32 partoprenis la kunvenon kaj vespermanĝon. Anoj el la klaso de Fratino Cecelia en Gatton partoprenis la d'stran vesperon. Loĝejo estis la komforta "Motelo Gatton"; kunvenejo, distrejo

estis la apuda Halo "Sankta Albano", kie ankaŭ ĉiuj ege ĝuis posttagmezan teon/kafon kaj vespermanĝon.

Dum la ĝenerala kunveno raportis pri klubaferoj la jenaj: Brisbane Tom O'Grady; Toowoomba Jean Lehane; Kaprikorna Grupo Joyce Turner; St. Lucia Decia Shonhan; Gatton Jim Dimo kaj Fratino Cecelia; Ormarbordo Kevin O'Brian; Skolta Ligo Jennifer Dimo.

La 2-a Konferenco 1987 okazos en Redcliffe en Motelo-Highway, Clontarf, 10/11-an de oktobro. Intertempe la jarpikniko okazos ĉe Digo Wivenhoe, 14-an de junio. La kasista raporto montris kontentigan bilancon.

Dum la distra vespero kontribuis la jenaj: Jim kaj Jennifer Dimo (per akordiono), kantgrupo el Gatton; Annie Spencer muzikis kaj kantis; Jean Lehane deklamis poemon; Decia Shonhan ŝercojn, Kay Anderson kaj Gaye Phillips duetis; Peggy Ross muzikis, Tom O'Grady rakontis, la Brisbane Kantgrupo kantis. Eta Magan (Gatton) respondis en Esperanto al kelkaj demandoj kaj poste kantis kun eta kunulino.

Dimanĉmatene anoj veturis al Laidley, apuda urbeto kaj vizitis la Pioniran Vilaĝon, "Das Neumann Haus" (Informejo en Historia Domo konstruita en 1893). Laidley estas tre interesa urbeto kun ĉirkaŭaj kotonkampoj, dum Gatton estas la Terpoma Ĉefurbo de Aŭstralio. Vizitantoj al la Kongreso en 1988 trapasos Gatton survoje al Toowoomba dum tuttaga ekskurso. —RAY ROSS.



• ANZAKTAGO EN KANBERO

Denove en Jubilea Jaro la semajnfino de Anzaktago estis la okazo de vizito al Kanbero de 10 Esperantistoj el la sidneja regiono. Ĉi tiun jaron Magdalena kaj Paul Rozsa el Orange ankaŭ partoprenis, kune kun 15 Kanberanoj kaj unu vizitanto el Eŭropo.

Posttagmeze la 25-an de Aprilo la Prezidanto de K.E.K. akceptis la vizitantojn en sia "esperanta" ĝardeno, kaj Doroteo Harry provizis temanĝon. Post bonvenigo de Ralph kaj respondo de Robi Robertson oni rigardis kelkajn trezorojn de la biblioteko de AEA, kiuj estos en la ekspozicio en la Aŭstralia Nacia Biblioteko en Oktobro. Inter ili estis originala letero de Zamenhof al Generalo Sebert, donacita de Herbert Koppel. Oni vidis ankaŭ la manuskripton de la Aŭstralia Antologio, korespond on kun la kariljonisto de Kanbero-Universitato-de-Sidnejo kaj aliajn jubileajn projektojn.

Vespere en la Rimedcentro por Migrintoj, Griffith Centre, okazis distra vespero. Stephen McKenny kaj Michael Dunn prezentis skeĉon: "La Papagon" kun senkulpigoj al Monty Python. Betty Cleminson, Robi Robertson, Will Firth kaj Ralph Harry legis elĉerpaĵojn el la teatraĵoj: "La Ununura Tago de la Jaro" de Alan Seymour, dramo pri Anzaktago. Post ludo "Vendado de la Centjara Jubileo" sekvis diskutado pri plua celebrado de la Jubileo kaj vespermanĝo.

La 26-an, matene, la sidnejanoj kaj oranĝanoj vizitis la novan konstruaĵon de Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj, kie estas instalata la biblioteko de A.E.A.

• **VIKTORIO:** Je la 7-a de februaro, la plej varmega tago de post 2 jaroj, okazis ekskurso al Geelong, kie ges-roj O'Brien kaj Hall atendis la Melburnanojn. Post tagmanĝo en "Hotelo Hotham" la 17 partoprenantoj vizitis Alden Lodge en Grovedale por admirii belegan privatan ĝardenon. La ekskurso finiĝis per posttagmeza teo en la hejmo de ges-roj Hall, kie ni tranĉis kaj tute formangiis specialan kukon memore al la 10-a datreveno de la fondiĝo de la E-klubeto de Geelong.

La Ĝenerala Kunveno de la Federacio okazis je 13-a de februaro. Dek membroj ĉeestis kaj elektis la jenan estraron: Prez. Jack Fallu; Vic-Prez. Gerald Tumman kaj John Coogan; Sekretario: Margaret Young; Kasisto: Eva Trainor; Redaktoro: H. Koppel; Publikaj Rilatoj: G. Tumman.

La Federacio festis la centjariĝon de Esperanto per kunveno en la bela halo de la Savarmeo en Malvern, kiam 35 esperantistoj kaj amikoj kunvenis. Post kanto de la aŭstralia himno en Esperanto kaj pianludado de S-ino M. Sanders, la ĉefparolantoj estis Jack Fallu, Gerald Tumman kaj Herbert Koppel. Dum luksa posttagmeza teo, S-ino Ivy Fallu parolis danke kaj laŭde pri la laboro de multaj esperantistoj, kiuj dum jardekoj dediĉis sin al la progreso de Esperanto. Ni aldonu: Neniu meritas dankon kaj laŭdon pli ol Ivy kaj Jack Fallu.

Surprizo je la piknika lunĉo apud la lago, sur la Duoninsulo de Nigra Monto, estis la alveno de Hans Sonne, la dana "minstrel", kiu vojaĝas tra la mondo per motorbiciklo. Guita kaj inspira programo finiĝis per lego de "Aŭtuno" de Rejna de Jong.

—R.L.H.

RECENZOJ

POEZIO FORGESITA . . . KAJ PORETERNE MEMOROTA

Kolektitaj Poemoj de L. N. M. Newell. Editoris (kaj kompostis!) Edwin de Kock. Eldonis Esperantaj Kajeroj, Manĉestro, 1987. 80 Paĝoj, fortike broŝuritaj. Mendebila de la AEA libroservo. Prezo brita, £3.60.

20 originalaj Esperantaj poemoj, sur apenaŭ 41 paĝoj. Enkonduko, biografio, laŭdoj, utila registro de la originalaj presoriginoj (kvankam kelkaj el ĉi tiuj poemoj neniam antaŭe aperis presite), manpleno da anglalingvaj poemoj, inter kiuj iuj poste Esperantigitaj de Newell mem.

Kiel recenzi Ŝekspiron? Aŭ T. S. Eliot? Aŭ Francis Webb? De Kock komentas, ke per siaj 29 poemoj Newell donacis al la Esperanta literaturo poezion pli abundan ol eble ĉiu ajn alia poeto. Jes, centoj da homoj aperigis roemojn en Esperanto. Kiom aperigis poezion?

Ĉu nur 58-jarulo povas kompreni:

Mi tro maljune ecas. En kor-stagno.
En ĝriza kvazaŭvivo mi aŭtunas.
Sed la skarlato, flavo, luma nigro,
Eksplosa blank' en mi ankoraŭ junas.

La 29 poemoj venas de juna 25-jarulo ĝis 63-jarulo. Ĉu mi mem nur cedas al mia aĝo, trovante la lastajn poemojn en la kolekto eterna donaco al la homa spirito? Aŭ ĉu Newell konstante kreskis spirite? Pri tio, ĉiu havos sendube propran opinion. Sed mi aŭdacas aŭguri, ke kiam post kvincent jaroj aperos la Antologio de Klasika Esperanta Literaturo, kelkaj el ĉi tiuj poemoj enestos.

Ne ĉiuj. Mi vidas progreson ne nur spiritan sed poetan inter la unuaj verkoj kaj la lastaj. Por mi, la majstro-poemo Araneaĵo (p.26; 1960) el kiu mi ĵus citis, komencas serion da poemoj, kiuj trafas la internon de la homa animo pli ol ĉiuj antaŭaj. Sed, ien subjektiva takso mia. Vi eble taksos alie.

Du komentojn pli: mi trovas la anglajn poeziaĵojn parte banalaj, parte nein-

spiritaĵ. Eble denove subjektiva takso mia.

Sed, mia dua komento, la Esperantouzo de Newell estas elstare brila. Eble li regas Esperanton rivale kiel Webb la anglan. En Esperanto li trovis esprimkapablon ne koncepteban en la angla lingvo por li. Kaj mi menciui, ke de Kock proze uzas Esperanton egale brile. Klasika uzado ĝi ne estas. Genia ĝi ja estas; speciale por Newell, kiu konstruis versojn, kiuj aspektas, ja estas, naturaj, tamen genie subtilaj — celo de T. S. Eliot en siaj dramoj, eble efektive igita.

Kvazaŭ PS: Niaj du multlaŭdindaj samideanoj Fay kaj Herbert Koppel multe helpis en la preparado de la manuskripto de ĉi tiu libro. Du aŭstraliaj esperantistoj do helpis eternigi la verkon de . . . esperantista aŭstraliano.

—DONALD BROADRIEB.

1986 — SATIRAJ ANALOJ de ROLO (Daŭrigo)

En Aglolando oni ankaŭ havis problemojn en 1986. Antaŭ kelkaj jaroj iu Prezidento, Niksono, havis problemojn pri la Akvopordo, kaj ĉar li ne povis, same kiel Georgo Vaŝintono, ne paroli mensogon, li devis emeritiĝi. En 1986 la Reganto de Aglolando havis problemojn rilate la plumbistojn kaj tubistojn de la Blanka Domo. Li mem ne rimarkis la odoraĉon el la norda alo, sed kelkaj kongresanoj flaris raton. Evidentiĝis, ke la Agentoj de la Centra aŭ Meza Inteligento inventis novan ludon. Oni movadis pecojn ne laŭ serpentoj kaj ŝtuparoj sed de unu lando al alia. Oni movis armilojn al unu lando. De tie oni movis ilin al dua lando, kiu pagis al sennombraj kontoj en tria lando, kiun oni nombr Torriĉa Bankujo. Fine oni movis la monon el Eŭreko al la kontraŭa parto en la Nigra Raguo.

En Anĝelolando la ĉefministro havis pli bonan jaron. Ŝi vendis preskaŭ la tutan heredaĵon de la lando, gardante nur la kronajn juvelojn. La nigran bastonon kaj la ŝtatan klabon de la Parlamento. Ŝi konstante rifuzis respondi al demandoj pri ŝiaj spionoj, kaj la antaŭaj oficistoj de MOIKVINA ĉiuj elmigris al fora insulo Tanzmanio, kie ili verkis siajn memuarojn. La Ŝtatestro helpis

deturni la atenton de la popolo per brila edziĝfesto de sia filo Anĉjo al neortodoksa knabino, Fernjo. Manjo ankaŭ profitis el la misfortuno de la Prezidanto de la Opozicio, laborista aŭtoro kaj arkpafisto, kiu malavare sed naive donacis valoran ferian vojaĝon al nekonata knabino, kiu verkis la plej bonan leteron en konkurso. La ĉefo de la Opozicio, S-ro Kinokoko ankaŭ helpis al la Registaro, maldank' al sia kuniklino la Ruĝa Eminentulo per la propono rezigni al anatomaj armiloj. Sed Manjo ricevis helpon ankaŭ en sia klopodado pliproksimiĝi al la ursanoj. Antaŭ nelonge la rajton eldoni la Lontanajn Tempojn gajnis fosisto el Ostratio, nun ŝtatano de Aglio, murdokoko alinome Ruperto la Urseto. Li ankaŭ aspiris aĉeti Heroldon! En 1986, kontraŭ ĉiu precedento, Ruperto invitis la ursanojn verki leterojn al la Redaktoro de la Tempo. Iu majorgeneralo de la Ruĝa Armeo, Rair (rarulo) Simonjan (petrofilo) el la Ministrejo de Defendado, verkis la unuan leteron. Li priskribis la krinolinan sistemon de defendado kontraŭ la radioj de Lasso, aŭ laseroj. Li ankaŭ klarigis la principojn de malinklinigado, kaj ekvilibro. Tiel la kapitalista gazetaro faris sian modestan kontribuon

en la Jaro de Paco de U.N., aŭ kiel ciniko ĝin nomis "La Jaro de Milito kaj Paco". (Daŭrigota)

Fonduso Ken Linton

Dank'al donaco de 11 ekzempleroj de "Sur la Bordo" fare de la Kanbera Esperanto-Klubo, mi sendis la libron kaj nekrologon de Ken Linton al la restantaj landaj asocioj, aliĝintaj al UEA.

Do la Fonduso atingis sian celon, memorigi Esperantistojn ĉie en la mondo pri la vivo kaj laboro de nia kara Ken.

Mi dankas denove al ĉiuj, kiuj donacis monon aŭ alian helpon por efektiviĝi la Fonduson.

Kvankam ni povas nun deklari la taskon de la Fonduso plenumita, tamen mi esperas, ke membroj daŭre aĉetos ekzemplerojn de "Sur la Bordo" (kaj ankaŭ de "Kanaka el Kananam") por donaco al siaj lokaj bibliotekoj kaj por siaj propraj libroj.

—RALPH HARRY.

—Mi ne povas elpensi kion aĉeti por la naskiĝtago de mia edzino.

—Kial vi ne demandas ŝin?

—Ho ne! Tiom da mono mi ne havas. (Bulg. E-isto)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

36. MARJORIE ELLYARD

Strong and Motherly.

It is not surprising that Marj. is motherly. She is, after all, the mother of six, 2 sets of twins and 2 singles. Much strength was needed to cope with 5 sons and a daughter and to help train them in the disciplines they needed to become successful academics. (One is David Ellyard M.Sc., author and weatherman; another is Dr. Peter, an up-and-coming force in the South Aust. Esperanto Movement.)

Her Dad was a telegraphist and Mum a teacher, so "home" was often moved — to Brisbane, Bundaberg, Newcastle, where Marj. received her early schooling, and to Dubbo where she became dux of the High School.

A Teacher's College Scholarship enabled her to begin a Uni. Science course. She did well in Chemistry but felt an incompatibility with Physics and Maths, so she spent her 2nd year training to be a Primary School teacher. Her great love, hockey, which had developed during inter-High School visits, was now stronger than ever and she was selected to compete with Adelaide.

At College she met Sam and, in due course, married him. Sam was very involved with amateur acting, so at times Marj. felt like a drama widow. However, the marriage was a happy one and most certainly was fruitful. He became a teacher of migrants, a Headmaster of Primary, and finally Headmaster of High Schools. She became — and remained for 18 years — a "housewife and mother".

When Marj. was first a qualified teacher just after leaving College, she, like many another at the time, had been unemployed. Then she received a part-time appointment to Coraki, 25 miles from home. Bus fare plus board nearly equalled salary. Later came a permanent appointment. When she married, she was debarred, by the Married Women Teachers Act, from teaching.

Marjorie occupied her time in the country with tennis, Red Cross and acting — often alongside Sam.

At long last, the lawful impediment was repealed and Marjorie again became a teacher — as Sam's assistant. When Sam became Head of a school with 21 assistants, his wife was appointed to an Infants' School and continued teaching in the country, then in Sydney and finally in Canberra, where she became a teacher of the deaf.

In 1966, with their "children" now scattered from Antarctica to U.S.A., Sam and Marjorie took their first long trip. What a boon Esperanto would have been on that 8-month tour!

Marjorie had encountered Esperanto during her first year of teaching. She had read a magazine article by Reg. Banham, had obtained a dictionary and Newell's "Concise Course" and had joined A.E.A. With hot enthusiasm, she whizzed through the grammar in a few days and read the "Southern Cross" which, alas, was then singing its swansong. Now, with nothing to read, not knowing where to get books, knowing nothing about overseas correspondents and having never even seen an Esperantist, she let her enthusiasm cool down to a nearly dead ember. But the glow was still there! Straight after the overseas trip, Marjorie was determined to recommence Esperanto — so determined that she drove 20 miles to Manly School to "link up". Alas again! It was vacation. Alas — for the third time — when she and Sam moved to Canberra that Club was not functioning. Noel Gamble, however, provided her with many copies of "El Popola Cinio" and that, she is convinced, is how she learned Esperanto.

About this time, a week-end workshop was held in Redfern. She and Sam attended. (Guess who was their teacher!) Marj. learned that Esperantists are real, live, talking people. The ember was fanned into a flame which still burns brightly.

Then followed Congresses in Launceston, Bulgaria, Antwerp, Sydney and Adelaide. In Adelaide, she was persuaded to become Secretary and Sam Treasurer of A.E.A.

Their triumph came when they helped organise the very successful Canberra Congress. For Sam, it was his last, for he died of a heart attack doing the job he loved. For Marjorie, it was by no means the last. She is still Secretary of A.E.A. and a very keen member, entertainer, teacher cum organiser of the Armidale Summer School.

Her belief in the ideals of Esperantism shows through in her friendly infectious smile. Talk to her. If she hasn't smiled within a minute, you may kick me, publicly, on the podium.

—ARTHUR COCKING.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$3272
Bob Clarke, Perth	10
Rockhampton E-Club	168
Yosimi Umeda, Tokyo	100
M. Rozsa, Orange	25
Dorothy Enderby, Sydney	100
Mr. Justice K. E. Enderby	100
Miss M. Straker, Manly	50
Mrs. T. Metherall, NSW	50
Ges. R. Ross, Brisbane	50
Mrs. G. Phillips, Brisbane	10
Miss S. Connors, Toowoomba	20
Ges. W. Aulsebrook, NSW	20
Mrs. C. White, Qld.	20
Anonima, NSW	200

Mrs. R. Dunbar, NSW	50
Mrs. J. McClelland, Manly	50
Mrs. V. Ramsay, NSW	2
Anonima	20

\$4317

Multaj aliaj donacoj jam alvenis, sed pro spacomanko ni nur kvitancoj venontnumere.

—Jam tutan jaron mi ne parolis kun mia edzino — diras iu al sia amiko.
—Ĉu vi ne estas ofenditaj unu al la alia?
—Ne. Simple mi ne deziras interrompi ŝin.

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 242 (322)

MELBURNO

Junio, 1987

PATRONS

of the

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

The following eminent Australians have agreed to be Patrons of the Australian Esperanto Association for this Jubilee Year 1987:

Hon. M. J. Ahern, Minister for Health and Environment, Queensland

Hon. Mr. Justice Enderby, Supreme Court of N.S.W.

Professor R. C. Gates, A.O., emeritus Vice-Chancellor, University of New England

Senator M. J. Macklin, Senator for Queensland

Senator Colin Mason, Senator for New South Wales

H.E. Mr. Charles Mott, Australian Ambassador to UNESCO

Dr. Keith Suter, Director of the Trinity Peace Research Institute, Perth, winner of a Year of Peace Prize

Josephine Vallentine, B.A., Dip.Ed., Senator for Western Australia

PRIZORGU NIAN INSIGNON

Antaŭ nelonge mi legis en malnova numero de "La Rondo", iama monata organo de la Aŭstralia E-Asocio, pri regulo de la Brisbana E-Societo. Tiu ĉi regulo forigas, laŭ la raporto, nebonan malnovan kutimon, laŭ kiu lernanto aĉetinta lernolibron povus samtempe aĉeti insignon. La nova regulo postulas, ke antaŭ ol fariĝi ano de la societo lernanto submetiĝu al elementa ekzameno, kies celo estas certigi ke la kandidato povu kaj kompreni kaj komprenigi sin en la lingvo.

Tiu ĉi nova regulo, laŭ mia opinio, estas tute racia kaj prudenta. Tro ofte kaj tro multe de tiuj ĉi duonbakitaj insignoportantoj sinnomantaj "Esperantistoj" malpropagandas nian aferon. Tiuj ĉi fuŝuloj tute ignoras la fakton, ke nia lingvo estas serioza kaj grava afero kaj ke, agante tiel stulte kiel porti insignon de io, pri kiu ili scias preskaŭ nenion, ili faras al ni grandan malbonon. Portanto de la verda stelo devas esti bona parolanto. Ne sufiĉas scipovi legi kaj skribi. Oni certe devas

havi parolkapablecon. Kiam nia stelo sidas en la butontruo por ke ĉiu vidu ĝin, oni rajtas atendi racian respondon kiam ajn oni alparolas la portanton.

Tamen, estas multaj, kiuj opinias, ke ĉar Esperanto estas sufiĉe facile lernebla lingvo, ili rajtas fanfaroni pri la malmulta scio, kiun ili akiris dum tri aŭ kvar lecionoj. Oni ne troigas, dirante, ke lernanto ofte aĉetas insignon samtempe kiam li aĉetas lernolibron. Antaŭ kelkaj jaroj mi mem ofte vidis tion ĉe la grupo kie mi komencis lerni Esperanton. Mi bone memoras pri iu junulo, kiu aĉetis insignon kaj tuj post la unua leciono alfiksis ĝin al la jako. Entuziasmulo! Pro tiu entuziasmo li des pli rapide lernos kaj meritas la insignon. Sed post ĉirkaŭ unu monato li ankoraŭ nur povis balbuti frazojn kiel "Ĝis Revido", "Bonan Vesperon" aŭ "Kiel vi fartas". Li tute ne povis elpensi eĉ simplan frazon. Do, mirakle, estis ĝuste li, kiu renkontiĝis kun alilandulo sur ĉefstrato en Londono dum iu somera vespero. Tiutempe li estis kun junulo neesperantista, kiu rakontis al ni pri la fiasko de nia fuŝulo. Kion pensis la alilandulo pri la afero?

Mi povas certigi al vi, ke kiam ajn mi vidas iun, kiu laŭ mia opinio, ne meritas porti la stelon, mi riproĉas al li ĝis li elprenas ĝin el la butontruo. Mi preferus, ke mi vidu nur unu stelon, tiun de bona parolanto ol stelarono de amaso de bablilantaj papagoj. Ĉiu bona samideano sentas, ke estas honoro porti la verdan stelon, sed estas honoro, kiun ni devas perlabori kaj meriti. Nura membreco al grupo ne rajtigas, ke ni mem prenu tiun honoron. Ni devus ricevi tion el la manoj de iu instruisto aŭ alia kompetentulo de la landa asocio kune kun atesto de kapableco.

Oni ne rajtas veturigi aŭtomobilon sen atesto de kapableco. Oni ne donas al infano multekostan maŝinon kiel ludilon por ke li rompu ĝin. Do, ni prizorgu, ke tiuj ĉi ne-esperantistoj ne portu nian insignon. La verda stelo estu por la vera Esperantistoj.

—A. D. COOK.

1986 — SATIRAJ ANALOJ de ROLO (Daŭrigo)

En tiu jaro plej interesa evento estis la mondvojaĝo de unika birdo. Estis papago. La blanka, tre ŝatata, vojaĝanto vizitis siajn amikojn en Kivilando kaj ankaŭ en Kanguru-lando (Ostralia). Lin bonvenigis la indiĝenoj, kiuj deziris savi sian kakuon en nacia parko, kaj siajn antikvajn emojn, minacatajn de la blanka abortuloj kaj planistoj kaj de malbona Al Koloho. Dank' al la papago la arbaraj ĝenoj malpligrandiĝis. Oni eĉ proponis, ke la Sankta Tero fariĝu Sankta Seĝo, kaj ke Patrino Tereza fariĝu Sankta Papino. Por la vojaĝo, el kiu konsistis la papago, oni havis specialan aviadilon kaj ankaŭ pampobilon (N) kie la Papo povis fari sian agon.

Ma'pli sukcesa estis la transportado en Aglolando. Pro rompo de sekreta sigelo, la naveto per kiu la agloj teksis siajn retojn eksplodis en la aero, kaj la navetano, inklude instruistino, perdis siajn vivojn. Pro tiu malsukceso estis kelkaj duboj ĉu la agloj povus fabriki sufiĉe bonajn sigelojn por protekti la sekretojn de la "Ŝtelmilitoj". Oni esperis, ke eble Reganto kaj Gobiĉefo, post ferio en Glacilando, povus interkonsenti pri la forieto de anatomaj armiloj. Bedaŭrinde malmulte okazis en la riĉe evoka ĉefurbo. Kvankam Reganto deziris ĝui

alian libertempon kun Gobiĉefo kaj lia bela edzino, la stabanoj (bas-tonaj konsilantoj) malpermesis al la Prezidanto ferii eksterlande antaŭ sia emeritiĝo.

En multaj landoj en 1986 la studentoj en la universitatoj vigle protestis kontraŭ la plenkreskuloj, ĉefe pri aferoj de la koro, kaj la kino.

En la kor-lando de Azio, sole, la studentoj, kiuj havis konsiderindan sperton pri dediĉo al striko anstataŭ Kristo, ne petolis sed pistole postulis demagogratajn rajtojn. Kelkaj eĉ celebris la morton de Kino Iluno, en Bojango (vidu la aŭstralian-esperantan vortaron — ne atentante la sorton de Mark Tveno, kiu informis demandanton, ke lia morto estas troigita! Do, ili devis funebri, kiam ili lernis, ke Kino en Korujo vivas kaj floras. Sed ili daŭrigis siajn preparojn por la Olimpiaj Ludojn 1988, kiuj rivalos la 100-jaran jubileon de Esperanto en 1987.

En P-kino, la studentoj de la Popola Publika ankaŭ amase sidis en la Placo nor demograto. Same en alia urbo — Sankta Hajko — la studentoj postulis la rajton skribi libere sur la granda murego. Sed la ĉefa Dungito de la Registraro diris, ke tiu rajto ne faras novaĵon . . . ke eĉ en kaputa-lista lando oni punas skribadon gravitan sur fe-muron. kaj la polico insistis, ke oni forigu la literojn

kaj la markojn. Do en Oriento, same en Akcidento, nenio nova!

En la Fi-lipaj insuloj, lando de la ĉevalamantoj, oni ankaŭ forigis la markojn post paca kor-atako organizita de A-kino. La studentoj, kiuj ne deziris fariĝi soldatoj, kontraŭ la moroj de la insuloj, kunigis kun la soldatoj, kuraĝaj, kiuj ne deziris fariĝi solduloj. Kiam oni forigis la markojn oni trovis, ke la amata hobbio estis kolektado de ŝuoj kaj skandaloj.

La studentoj ribelis ankaŭ en Paradizo, kie ili forlasis eĉ siajn amatajn kinajn por amasiĝi en la stratoj. Ili protestis kontraŭ la novaĵo, ke oni postulis pagon de kotizoj kaj kontraŭ aliaj kondiĉoj, kiujn en Akcidento oni kore malamas. La ĉefuloj de Paradizo ne forpelis la studentojn, sed promesis, ke ili povos reteni siajn amikinojn, kondiĉe ke angelaj studentoj reiru trans la markolon.

Kompreneble, eĉ en la Jaro de Paco, la Militoj de la Verda Stelo daŭre furiozis inter la naturistoj kaj la gluteistoj, inter la satanaj amasoj kaj la lingvistoj, kaj inter la universalistoj kaj la neŭtralistoj. Ĉar la polusaj ursanoj ne deziris viziton de satanoj eĉ por jubileo, ili devos celebri per bulonjo apud la maro. Ĉar la neŭtralistoj ne deziris kunveni transkurtene, ili decidis batali gracie cirkurteno. La turistoj invitis la teistojn al neformala festado. Ĉiuj esperis, ke estos batalpaŭzo, almenaŭ por la somero en Eŭreko. Sed post centjaro da militado, krei naĉon daŭran estus miraklo. Tamen okazis en P-kino ankaŭ en 1986 la ĉiujara festo de primitivaj verduloj, la Universala Kongreso de Universala Asocio. Tie oni tutkore festis, viande aŭ vegetarane, oni metis centmilojn de markoj sur la postaĵojn, kaj faris senombrajn filmojn por hejmlandaj kinoj. Kaj ne okazis ribelo. Same kiel en Manilo estis paca revolucio — Gastronomo Martenso transdonis povon al Hejmerferio Ton-kino, por estri la estraron, la komitaton kaj la tutan verdan popolon tra la jubilea jaro.

GRACE KIRKWOOD

Grace naskiĝis en Anglujo la 11-an de aprilo, 1904 kaj ŝi mortis en la Bellinzen Distrikta Hospitalo, la 18-an de aprilo, 1987.

Ŝi gajnis stipendion je la aĝo 13 kaj

post 2 jaroj rajton eniri kolegion por instruistoj. Post 2 jaroj ĉe la kolegio, ŝi gajnis ateston sed manko de mono malpermesis, ke ŝi atingu pli altan diplomon tiutempe. Kvin jarojn poste ŝi ricevis diplomon pri la franca lingvo. Diplomoj pri historio kaj la angla lingvo sekvis 16 jarojn poste.

Je la aĝo 29 ŝi edziniĝis, sed post 8 jaroj ŝi ekseziniĝis. Dua edziniĝo je la aĝo 49 daŭris 20 jarojn, ĝis la morto de ŝia edzo. Ŝi eklernis Esperanton en Adelajdo en la "kvardekaj" jaroj. Dum ŝi loĝis en Sidnejo ŝi kunlaboris kun Wre Chandler prezentante la kazon por Esperanto al la estroj de la Edukada Departemento. Bedaŭrinde ili ne sukcesis, ke Esperanto estu instruata en la lernejoj.

Kun ŝia dua edzo ŝi ekloĝis en Mylestom, iom sude de Coffs Harbour, instruado daŭris en la alternejo kaj en grupoj por plenkreskuloj. Ŝi tradukis "Treasure Island" en Esperanton.

Grace estis lerta metiisto pri brodaĵo kaj trikado; ŝi amis muzikon kaj ŝi ofte verkis artikolojn por la "Ornitologia Rondo Esperantlingva" kaj ŝi gajnis la "Premion Simondetti".

Inter la pli ol 50 funebrantoj estis kelkaj de ŝia Esperanto-grupo.

—M. CHALDECOTT.

26-a Aŭstria/4-a Pacifika Esperanto-Kongreso

La Kongreso okazos en "College of Advanced Education" ("Kolegio por Plua Edukado"), Mt. Gravatt, Q'ld. 4122. La Kolegio situas en natura boŝareo (50 hektaroj) dek kilometrojn de la urbcentro (boŝo-arbaro, kamparo-Aŭst. Vortaro). Ĉiu kongresano povos loĝi en unullita ĉambro, kosto proks. \$40 tae. Kongreskotizo ĝis 29-a de feb., 1988: \$40.00; Pensiuloj/Junuloj \$30.00. Post 1-a de marto, 1988, plua \$5.00. Sendu vian kotizon al "Sekretario L.K.K., 41 Agnes St., Sunnybank, Q'ld., 4107. Por mendi litĉambrojn aldonu \$10 kiel deponon. Por kvitanco aldonu afrankitan koverton.

1-a Listo de Aliĝintoj:

1. Mariorie Duncan (Manly)
2. Pegg Ross (Brisbano)
3. Rav Ross (Brisbano)
4. Mina Spork (Brisbano)
5. Carson Thomas (Toowoomba)
6. Trevor Steele (Brisbano)

7. Fay Koppel (Melburno)

8. Herbert Koppel (Melburno)

La inaŭgura kunveno de L.K.K. okazis 14-an de marto. Elektigis: Prez. Trevor Steele; Sekretario: R. Ross; 2-a Sekr. Peggy Ross Kasisto: Mina Spork; 2-a Kas. M. Schramm: Komisiitoj: Ekskursoj Gilbert & Decie Shonhan Distraĵoj Gaye Phillips & Kay Andersen; Informado, vendado Connie White, Sybil Martin; Ekumena Diservo: P. Keates; Publikrilatoj: Jay Grant, Aliaj Komitatoj: Ruth Morrison, Cath Sullivan, Lilian Newman, Annie Spencer, T. Duffy, Tom O'Grady, J. Carroll. "Australian Airlines" estas "la oficiala portanto". —RAY ROSS.

ESPERANTO EN SVISLANDO

Jam de pluraj jaroj Svisa Esperanto Societo baraktas kun manko de membroj, kiuj pretas oferi tempon kaj energion por plenumi funkcion. Tion ĉefe kaŭzas la maljuniĝo de la membraro. Mankas gejunuloj, pasis la gloraj tempoj kun nomoj kiel Hector Hodler. Ed. Stett'er kaj Edm. Privat.

Dum jaroj d-ro Baur preskaŭ sola devis tiri la ĉaron. Foliumente malnovajn "Svisa Espero" estas konstatabla, ke ĝi fariĝis, el vere movadinforma arde atendita gazeteto, fonto de parte nemalinteresaj ekstermovadaj artikoloj.

Apude naskiĝis Kultura Centro Esperantista, en La Chauv-de-Fonds, kies nelacigebla gvidanto estas s-ro Cl. Gacond. KCE de jaroj anoncas aron da kursoj kaj studsemajnoj en propraj stud- kaj dormĉambroj. Kiel tiuj kursoj kaj studsemajnoj estas frekventitaj nefacile sciigas.

En ĝenerala kunveno 1986 d-ro Baur demisiis. Kandidatiĝis Cl. Gacond sola. Li heroldis, ke li havas aron da junaj kunlaborantoj-kunkomitatoj. Malnovaj membroj cerbumis, ĉu s-ro Gacond sukcesos gvidi SES kaj KCE. Baldaŭ jam mankis la organo Svisa Esperanto Revuo, kvankam ĉe la elekto estis heroldita pri 4 redaktoroj estonte.

La 7-an de marto 1987 okazis la jarkunveno en Bern. Nur 2 tagojn antaŭe aperis nia gazeto kun la jarkalkulo. sen prezento de gravaj traktaĵoj diskutendaj. Prez. Gacond legis longan jarranorton, min. 1 horan, sed vane vi atendis en ĝi informojn pri plenumitaj laboroj, pri promesoj de antaŭ-jaro. Abundis proponoj por proksima societa jaro — ni vidu, kio efektiviĝos dum

proksimaj 12 monatoj! Longa disputado pri la gajno de UK 1979 Luzern, kiu ankoraŭ turmentas kapojn, ĉar ĝi estas blokita, ne de ekstere, de interne. Ne estis agrabla jarkunveno, duono de la partoprenantoj antaŭ tempe forlasis ĝin. Tamen, ni rajtas esperi, ke dum la jubilea jaro io okazos.

Aparte jarkunvenis la fervojistoj. Kiel gastoj partoprenis la prezidanto de la fervojista kultur-organizaĵo, de kiu SAEF ĉiujare ricevas bonan subvencion. S-ro Tschanz kaj same la reprezentantoj de la sindikatoj instigis nin vigle utiligi la semajngazetojn de la sindikatoj. La aktivado dum la jubilea jaro ŝajnas kuraĝiga kaj super tiu jarkunveno brilis multe pli favora stelo.

Antaŭ la jarkunveno okazis interesa Forumo, kiu liveras taŭgan ŝtofon por proksimaj elsendoj de internacia mallongonda radioservo. Jarkunvenis krome la Kristana Ligo Esperantista.

—O. WALDER.

AŬSTRALIA = =KRONIKO

• **ADELAJDO:** Nia grupo nun kunvenas dufoje monate ĉe la Kvakera Domo (la duan kaj kvaran lundon). Ni ĝuis dum aprilo la viziton de mia patrino, kiu instruis tri klasojn. La plejparto de niaj anoj ĉeestis kaj ĝuis ŝiajn Esperantajn ludojn. Max Wearing kaj Thea v.d. Boogaard baldaŭ vojaĝos al Varsovio, por partopreni en la Universala Kongreso. —PETRO ELLYARD.

• **TOOWOOMBA:** Rezulte de ekspozicioj en februaro, kelkaj gejunuloj eklernis Esperanton. Kurso komenciĝis ĉe la "Darling Downs Instituto de Alta Edukado" en marto kaj okazas ĉiun mardan vesperon.

Dank' al nia sekretariino Sandra Connors kaj la helpo de aliaj societanoj ĉe ekspozicioj, multaj preterpasantoj ricevis informilojn kaj ofte komentis favore pri Esperanto. —JEAN LEHANE.

• **KANBERO:** Ia novaj membroj, inter ili 5 studentoj de la Aŭstralia Nacia Universitato, bone progresas.

La 4-an de marto Ges-roj Kjellander el Stokholmo partoprenis. Post parolado de s-ro Kjellander pri Svedio sekvis ludo "Loterikvizo pri Skandinavio".

La 11-an de marto Stephan McKenny kaj Michael Dunn prezentis skeĉon "La Papago" en bonstila Esperanto.

John Gordon, la kariljonisto, bele ludis nian himnon per kariljonoj de Kanbero (14/5) kaj Sidneja Universitato (31/5). Ni sendis raporton kun foto al "Heroldo de Esperanto".

Hans Sonne el Kopenhago, kiu partoprenis la piknikon je Anzaktago kaj pluvojaĝis al Melbourne, revenos al Kanbero la 5-an de julio, por prezenti koncerton. La "Vespero kun Hans Sonne" okazos en la Klubo de la Finna-Aŭstralia Asocio. Hans invitis ĵurnalistojn al gazetarkonferenco.

La gazeto "The Bulletin" enhavis en sia numero de la 17-a de marto artikolon de Fergus Mor: "One hundred years since Zamenhof formed Esperanto". La aŭtoro agnoskis la helpon de la A.E.A.-Prezidanto.

Dum la vintra sezono nia klubo kunvenos en privataj hejmoj.

—RALPH HARRY.

• **SIDNEJO:** 11-an de majo: Serĉante en ĵurnaloj por neologismoj, M. Chaldecott trovis en "Monato" tradukojn de Bertram Potts de la frazo "Last but not Least". De tio venis la ideo ke eble ni povus presigi libreton verkitan de "Timmie", en kiu li listigis maloftajn frazojn. Simpla sugesto de M. Chaldecott iĝos kompleksa programo por la komputilo farota de Tom Elliott.

Semajnon poste James Harwood montris lumbildojn de la bela pejzaĝo de meza Aŭstralio. Li diris, ke kiam li montris ilin al geamikoj, ke ili komprenis ke la koloroj de Albert Namatjira ja estis veraj.

La 25-an de majo Brian Currie elektis el eksterlandaj ĵurnaloj eseon pri la uzo de komputiloj en presado. M. Chaldecott trovis artikolon en "Monato", kiu menciis la strangan lingvon uzatan de la presistoj, kiuj ofte apartigas vortojn en stranga maniero, ekz. man-kanta, kolbaso, sol-dato, kredi-toj, neku-time. Aliaj artikoloj temis pri la frua Esperanto (verkis Claud Piron) kaj pri eblaj mondaj aferoj en 2000.

—M. CHALDECOTT.

• **MANLY:** La 7-an de aprilo dum aferkunveno en la hejmo de Marjorie Duncan, membroj diskutis planojn por la Jubilea Jara plantado de arbo en Gilbert Parko, Manly, kaj la Civita Akcepto poste.

Tri kunvenoj okazis en privata hejmo dum la feria periodo de la Vespera Lernejo.

Dek anoj de Sidnejo kaj Manly ĝuis la Anzac-semajnfino en Kanbero kun niaj ĉiam gastamaj Kanberaj semideanoj. (Vidu detalan raporton en la aprila/maja eldono de A.E., paĝo 93).

Je la 2-a de majo proks. 10 membroj ĝuis la nun ĉiujaran viziton al la hejmo de Eric kaj Bettie Hart. Post ĉirkaŭrigardo de la belega ĝardeno kaj lunĉo kelkaj anoj legis amuzajn skeĉojn verkitaĵojn de Helen Stone.

La 26-an de majo, je la 2-a p.t.m. la Urbestro de Manly plantis arbon en Gilbert-Parko, por celebri la Esperanto-jubilean jaron. Proks. 40 personoj ĉeestis la ceremonion kaj poste la Urbestro invitis 20 membrojn al oficiala akcepto en la urbdomo. La arbo situas en angulo de bela parko en la mezo de Manly kaj tuj apude estas ŝtala memorŝildo kun la gravuritaĵoj "Brachychitou Acerifolius, planted by Ald. G. Smith, Mayor of Manly, to mark the centenary of Esperanto, la Internacia Lingvo, 1887-1987".

Dum 4 semajnoj en majo la "migranta ekspozicio" allogis intereson en la Biblioteko de Manly. Informa artikolo aperis en la loka ĵurnalo. Ni ŝuldas gratulojn al Ges-roj Tумman pro la interesa kaj bone aranĝita enhavo kaj dankon pro la klara helpa instrukcio pri el-kaj enpakado.

—EUNICE GRAHAM.

• **BRISBANO:** La kutimaj kvar klasoj okazas ĉiun lundon en la klubĉambroj. Ni adiaŭis al Alan Grant, kiu forflugis al Eŭropo la 11-an de julio; Alan vizitos al Anglujo kaj poste partoprenos la U/Kongreson en Varsovio. Joyce Turner el Rockhampton ekiros la 20-an de julio ankaŭ al la U/Kongreso. Anoj de la kantgrupo, kun helpo de la familio-Grant laboris pri la spirala bindaĵo de 'Aŭstralio Kantas' (dua eldono); ĉi tiu kantlibro estas havebla ĉe la Brisbana Societo. Ankaŭ havebla estas Esperanta-Aŭstralia Vortaro de Aŭstraliaj Birdoj eldonita de Ray Ross. Post kelkaj semajnoj la Pacifika Kantlibro estos prespreta; Gaye Phillips kaj Kay Andersen nuntempe prizorgas la 'pli ol tridek' kantojn el la Pacifika regiono. La 28-an de julio okazos vespero de 'Trivial Pursuit' kaj anle kaj esperante kiam anoj invitos ĝamikojn partopreni ĉi tiun

novajon en la klubejo. Intertempe la LKK aktivis pri aspektoj de la Aŭstralia/Pacifika Kongresoj aliĝilo/programo estos preta je la fino de julio.

—RAY ROSS.

EL LA FEDERACIO

• **KVINSLANDO:** Pli ol tridek anoj partoprenis la jarpiknikon je 24-a de junio ĉe Lago Wivenhoe, 70 km norde de Brisbano. La kvar celoj de la lago estas provizi akvon kaj elektropovon al Brisbano kaj Sudoriento Kvinslando, malebligi inundon en la samaj regionoj-per piknikareoj certigi al vizitantoj unuaklasan piknik/sportareon.

Post speciala arango fare de Jennifer Dimo, anoj vizitis la belaspektan administran centron, kie parkoficistoj prelegis kaj montris vidbendon pri ĉiuj aspektoj de la lago. Ĉiuj spertis plensukcesan piknikon kaj agrablan renkontigon.

—RAY ROSS.

Ĉu iu povas provizi al nia Muzeo 3 ekzemplerojn de "Suda Kruco": N-ro 154. Aŭg., 1934. Ni pagos viajn send-kostojn.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$4,317
Anonima — Viktorio	25
Anonima — Viktorio	20
Harry Beechey, Melbourne	50
Mr. J. B. Bell, Clifton, Q'ld.	20
David Brand, Canberra	10
Mrs. May Eatt, Perth	20
Isabel Gale, Melbourne	5
John R. Harry, Melbourne	1,000
Ann Hearn, Melbourne	40
Lydie Hooper, Melbourne	10
P. G. Husbands, Canberra	20
Geoff Isaac, Melbourne	10
Ruth McGrath, Perth	100
David McQueen, Warragul, Vic.	10
Merle Packham, Yeppoon, Q.	20
Adrienne Paling, Melbourne	10
Henry Rosengren, Melbourne	10
Ilija Slavoff, Melbourne	10
Joyce Turner, Rockhampton	120
Dr. Jack Walters, Canberra	120
Kay Andersen, Brisbane	10
Ges. G. Shonhan, Brisbane	100

\$6,057

Pliaj donacoj jam alvenis, sed pro spacomanko ni nur kvitancos venont-numere.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1987

Antaŭe raportita	\$65
Sandra Connors, Toowoomba	10
Anonima, Victoria	20
J. B. Bell, Clifton, Q'ld.	10
Chris Dean, Perth	10
May Eatt, Perth	10
Ges. R. Felby, Adelaide	10
Ann Hearn, Melbourne	10
Lydie Hooper, Melbourne	10
Mrs. J. McClelland, Manly	10
Ruth McGrath, Perth	10
David McQueen, Warragul	10
Merle Packham, Yeppoon, Q'ld.	10
Adrienne Paling, Melbourne	10
S-ro C. Rice, Sydney	10
Henry Rosengren, Melbourne	5
Ilija Slavoff, Melbourne	10
S-ro E. C. Thomas, Toowoomba	10
Joyce Turner, Rockhampton	20
Dr. Jack Walters, Canberra	10
Kay Anderson, Brisbane	10
Ges. G. Shonhan, Brisbane	10

\$290

Pliaj donacoj jam alvenis, sed pro spacomanko ni nur kvitancos venont-numere.

RECENZOJ

ORIGINALA ROMANO KIU PRESKAŬ SUKCESIS

KIUJ SEMAS PLORANTE . . . de Eva Tófalvi kaj Oldrich Knichal. Eldonita de Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 1984. 107 paĝoj, fortike broŝurita, Prezo nederlanda gl'd 15.00.

Estas multo laŭdinda en ĉi tiu libro, kiu rovos popularigi ĝin inter ordinaraĵ legantoj, kaj klasanoj. La vortuzo estas tradicia kaj laŭdinda; la stilo estas facila, klara, "klasika". La romano estis verkita, ne por komencantoj sed por la ĝenerala legema publiko.

Sed **Kiuj semas plorante** . . . celas esti io pli ol facile legebla distraĵo. Ĝi gajnis la literaturan premion Rajmond Schwartz en 1980 (nu, jes, tiujare nur naŭ aŭtoroj konkuris, kaj mi ne vo'lonte

sciigus pri la kvalito de la aliaj naŭ manuskriptoj [ŝajnas ke unu aŭtoro kontribuis du manu skriptojn]).

Distra fikciaĵo la libro ja estas. Sed min ĝenas la fakto, ke kiam ajn mi reprenis la volumon por legi ĝin, mi jam forĝesis la temon . . . Literaturo ĝi ne estas.

La temo estas simpla, kaj facile prezentita en tiel mallonga romano: aŭstra junulo dum la jardeko 1930'oj logiĝis al faŝismo, kaj, samtempe, pro sia brila inteligento, fariĝis talentoplena literaturisto kaj filologo. Li sekrete membrigis en la faŝista partio, kaj baldaŭ ricevis komision: infiltrati la Esperanto-movadon, trovi kiuj el ili estas juddevenaj, komunistoj, kontraŭfaŝistoj, aŭ alimaniere suspektindaj. Samtempe, li mem tenu sian propran faŝistan kredon tute sekreta, eĉ parolu kontraŭfaŝiste fojfoje. Neniukaze li lasu ke iu ajn suspektu, ke li eĉ tolerus faŝisman reĝimon. Kompensio: la Partio arangas honoroplenan akcepton de lia doktora disertaĵo, universitatan postenon kun rapida avanco al pli altaj niveloj, luksan loĝejon, pagon alimaniere nur prirevenblan, kaj aliajn kromajojn laŭ lia deziro.

Konscienco vere ne tre ĝenas nian "heroon". Li diligente plenumas siajn taskojn por la Partio, kvankam iom post iom li fariĝas nigra. Ĝenas, ke li enamiĝas kun bela junulino, pri kiu oni noste lernas, ke ŝi estas parte juddevena. Domaĝe ke unu-du "amikoj" devas malaperi kaj neniam denove vidiĝu vivantaj.

Sed, ĉu vere li agas juste? Fojfoje tiu demando mordas lian menson. En la fino li decidas ke ne, kaj provas uzi falsan pasporton donitan al li de lia iama fianĉino. Sed la Partio lin kaptas, lin murdas.

Ĉi tio povus esti la temo de animtuŝa, korŝira, konsciencrriiga dilemo. La du aŭtoroj estas hungaro kaj ĉeĥoslovako, ĉu fojfoje mi renkontas tre, tre kaŝitan sugeston ke ĉi tiu romano povus esti iomete alegorio pri eventoj pli freŝdataj? Se jes la aŭtoroj iom tro bone kaŝis tion. Kaj la animtuŝa, korŝira, konsciencrriiga rakonto pli fariĝis nur me!odrama.

Jes, mi agnoskas, ke mi tro severe juĝas la verkon. Ĝi ja gajnis literaturan premion, ĉu ne, eĉ kvankam konkuris nur naŭ verkoj? Multaj legantoj volas legi rapidmovigantan, ekscitan rakonton kiu ne tro streĉas la cerbon kaj ne tro malagordas la korŝnurojn. Literaturo ni ne nepre devas havi, ni jam havas la televidon, la radion, la ĵurnalojn, ili ja sufiĉas por nia animnutrado, ĉu ne?

Sed ho ve! Kun temo kiel tiu en ĉi tiu libro, kial mi ne povas memori pri kio parolas la aŭtoroj, reprene la volumon por plulegadi . . . ?

—DONALD BROADRIBB.

—Vi devas nepre maldikiĝi! — avertas kuracisto bieremulon. — Anstataŭ glaso da biero bonvolu enbuŝigi unu pomon!

—Sed tio ja estas neebbla! Kiel mi povus manĝi ĉiutage 30 pomojn?

(Hung. Vivo)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

37. DOROTHY THRELFALL

She Translated "The Life of Ghandi".

The maternal grandfather was French. Dorothy taught French for nearly 40 years, 30 of them in small country towns of Western Australia, and the rest as a Teachers' College Lecturer.

Life in the otherwise pleasant little towns of Bunbury and Albany was somewhat frustrating. Had she done her B.A. to spend 30 years away from the mainstream of W.A.'s intellectual life? In those days every High School student had to take French. Interested aptitude for a foreign language was considered an advantage but not essential. Dorothy tried hard to enthuse her students, sometimes with success, but more often without. She was complaining to a friend about the ridiculous policy of "French for all, willy-nilly" and received the reply, "Why don't you teach them Esperanto?"

Esperanto? What was that? To Dorothy, it might as well have been double Dutch! The friend, who was doing a correspondence course with Reg. Banham, lent her a little lesson book. At first Dorothy was avid, but she was very busy at school and, anyway, she would never have been able to teach it in a High School, so the new study was dropped — but certainly not forgotten. In Perth, many years later, she was able to attend a beginners' class in Esperanto.

At the Graylands Teachers' College, she inaugurated a Language Club where students had the choice of French, German (both taught by Dorothy), Italian or Esperanto. Esperanto was a forbidden subject, but Dorothy sneaked it in without telling the Principal. The teacher was none other than Ruth McGrath, who travelled down with her young baby and thus became part of the honest conspiracy.

Married women were not allowed to teach, so Dorothy retired and then married. Now, in retirement, there was time for the two passions of her life — Esperanto and Peace. Dorothy found herself in various Esperanto mutual-help groups — at Dr. Caldera's or Ruth's or at Alice Longson's or Mrs. Pollard's — but was never in an official class, and never attended Club Meetings. Dr. Caldera persuaded her to take the Supera Examination. On her certificate are the signatures of Ross Robins, Robbie Robertson and Ken Linton.

Thinking that there was no more to learn in Esperanto — after all, she had passed the "final" examination — Dorothy turned to Italian. However, the 1970 Congress in Perth proved an eye opener and an embarrassing reminder of how much she **didn't** know. Furthermore, she met Fay Koppel who introduced her to Esperanto literature.

About that time, the Secondary Teachers' College was established in Nedlands. The Principal? A keen student of Dorothy's in Bunbury years before. He could not withstand the pressure of his former teacher, so he introduced Esperanto as an optional subject, with Dorothy as the first teacher. Brenda Birkett was one of her students.

This Congress inspired Dorothy to attend others — in Melbourne, Launceston, Adelaide, Perth, Canberra and even Lucerne, and she became more and more enthusiastic at each one. In the '70s too, Ivan Maddern's Open University surfaced. Fay Koppel provided — through Esperanto literature — the richest, most abiding course of the whole degree and earned Dorothy's grateful praise.

The Women's International League for Peace and Freedom had been formed way back in 1915. The Spanish Civil and the 2 World Wars had appalled Dorothy who had felt strongly for Peace all her life. She joined the W.I.L.P.F. in 1950. Now, being a worker for Peace and an Esperantist, having read Privat's "Life of Ghandi" in Esperanto and "Aux Indes avec Ghandi", she felt impelled to translate the story **into English**. Why Ghandi? Because he stood for serene inner peace, and taught not only how individuals but how nations should behave. He embodied, "Love one another" and the Golden Rule. Why into English? So that even more people would read it. Why from the Esperanto? Because the Esperanto version was concise and compelling.

Ralph Harry gave much appreciated help and advice, and the author herself financed the publication of her book.

Dorothy has never held Esperanto office: she does not regard herself as an expert in the "parola arto". Yet, she has earned a place in Esperanto history, for, as a Swiss magazine pointed out, she has shown that Esperanto is a language of world status and is entirely suited to literary translation. —ARTHUR COCKING.

—ooOoo—
 —Bedaŭru min, amiko! Mia edzino
 reĝule vizitadas la drinkojn.
 —Kurioze! Kion ŝi serĉadas tie?
 —Min. (Hung. Vivo)

Grandventra dikulo staradas antaŭ la
 infanvartejo.
 —Ĉu vi atendas infanon? — demandas
 lin la afabla vartistino.
 —Kion vi pensas? — li respondas kolere
 — mi ĉiam aspektas tiel!

(Hung. Vivo)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 243 (323)
MELBURNO
Julio-Agusto, 1987

72-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO SOLENA INAŬGURO

Malfermaj Vortoj de Humphrey Tonkin
Bonvenon al la 72-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto! Bonvenon al Varsovio! Bonvenon al la dua jarcento de la Internacia Lingvo!
Ni kunvenas tie ĉi en la lulilo de Esperanto — en la urbo kie ekestis nia lingvo kaj en la lando kie naskiĝis ĝia kreinto.
Tiu ĉi estos festa kongreso, en kiu ni honoros cent jarojn de nia historio kaj prepariĝos por la venonta jarcento. Neniam antaŭe tiom da homoj el tiom de landoj ĉeestis iun ajn Esperanto-renkontigon. Neniam antaŭe okazis Esperanto-kunveno kun tiom da artaj aranĝoj, tiom de altnivelaj prelegoj.
La kongreso simbolas la progreson de Esperanto en la mondo: ĝi estas tutmonda, ĝi estas pli internacia, ĝi estas kulture pli riĉa, ol iam ajn antaŭe. Ni staras fieraj pri nia centjarigo, fieraj pri cent jaroj da hardiĝo, fortaj por fronti la estontecon.
Saluton Varsovio! Saluton Esperanto! Saluton Kongresanoj!
—HUMPHREY TONKIN.

ESPERANTO CELEBRAS JUBILEON de Les Scott

6,000 Esperantistoj, el 60 landoj, amasiĝis en Varsovio, Pollando, 25/7 ĝis 1/8, por festi la 100-jaran Jubileon. Inter ili estis 22 Aŭstralianoj.

La Kongresejo estis la grandega kaj impona Palaco de Kulturo kaj Scienco, kiu estis donaco de la Rusa Registaro al la Pola popolo, post la dua mond-Milito. La konstruaĵo estas bone ekipita kaj oni povas diri, ke ĝi tute taŭgis por la grava Kongreso, eble kun kelkaj perturboj. La salonoj estis ĝenerale adekvataj kaj komfortaj, sed disvastigitaj en pluraj etaĝoj. Sajnas, ke mankis facile legebla kaj kom-

prenebla plano, sed oni devas konfesi, ke la informservo estis ĉiam unuaklasa kaj la deĵorantoj estis afablaj, ĝentilaj kaj helpemaj. Bedaŭrinde, ne estis sufiĉaj stabanoj por trakti la demandojn sufiĉe rapide. Multaj partoprenintoj konfesis, ke ili ne tute alkiutimiĝis al la lokoj de ĉiuj salonoj. Oni ofte maltrafis partojn de paroladoj serĉante la lokojn. Multaj nretendis, ke la Libroservo ne havis adekvatan stokon, kvankam ili evidente estis tute kontentaj pri la kvanto de la vendoj.

La tagaj programoj estis ampleksaj, diversaj kaj ĝindaj. Prezentitaj de mondklasaj prelegistoj, nome Auld, Wells, Bolton, Witkam, Wandel, Meszaros, Lins, Lewin, Krause, Eichhorn, Dobrzynski, Benzik, k.a. multe kontribuis al la klimakso de "100 Jaroj de Internacia Kulturo", la Kongresa Temo. U.E.A. Vic-Prez. Yosimi Umeda kapable prezentis la sesion "Tago de la Paco".

La vesperaj programoj estis variaj kaj ĝindaj: ili konsistis el Interkona kaj Inaŭguraj Muzikaj Vesperoj; Chopin-Koncertoj; la Koncerto de Joelli Rabu, la belsona Kanada Kantistino; la Teatroj; la Pola Popoldanca kaj Muzika Grupo; la Filmoj; la Bankedo kaj Balo. Aldone al tiuj, la Oomota kaj Bahai Religiaj Grupoj organizis Bankedojn, ĉe la lksa Hotelo Viktorio, por speciale invitatitaj Esperantistoj.

Estaran kontribuon al la Kongreso faris ĝia alta Protektanto, kiu estis neniu alia ol la Prezidanto de la Pola Parlamento, S-ro Roman Malinowski. Li persone partoprenis en ĉiuj Oficialaj Kunsidoj de la Kongreso kaj aranĝis, ke multaj ŝtataj rimedoj estu je la dispono de la L.K.K. Prezidanto Malinowski invitis lokajn kaj eksterlandajn funkciojn al Oficiala Akcepto en la Parlalemente de Warsaw. Post vere bongusta manĝo, ni estis invitatitaj en la Kunsidĉambron mem, kie la Prezidanto, pere de interpretistino klarigis la funkciadon de la Parlalemento kaj la Pola Registara sistemo. Li bonvenigis kaj volonte respondis al pluraj demandoj.

La L.K.K.-anoj plenumis siajn nefacilajn, longhorajn taskojn sperte kaj efike kaj neniam grumblis.

Ni, en la U.E.A. Komitato, kunsidis multfoje antaŭ kaj dum la Kongreso kaj konsideris kaj verkis planojn por la dua Jarcento.

La Ekskurso al Bjalistoko, la naskiĝloko de Zamenhof, estis neforgesebla. Post vizitoj al la Monumento de la Kreinto kaj al lia originala Domo, multaj miloj d Esperantistoj kaj ne-Esperantistoj amase kolektiĝis en granda amfiteatro por aŭskulti al kelkaj impresaj paroladoj. Prezidanto de U.E.A. Dr. Humphrey Tonkin, emocioplene prezentis la atingojn ĝis la 100-a datreveno kaj planojn por la estonteco, dum oni liberigis ducent kolombojn kun Pacmesaĝoj al eminentuloj. Sekvante, bone parolis Ludoviko Zamenhof (nepo de la Kreinto) kaj Andrzej Pettyn (ambaŭ

Poie kaj Esperante) kaj la Urbestro de Bjalistoko kaj Prezidanto Roman Malinowski (ambaŭ pole). Tiu estis kortuŝa evento.

U.E.A. Prezidanto. D-ro Humphrey Tonkin, kaj lia stabo estis multe okupata antaŭ kaj dum la Kongreso. Ili sendis informon al ĉiuj mondestroj, informante ilin pri nia grava Jubileo. D-ro Tonkin prezentis kelkajn inspirajn paroladojn dum la oficialaj publikaj sesioj. Personaj reprezentantoj el Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO parolis por saĝaj bravegaj organizoj kaj ofertis ilian fortan subtenon kaj kunlaboron por la estonteco de Esperanto. La Varsovia televido, radio kaj ĵurnaloj tre favore kovris la gravan eventon en nia historio kaj nun la novaĵo rondiras la mondon.

Vizitantoj prenis la okazon por vidi kelkajn vidindaĵojn de la urbo Varsovio, k'aj la Malnova Urbdoma Placo; La Ruĝa Palaco; La Chopin-Monumento (kie oni aŭskultas al la muziko de la Majstro); la Monumentoj de La Kurafaj Polaj Soldatoj; kaj la Tombo de Zamenhof kaj lia familio. Oni devas vidi la rekonstruon de la urbo el la ruinoj de Milito por kredi tion. Oni ankaŭ rimarkas, ke la Poloj estas fieraj pro la fakto, ke Esperanto originis en ilia lando kaj nuntempe ekzistas adeptoj, subtenantoj kaj flujaj parolantoj en multaj lokoj.

Multaj diversaj Post-Kongresaj Ekskursoj estis kondukitaĵoj por Esperantistoj al diversaj lokoj. Ni estis en Ekskurso aranĝita de E.L.N.A. sub la gvidado de Andrzej Grzebowaski, bone konata Esperantisto, kiu kondukas "Esperantotur". Li transdonis unuaklasan informon pri la gravaj urboj kaj regionoj, kiujn ni vizitis. Tiu inkluzivis Bydgoszcz, Gdansk, Sopot, Gdynia, Malbork, Lodz, Torun, Czestochowa, Krakow, Zakopane kaj pluraj aliaj. Ni vizitis la Salminejon de Wietrze kaj tiujn terurajn Koncentrejojn de Treblinka kaj Auschwitz, kie Hitleranoj murdis pli ol kvar milionojn el la popolo, plejparte Poloj. Ni ankaŭ vizitis multajn Preĝejojn — etajn, grandajn, grandegajn katedralojn, malnovajn, modernajn, kastelojn kaj aŭdis sennombrajn sonorilojn — estas Preĝejo ĉe ĉiu anulo!

Esperantistoj forlasis Pollandon. la landon de 3000 preĝejoj kun kelkaj tre profundaj impresoj:

- ★ La tuta dediĉo al la religio.
- ★ La bravego sub la terura suferado de Milito.

La 61-a kongreso de SAT okazos en Campos do Jordao (Sao Paulo, Brazilo), de la 6-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1988.

—HENRI MASSON.

(1) — SAT, 67, avenue Gambetta, F-75020 Paris, Francio. SAT estas tutmonda socikultura organizo kun strukturo sennacieca; ĝi havas membrojn en kvardeko da landoj; ĝia peranto en Aŭstralio estas: **Bill Clarke, 6 Leura St., Nedlands, W.A., 6009.**

BRITA JUBILEA FESTO

La Esperanto-Asocio de Britujo, sub la gvidado de la Prezidanto, Manjo Austin, brile organizis Jubilean Feston de la 3-a ĝis la 5-a de julio en Bloomsbury Teatro, Londono.

Ĉefe elstaris: (a) Teatraĵo: 'La Graveco de la Fideligo' ('The Importance of Being Earnest' de Oscar Wilde), en traduko de William Auld; (b) La Fes'a Koncerto, kun la Londona Kimra Virvoĉa Ĥoro, kaj profesiaj sol-kantistoj; (c) Prezentado de la Londona Esperanto-Ĥoro, de ropol-dancistoj, de roluloj el la Teatro Internacia de Akvitanio, kaj de la tuta familio Fantom; (d) Prelego de Claude Piron pri 'la

Valoro de Esperanto en Eduko'; (e) La Di-Servo en preĝejo kun posta akcepto kaj te-maĝo.

Sendis bondezirojn por la Festo: ŝia Reĝina Moŝto, la Cefministro Margaret Thatcher, Neil Kinnock kaj dekoj da Par.amentanoj, kaj multege da Esperanto-eminentuloj.

La Festo donis al la partoprenantoj profundan senton de admiro pri la elstara sukceso de la diversaj prezentaĵoj. Sentigis ankaŭ fortiganta konvinko pri la certa disvastigo de nia lingvo en ĉia dua jarcento.

—MARJORIE DUNCAN.

NIA JUBILEO

Tre grava ĵurnalo — la anglalingva "International Herald Tribune", en sia numero de la 25-a de junio, enhavis bonan artikolon pri la Centjara Jubileo de Esperanto, kun intervjuoj kun Tonkin, Auld, Waringhien, Ulrich Lins, Albault kaj Milojevic, kaj foto de Waringhien.

La artikolon sendis al A.E.A. nia patrono, S-ro Charles Mott, Ambasadoro de Aŭstralio ĉe UNESKO.

—RALPH HARRY.

LA ŜTATESTRO DE AŬSTRALIO VIZITIS LA BIBLIOTEKON DE A.E.A.

La 21-an de aŭgusto la Vicreĝino de Aŭstralio, Kavaliro Ninian Stephen (stiv'n) kaj Kavali-redzino Stephen, vizitis la Bibliotekon de la Aŭstralio Esperanto-Asocio en la nova "Domego Stephen", ĉefejo de la Aŭstralio Instituto de Internaciaj Aferoj en Kanbero.

La biblioteko situas en la "Legsalono Casey" (kesi), nomita honore el Lordo Casey, Ministro de Eksterlandaj Aferoj kaj poste Vicreĝino de Aŭstralio, kiu estis unu el la internaciaj patronoj por la centjara jubileo de la naskiĝo de Zamenhof, kiam A.E.A. starigis fonduson por ebligi la akiron de ejo por biblioteko kaj aliaj servoj.

S-ro Ralph Harry, Prezidanto de A.E.A., bonvenigis Kavaliiron Ninian (al kiu li antaŭe sendis ekzemplerojn de la jubilea broŝuro de A.E.A., de AUSTRALIAN ESPERANTIST kaj de aliaj dokumentoj). Li prezentis S-inon Marjorie Ellyard, la sekretarion de A.E.A., D-ron J. Walters, la komisiiton de la Kanbera Esperanto-Klubo por informado, kiu eldonis la aŭstralian jubilean afiŝon, kaj S-ron P. Munibi, la kasiston de K.E.K.

S-ro Harry informis la eminentulojn pri la historio de la nacia biblioteko, kies starigon en Kanbero iniciatis antaŭ kelkaj jaroj la Redaktoro de "Australian Esperantist", S-ro Herbert Koppel de Melburno. Li klarigis, ke estas ankaŭ bibliotekoj en la Esperanto-domoj en Melburno kaj Sidnejo kaj same en Brisbano, Perto, Launcestono kaj aliaj urboj.

Kavaliro Ninian unue vizitis la bretojn, kie estas pli ol 1.000 libroj kaj kelkcent volumoj de periodaĵoj, el kiuj multaj estas binditaj. Ili estas katalogitaj kaj indeksitaj laŭ la sistemo Dewey, kun helpo de la bibliotekistoj de la Universitato Murdoch (merdok) en Perto.

Tiam S-ro Harry kaj liaj kolegoj prezentis ekspozicion pri la evoluo de Esperanto ekde 1887. Ĝi komenciĝis per ekzemplero de "Esperantisto" presita en Nurenbergo en 1893, Ekzercaro de 1900 kaj originala letero de D-ro Zamenhof al Generalo Siebert (donaco de H. Koppel). Kun ekzempleroj de Plena Analiza Gramatiko kaj Plena Ilustrita Vortaro estis originala literaturo kaj fine la Jubilea Antologio de Esperanta Poezio.

Dua fako enhavis la grandajn tradukojn, kiaj la Sankta Biblio, la Nob. a Korano kaj kelkaj naciaj antologioj, kiel ankaŭ la manuskripton de la eldonota Aŭstralia Antologio.

Vico da aŭstraliaj eldonaĵoj inkludis historian studon de la pioniro George Collingridge (kolinriĝ), kies verkado pri la eltrovo de Aŭstralio fare de la portugaloj konis Kavaliro Ninian. Ĝi kulminis per **ESPERANTO EN AUSTRALIO** (1905-1985) de Ray Ross, kiun oni donacis al la Vicreĝino, kune kun ŝlosilo kaj ekzemplero de la Aŭstralia-Esperanta Vortaro.

Interesis la vizitantojn precipe la fakaj gazetoj (kiaj **INTERNACIA JURA REVUO** kaj **SCIENCA REVUO**) kaj la libroj el Japanio, Hungario kaj Ĉinio.

Kavaliredzino Stephen komprenis iom da Esperanto, ĉar ŝi vizitis klason de D-ro Caldera en Perto, kiam ŝi estis studento, kaj la Vicreĝino scipovis kelkajn frazojn, ekzemple: La libroj estas sur la tablo kaj "Mi tre dankas".

La konversacio pri Esperanto daŭris dum lunĉo en kiu partoprenis aliaj mecenoj de la Instituto de Internaciaj Aferoj, inter ili la Sekretario (estro) de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kaj Komerco, D-ro S. Harris.

Permesate de la Ĝenerala Guberniestro, la Asocio plantis, apud la enirejo de Domego Stephen, ĉerizarbon kun ŝildo por memori pri la Centjara Jubileo de Esperanto kaj la vizito de la Ŝtatestro.

—RALPH HARRY.

ESPERANTO RECOGNIZED BY FEDERAL GOVERNMENT AUSTRALIAN NATIONAL POLICY ON LANGUAGES

A report entitled "National Policy on Languages" written by Joseph Lo Bianco, Ministerial Consultant in the Office of the Minister for Education, dated 28 November, 1986, was tabled in the Australian Parliament on 4 May, 1987, by the Minister for Education, Senator Susan Ryan.

Summary of Conclusions

The policy sets out to address a variety of language problems, including the overcoming of injustices, disadvantages and discrimination related to language, the enrichment of cultural and intellectual life in Australia and the integration of language teaching/learning with Australia's external (economic and political) needs and priorities.

The policy begins from the fact that in Australia Australian English is the **de facto** official language and that a primary objective is to enable all Australians to use standard Australian English in Australia and overseas. The policy also includes maintenance and encouragement of aboriginal and Torres Strait Island languages and of other languages used in the community by ethnic communities.

Of particular interest to Esperantists are the proposals for a "language awareness" program for junior secondary school level and the overall objective of: **A Language other than English for all.** The report gives irrefutable arguments supporting this objective.

The report contains very little direct reference to Esperanto. This is partly due to the fact that information used is derived mainly from reports of educational authorities based on statistics from schools. It is a sobering reminder, however, that the Esperanto movement has not yet succeeded in convincing the Departments of Education that our language is one which is a major factor requiring consideration or analysis.

Recognition of Esperanto

Esperanto is however specifically recognized in two contexts:

(a) as a language, along with Aboriginal Languages, to be included in planned language education for language awareness;

(b) as one of the languages (in the same category as Russian, Korean, Hindi, Portuguese, Serbian and Croatian), the teaching of which is "desirable if possible" in post-primary schools! The same table includes, by implication, Esperanto among languages which may be taught after hours, in adult education, in private language schools and in tertiary institutions.

These are useful recognitions, but the task of demonstrating the relevance and importance of Esperanto is still ahead of us.

—RALPH HARRY.

—ooOoo—

—Karlo mia, vi devos sola vojaĝi al Venecio!

—Sola fari nuptovojaĝon? Kion vi pensas, karulinjo?

—Diru do, ĉu ĝuste tiam ni devas nupti en Venecio, kiam komenciĝas nova serio de krimalfilmoj en la televido? (Hung. Vivo)

ESPERANTO in UNIVERSITY SUMMER SCHOOL of LANGUAGES

The United Nations Association of Australia has been advised by Prof. G. N. Blainey, Dean of the Faculty of Arts, that the Horwood Language Centre of the University of Melbourne has decided to include Esperanto in the range of languages to be offered in the 1988 Summer School.

The United Nations Ass. of Australia supports the study of Esperanto as recommended by UNESCO Resolution 11.11 of 8th Nov. 1985.

AŬSTRALIA REGISTRARO DANKAS A.E.A.

Post la fino de la Internacia Jaro de la Paco (1986) la Prezidanto de A.E.A. sendis raporton al la Departamento pri Eksterlandaj Aferoj pri la agado de la Asocio dum la jaro. Li substrekis la enketon ĉe aliaj Landaj Asocioj pri la valoro de Esperanto por la paco, la 25-an Kongreson en Perto, kiu pritraktis tiun temon, la partoprenon de aŭstraliaj Esperantistoj en la Universala Kongreso en Pekino, kaj la kunvenojn en Perto, Melburno, Kanbero, Sidnejo, Armidalo kaj Brisbano kun Yosimi Umeda, kies vojaĝo al Aŭstralio estis parte subvenciita de la Aŭstralia Registaro.

La Sekretariato por la I.J.P. en la Departamento pri Eksterlandaj Aferoj kaj Komerco skribis, la 25-an de aŭgusto, leteron al S-ro Harry, agnoskante, ke la subvencio estis elpezita laŭ la celoj de la projekto. Monica Hart aldonis: "Thank you for your valuable contribution to the International Year of Peace program in Australia".

"We wish you continuing success in your program of activities directed towards the promotion and maintenance of a more peaceful world."

(Ni dankas vin pro via valora kontribuo al la programo de la Internacia Jaro de la Paco en Aŭstralio. Ni deziras al vi daŭran sukceson en via programo de agado celanta la antaŭenigon kaj konservadon de pli paca mondo.)

KIU POVOS HELPI?

Nia membro Joyce Turner (19 Wandal Rd., Rockhampton, Qld., 4700) ricevis leteron de ĉina esperantisto, kiu ŝajne intermiksas ŝin kun alia aŭstralia esperantistino. Se iu sinjorino/fraŭlino legos la sekvontan leteron kaj rememoros la ĉinan sinjoron, bonvole skribu al F-ino Turner, kiu sendos al vi la leteron kaj foton de la ĉina esperantisto:

"Kara fraŭlino,

Estis ĝojinde, ke mi povis konatiĝi kun vi en Pekino, dum la 71-a U.K. Ĉu vi memoras, ke vi kaj 2 sinjoroj eniris mangejon por mangi laŭ ĉina stilo? Mi bone memoras, ke mi ludis rolon kiel interpretisto inter vi kaj la kelnero. Antaŭ la manĝado ni varme interparolis en nia lingvo. Se mi ne eraras, vi laboras en eduka oficejo. Mi klare memoras, ke antaŭ nia disigo, vi donacis al mi libron kun via manuskribo, entute 3 paĝoj de nete skribita Esperanto."

Laŭ la kongreslibro la nomo de la sinjoro estas Liu Wei-Zhuang kaj lia kongres-numero 1822. Se vi memoras tiun renkontigon, nepre kontaktu F-inon Joyce Turner.



• **MELBURNO:** La Esperanto-Federacio de Viktorio ricevis kuraĝigajn respondojn al intervjuo, kiun ĝia informoficisto, Gerald Tумman, donis en la kadro de disaŭdigo ĉe Radiostacio 3 LO, je jaŭdo. 2-a de julio. Entute venis 29 informpetoj pri Esperanto — 26 venis de individuoj kaj 3 de grupoj aŭ lernejoj, kiuj petis preleganton pri Esperanto. Informpetoj venis eĉ el Castlemaine, Mt. Macedon kaj Eildon. Kelkaj informpetantoj jam aĉetis lernolibrojn kaj tri studentoj aliĝis al klaso de "Asocio por Plenaĝa Edukado".

—RUTH TUMMAN.

"Vizito al Norda Tajlando" estis la temo de lumbildprelego de Marcel Leereveld (15/6). Li parolis pri 3 diversaj regionoj kaj la loĝantoj de tiuj regionoj kaj liaj bildoj inkludis multajn

belajn templojn, sed ankaŭ aliajn iom ruinajn.

"Origino de la Universo" estis la titolo de videobendo kun spektakla kaj informa enhavo, kiun Errol Chick prezentis je 6-a de julio.

La 3-an de aŭgusto Marcel Leereveld gvidis nin al Bangkok, ĉefurbo de Tajlando. Denove ni vidis multajn templojn kiel ankaŭ modernajn konstruaĵojn kaj kontrastajn domaĉarojn. Li ankaŭ montris bildojn pri kanal-ekskurso kaj aspektojn pri la homa vivo sur la akvo.

Je la okazo de "jubilea" 30-jara datreveno, S-ino Fay Koppel memorigis pri "Ekskurso de 3 Esperantistoj" al la neĝregiono.

• **KANBERO:** La dana esperantisto Hans Sonne denove vizitis nin. La 5-an de julio li prelegis kun diapozitivoj kaj sonbendoj de la Finna-Aŭstralia Klubo. Li menciis sian uzon de Esperanto kaj disdonis flugfoliojn, kiuj informis pri Esperanto.

La 8-a Tutmonda Kongreso de "Aplifata Lingvistiko" okazis en Sidnejo (16-21 aug.) kaj la organizantoj akceptis referaton de Ralph Harry pri "La Evoluo de Lingvo por Internacia Juro — la ŝerto de Esperanto". La Internacia Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj okazigos tutmondan kongreson en Kanbero en januaro, 1988. S-ro R. Harry prezentos referaĵon pri la "Avantaĝoj kaj problemoj de la instruado de la Internacia Lingvo".

La vojaĝanta ekspozicio de A.E.A. estis prezentita en la biblioteko de Woden kaj migris al la biblioteko en Kingston.

Kunvenoj de la klubo okazas ĉiumerkrede en la "Migrant Resource Centre".

Raporto pri jubileo de Esperanto aperis la 26-an de julio en "Canberra Times".

• **SIDNEJO:** La 8-an de junio Brian Currie gvidis nin en diskuto "Ĉu la Esperanto-Lingvo estas 'seksisma'?" Lia prelego kaŭzis vigan diskuton.

Joan Green, 22/6, parolis pri la aŭtoro Raymond Schwartz. Ŝi legis el faj verkoj por montri la genion de tiu fama verkisto.

El ĵurnaloj, 29/6, M. Chaldecott legis kelkajn ŝercojn el "Korea Espero". Joan Green legis el "Popola Ĉinio" pri vartistoj kaj papertranĉaĵoj kaj Brian

Currie prezentis eron el Revuo pri Komputiloj.

Ronddiskuto, 6/7, pritraktis nian dependecon je Usono en Televid-programoj, kutimoj, mangaĵoj kaj pri la trouzata vorto "Biliono", kiu povus esti aŭ miloj aŭ milionoj de milionoj.

—MARGARET CHALDECOTT.

• **TOOWOOMBA:** La Konversacia Rondo kun Carson Thomas (27/6) ege plaĉis al ĉiuj. La legado de Carson pri misaventuro de Pu, "la urso de eta cerbo", elvokis multe da diskuto. Poste, ĉiuj diskutis prov-demandaron rilate al skriba elementa ekzameno. Sandra Connors gvidos la venontan konversacian rondon pri la temo "Dorlotbestoj".

• **BRISBANO:** Estis nia plezuro gastigi en nia klubejo du vizitantojn el Japanio. Ges-rojn Masaki kaj Hiroko KATAYAMA el Toyohashi, la 1-an de Septembro. La nova geedza paro ankaŭ vizitis al la Ormarbordo kaj al la Safftondeja Turistloko ĉe Jondaryan, kie ĉiujara festivalo okazas (Ekskurso 4 en via Kongresa broŝuro). Alan Grant revenis antaŭ nelonge de Varsovio, kie li partoprenis la plensukcesan U/Kongreson; li aranĝos vesperon por prezenti vidbendojn pri aspektoj de tiu kongreso. Intertempe instruado je kvar niveloj daŭras dum klubkunveno.

—RAY ROSS.

26-A AŬSTRALIA/4-A PACIFICA ESPERANTO-KONGRESOJ

L.K.K. jam elsendis pli ol mil aliĝilojn al diversaj landoj, grupoj kaj individuoj; bonvolu noti la **datsangon al 11-a ĝis 20-a de Septembro**. Ĉiu grupo en Aŭstralio ricevis kopiojn de du kantoj, kaj muziko kaj vortoj, cele al tut-aŭstralia fiore por la inaŭguro ceremonio: la du kantoj estas 'Himno de la Junularo' kaj 'La Lando-Aŭstralio'. La unua konformas al la kongresa temo, 'Esperanto por la Junularo' kaj la dua komprenebla omaĝas al la memoro de Fritz Mueller-Soraŭ.

2-a Listo de Aliĝintoj:

9. William Vathis (Washington, U.S.A.)
10. Winsome Greenhough (St. Lucia)
11. Ralph Harry (Canberra)
12. Terri Metherall (Newcastle)

—RAY ROSS.

EKZAMENOJ

A.E.A. gratulas la jenajn sukcesojn:
 Gajnis la Elementan Diplomon:
 S-ino Kay Howe, Yeppoon, Kvins-
 lando, kun Honoro;
 S-ino Rita Dunbar, Sidnejo;

S-ino Aulsebrook, Forster, NSK, kun
 Honoro;
 S-ro Hugh Malcolm, Kardinya, W.A.,
 kun Honoro.
 Gajnis la Superan Diplomon:
 S-ro Will Firth, Kanbero, kun Honoro.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO**38. ROGER SPRINGER****Broadcaster and Bagpiper.**

Roger considers that he was an Esperantist before he knew that Esperanto existed. As long as he can remember, he believed that there should be a world language taught to everyone. At first he thought that English should be that language. Later, he toyed with the idea of creating a simple world language but found himself unequal to the task. Much later, he found that Zamenhof had beaten him to it, so, around 1960, he began learning Esperanto.

By this time, Roger, a 3rd-generation Australian, had completed his schooling (Leaving Certificate 1948), gained a Land and Engineering Survey Draftsman Certificate and a Diploma of Public Administration, and had gained a wife. (There were 4 children, but the marriage ended after 23 years. His ex-wife, with whom he was then on very friendly terms, died of cancer 2 years ago.)

At first, learning was by means of "Teach Yourself Esperanto". Roger taught himself, mainly, by reading in the tram en route to work. Then he joined the class of Fritz Mueller-Sorau in Ashfield. Meanwhile he read his way through the library in Esperanto House. Since then he has had long periods — even years — during which he didn't even touch the language but he always returned to the movement.

The Government decided to decentralise some of its administration, so Roger was transferred to Bathurst where he became Chief Cartographer (Mapper).

A "displaced person" must create a new way of life and new hobbies. Some of his co-workers had taken up program production for the local F.M. radio, so, joining them, he introduced Esperanto. This "small step" has been Roger's contribution to Esperanto! In many parts of Australia people will tell you that they have never heard of Esperanto, but not those living in the Bathurst-Orange region. Roger's programs were on the air twice a week for 7 years in Bathurst, and for 3 years in Manly. These combined instruction and entertainment — witty bilingual plays mainly, but interspersed with high-quality musical items by Esperantists known world-wide.

Also, Roger designed several posters for Esperanto, and, since his son is a printer, he distributed 10,000 copies.

Now, in retirement, he lacks time to continue the work. Both the radio managers want the work to continue; the tapes are still available. Roger's fervent hope is that someone will "step into the breach" to make sure that the programs do not "end in a whimper".

So much for Roger the Esperantist: now for Roger the piper. In 1948 he was just a little too young to join the Citizen Military Forces but he used a little bit of imagination in over-stating his age, so he enlisted — as a learner in the bagpipes section. He still is a piper in the Army Reserve — where he has used the same imagination in understating his age a little. He has played in Jakarta, Singapore, Hobart, etc. — even before Royalty. His band has appeared on TV.

More importantly, bedecked in full Scottish regalia, he has appeared and still appears before Esperanto audiences in Congresses and in Summer Schools. An eye-and-ear-catching entertainer!

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 244 (324)

MELBURNO

Septembro-Oktobro, 1987

100 JAROJ DE ESPERANTAJ ELDONAĴOJ

Ekspozicio en Nacia Biblioteko de Aŭstralio

Miloj da vizitantoj al la grandega Nacia Biblioteko de Aŭstralio en Kanbero en Oktobro kaj Novembro vidis ekspozicion de libroj, periodaĵoj kaj broŝuroj en la internacia lingvo.

La dek vitrinoj situas en la grandioza vestiblo de la Biblioteko, sub la 16 vitraloj, po 3 metrojn altaj, de la artisto Leonard French (len'd frenĉ) kaj la tri murtapiŝoj, po 5 metrojn altaj, de la franca artisto Mathieu Mategot, tekstitaj el aŭstralia lano en Aubusson (obuso) en Francio.

En ĉiu vitrino estas eleganta profesie desegnita etikedo kun priskribo de la fako: Originoj de Esperanto, Atingoj de Esperanto, Gravaj Libroj, Antologioj de Naciaj Literaturoj, Originala Esperanto-Literaturo, Esperantaj Periodaĵoj, Esperanto en Scienco, Esperanto por Vojaĝado, Esperanto en Aŭstralio, Esperanto en Kanbero.

Vizitantoj povas ricevi ekzempleron de 8-paĝa katalogo, kun verda ilustrita kovrilo, teksto de la Rezolucio de UNESKO en Soflo, listo de la aŭstraliaj patronoj por la Jubilea Jaro, listo de E-organizoj en Aŭstralio kaj listo de la elmontraĵoj, kune kun la teksto de la klarigaj etike-

doj. Haveblas ankaŭ "Ĝisdatigo" pri Esperanto.

Inaŭgurante la ekspozicion la 9-an de Oktobro, la Direktoro de la Biblioteko, S-ro Brian Yates, diris, ke la celoj de Esperanto kiel ilo de tutmonda informado konformas kun tiuj de la biblioteko, kiu enhavas pli ol 4,000,000 librojn, periodaĵojn, fotojn kaj desegnaĵojn.

Respondante, la Prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, S-ro Ralph Harry, substrekiis la atingojn de Esperanto en siaj unuaj cent jaroj. La libroj en la ekspozicio estas ne pri Esperanto sed verkita en tiu lingvo. Estas tre interesaj eroj, kiaj la unua artikolo en Esperanto pri Aŭstralio — raporto de la Melburna Pokalo — fruaj verkoj de George Collingridge — aŝiso de Alfred Agache, kiu gajnis trian premion por la plano de Kanbero — originalaj leteroj de D-ro Zamenhof. Sed plej interesa, diris S-ro Harry, estas la "Antologio de Originalaj Poemoj en Esperanto", la fina ruvo, ke Esperanto estas vivanta lingvo de internacia komunumo kun sia propra kulturo.

Partoprenis la inaŭguron 25 membroj de la Kanbera Klubo kaj amikoj.

—RALPH HARRY.

UNUA AZIA KONFERENCO DE U.E.A.

U.E.A. ricevis donacon de 30 milionoj da japanaj enoj (proks. 300,000 aŭstraliajn dolarojn) por plivigli la laboron por Esperanto en Azio. U.E.A. petis sian vicprezidanton Yosimi Umeda proponi kiel plej bone uzi tiun malavaran donacon.

Tio donis instigon aranĝi la UNUAN AZIAN KONFERENCON de UEA kiu okazis en la kadro de la 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, la 28-an kaj 29-an de aŭgusto en Tokio.

Aŭstralion reprezentis s-ro Chris Dean (el Perto). Li raportis pri la ĉefaj laboroj de AEA dum la jubilea jaro, konsistantaj el diversaj projektoj de eldonado, konferencoj, kariljonludado, radijaj-televidaj aranĝoj. Li aparte invitis la ĉeestantajn delegitojn al la 4-a Tutpacifika E-Kongreso en Brisbano, en septembro, 1988.

S-ro Dai Songen prezentis la daŭran progreson de Esperanto en Ĉinio. S-ro Ma Young-Tae, Docento ĉe la Dankook Universitato en Seulo raportis progreson en la lastaj jaroj, precipe inter gejunuloj.

En la nomo de la Japana E-Instituto salutis la konferencon S-ro Osioka, kun mencio pri preteco de JEI je kunlaboro en la starigo de Azia Centro de UEA.

Prof. Wei Yuanshu, nome de la Ŝanhaja E-Asocio detale klarigis la historion de la ĉina E-movado. Li menciis la jam establigintan specialan unujaran intensivan kurson por instruistoj ĉe la Ŝanhaja Universitato de Fremlandaj Studoj.

S-ro Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, dum preskaŭ unuhora parolado, detale pritraktis diversajn aspektojn de la movado en Azio kaj montris ekzemplojn de la agadoj el la landoj, kie la movado estas ankoraŭ ne tiel progresinta por formi landan asocion, sed sufiĉe maturiganta por konvinki eksterstarantajn pri la rolo de Esperanto.

S-ro Umeda resumis la multajn ideojn de la konferencanoj, sed la ĉefa ideo estas la kreo de Azia centro de UEA, ekzemple en Ĉinio. Ĝis la efektigo de tiu projekto la adreso de s-ro Umeda servus kiel provizora Tokia Oficejo de UEA.

La 30-an de aŭgusto, post la fermo de la Japana Kongreso, ĉiuj partoprenintoj en la Azia Konferenco estis invitita al la Tokia Oficejo de UEA ĉe la adreso de s-ro Umeda. Dum du horoj pli ol 30 personoj ĝuis la inaŭguran festenon kun diversspecaj trinkaĵoj kaj frandaĵoj. Arda diskutado post-konferenca kaj gaja bablado plenigis la ĉambrojn de la Oficejo.

SVISA RADIO INTERNACIA

Tradicio estas valora. La Esperantofako de Svisa Radio Internacia fieras, ke ĝi en ĉi tiu vintro povas eniri jam sian 42-an jaron kaj ĝi ĝojas, ke ĝi disponas pri fidelaj kunlaborantoj, el kiuj D-ro Arthur Baur deĵoras jam pli ol 40 jarojn, dum Claude Gacond en 1988 povos festi la jubileon de 25 jaroj anau la mikrofono. La junan generacion reprezentas cand. phil. Andy Kunzli. Konstante kunlaboras ankaŭ la edzinoj de sinjoroj Baur kaj Gacond.

Niaj programhoroj feliĉe restas la samaj, en la frekvencoj de la transoceanaj elsendoj ĉiam necesigas kelkaj ŝanĝoj, kiujn ni petas atenti. Nia plej granda problemo estas la kaoso, kiu reagas en la mondo de la mallongaj ondoj kaj la daŭra plifortigo de diversaj grandpotencaj stacioj. Tio pli kaj pli igas

malfacila nian celon bone servi niajn aŭskultantojn. Ni rekomendas elprovi ĉiujn niajn elsendotempojn kaj frekvencojn, ĝis la plej bona estas trovita.

Ni admiras la persistemon kaj paciencon de niaj aŭskultantoj kaj ni estas tre dankemaj pri ĉiuj iliaj korespondadoj.

100 JAROJ DE ESPERANTO-KULTURO

En letero al la Kanbera Esperantoklubo Will Firth raportas:

"Mi skribas al vi el Zagrebo, ĉefurbo de la Kroatia Respubliko de Jugoslavio. Ĉi tie ĵus finiĝis per (ne-tro-solena) fermo la internacia manifestaĵo "100 jaroj de Esperanto-Kulturo", kiun ĉeestis ĉirkaŭ 300 partoprenantoj el 38 landoj, inkluzive de nemalmultaj afrikanoj.

"La manifestaĵo konsistis ĉefe el pup-teatraj prezentadoj de diverslandaj

grupoj (kaj plenkreskulaj kaj infana), kaj ŝajnas, ke ĉiuj homoj, kiuj teatraĵojn vidis, gajnis bonan impreson pri ili. Indas emfazi, ke puppetatro estas vigla kadra parto de nia propra E-kulturo, super ĉio ĉitie en Eŭropo.

"Mi ĉeestis ĉefe simpozion, kiun oni okazigis kadre de la festivala programo, kaj kiu titoliĝis "Lingvaj Problemoj en Internacia Komunikado". Mi trovis ĝin interesa kaj bone organizita. Inter deko da nrolandoj oni ankaŭ aŭskultis referaĵon de Ralph Harry "La Diplomatoj kaj Esperanto", kiu estis laŭlegita. Estis granda inspiro por mi, kiel relative nova esperantisto, sekvi la vortojn kaj pensojn de spertaj membroj de la movado, pri kiuj mi ĝis nun nur legis en la E-gazetaro."

LETERO AL LA REDAKCIO

Tre ŝokas min la ĉef-artikolo "Prizorgu nian insignon", fare de A. D. Cook, en "The Australian Esperantist", junio.

Tamen, ĝi efike elstarigas tion, kio estas, mia opinio, unu el la ĉef-problemoj de la nuna Esperanta movado. Tiu ĉi movado estis konceptita kaj elfarita sur la fundamento de "interna ideo", t.e. frateca komprenado kaj akcepto inter la popolo tutmonda. Iuj el niaj samideanoj ŝajne tion forgesis.

Kiel ni povas antaŭenigi la ideon pri la frateco de la homoj se ni "mordas kaj mangegas" unu la alian? Oni certe portas la verdan stelon por signifi, ke la portanto komprenas kaj deziras starigi la koncepton de dua lingvo tutmonda, tamen ne kiel rajtigilo por nepostulita ekzameno pri la kompetenteco de la portanto flue paroli Esperanton.

La grand-kora kreinto de Esperanto tute ne kondiĉis pri kiu rajtu uzi la lingvon, nek pri kiu celo oni ĝin uzu, kaj certe li ne limigis la uzadon al tiuj, kiuj povas (laŭ la juĝo de aliaj, eĉ se pli kompetentaj) juste trakti la lingvon.

Ĉu ni, en la movado, celas malkuraĝigi niajn novulojn per nia supera flueco kaj malutila juĝo pri iliaj infanecaj penoj? Se jes, A. D. Cook bonege faras.

La demando sin prezentas: Ĉu mi iam denove kuraĝos porti mian verdan stelon? Aŭ ĉu mi kalkulus, ke la inter-esperantistoj, kaj mia sekvanta klarigo pri la lingvo kaj ties celoj, estas sufiĉa kialo, ke mi defiu la malplezuron de mia samideano?

Kuraĝu, ĉiuj aliaj miaj samideanoj, portu la bravan stelon ĝis la tutmondo same faros. —AUDREY M. BRUTON.

—ooOoo—

—Depost mia edziĝo al Roza, mi iĝis bedaŭrinde reeligema!

—Strange, amiko. Sed kial?

—Mi jam kredas pri la infero.

(Hungara Vivo)

26-a AŬSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

11-a-20-a de septembro, 1988,
Brisbano.

S-ro Mike Ahern, Ministro pri Sano kaj Cirkaŭaĵo de Kvinslando, konsentis malfermi la kongreson, je lundo, 12-a de sept. en Brisbano.

3-a Listo de Aliĝintoj:

13. Margaret Chaldecott, Sydney
14. Mi Jishang, Ĉinio
15. Shiela Leah, Gunnedah
16. Bill Leah, Gunnedah
17. Kay Howe, Yeppoon
18. Kaj Andersen, Brisbane
19. Marj Ellyard, Canberra
20. Rita Aagaard, Auckland, N.Z.
21. Joyce Turner, Rockhampton
22. Elfriede Ernst, Belgium
23. Bob Felby, Adelaide
24. Audrey Felby, Adelaide
25. Dianne Lukes, Toowoomba
26. Sandra Connors, Toowoomba
27. Jean Lehane, Toowoomba

Statistiko: Kvinslando 12, N.S.K. 5, Viktorio 2, A.Ĉ.T. 2, Suda Aŭstralio 2, Nov-Zelando 1, Usono 1, Ĉinio 1, Belgio 1.



W• PERTO: Multaj Liganoj estis for de Perto lastatempe. Vera Payne havis la honoron esti la unua aŭstraliano kaj unua virino, kiu ricevis inviton instrui en la Somera Esperanto-Kursaro ĉe la San Francisko Ŝtata Universitato. Idyss kaj Tim Einihovici revenis de la jubilea kongreso en Varsovio. Chris Dean partoprenis en Tokio la Azian E-Kongreson. Val kaj Bill Graham revenis de longa vojaĝo tra Ĉinio, Tibeto, Rusujo kaj Suda Ameriko. Galina Sliwa estis for en Pollando.

Je la 4-a de oktobro pluraj membroj akceptis inviton de Debbie kaj Gerry Forte kaj paroprenis piknikon en ties bieno en Tannah Way. La vetero estis agrabla kaj ni ĝuis rigardi la sovaĝajn ĉi-rojn kaj la multajn fruktarbojn.

• **ADELAJDO:** De la 21a ĝis la 26-a de septembro Trevor Steele denove instruis Esperanton en la TAFE-Kolegio.

Estis entute 23 gelernantoj kaj la lingvonivelo estis tiom varia, ke necesis dividi ilin en du klasojn, komencantojn kaj progresinojn. Partoprenis la komecanta kurson 11 gelernantoj, dum 12 partoprenis tiun por la progresintoj.

Kiel pasintjare Trevor brile instruis. Ankaŭ la gelernantoj estis elstaraj. Unu el ili, sinjorino kaj komencanto, la unuan vesperon partoprenis la porkomecanta kurson, sed tiam tuj post la fino de ĝi, ŝi partoprenis ankaŭ la porprogresinta kurson.

—BOB FELBY.

• **MELBURNO:** Dum la vintra sezono nur malmultaj vizitas la lundajn kunvenojn de la Societo. Je la 5-a de oktobro Marcelo Leereveld prelegis pri Nepalo kaj ĝia ĉefurbo Katmandu. Li montris multajn templojn, publikajn konstruaĵojn, banejojn kaj malproksimajn montojn himalajajn. La parolado de Marcelo rememorigis pri multaj aferoj presitaj en la libro "Nepalo malfermas la pordon" de Tibor Sekelj. Marcelo ankaŭ priskribis renkontigon kun esperantisto en Katmandu, kiun Tibor Sekelj varbis al Esperanto kaj instruis.

• **MANLY:** La tria trimestro komenciĝis en la vespera lernejo la 19-an de oktobro kun la kutimaj 3 grupoj.

La multaj mondvojaĝantoj jam revenis: ses membroj, kiuj partoprenis en la kongreso en Varsovio, sep en la somerlernejo en Barlastono, Anglujo, kaj unu kiu ĉestis la jubilean Esperanto-konferencon en Graz, Aŭstrio. Ni antaŭguas bildojn kaj paroladojn pri iliaj travivaĵoj. Les Scott reprezentis Aŭstralio en la Komitato de UEA, Sylvia Burkitt donis la saluton por Aŭstralio en la Solena Malfermo de la kongreso kaj Irina Timonim salutis la Konferencon en Graz.

En Barlastono la Manly-anoj, kune kun 3 membroj el Sidnejo kaj unu el Adelaido, prezentis distran aŭstralian vesperon, aranĝitan de Marjorie Duncan. Ĝi estis granda sukceso. Nekutima ero estis poemo legita de la verkisto mem.

Rita Dunbar, kiu poste estis fiera ricevi gratulon de D-ro Marjorie Boulton. D-ro Boulton ankaŭ sendis komplimenton al nia skĉverekisto Helen Stone.

Dum oktobro, Robby Robertson parolis al "Uniting Church"-grupo en Pymble kaj vekis intereson inter la inteligentaj aŭskultantoj. Li ankaŭ estis intervjuita de ĵurnalisto de "Sydney Morning Herald" kaj poste aperis artikolo kun fotografajo.

La tuta klubo klopodas daŭrigi la laboron de Marjorie Duncan dum ŝia malsano. Ni ricevis bonan raporton de la kuracisto kaj esperas, ke ŝi tre baldaŭ resaniĝos. —EUNICE GRAHAM.

• **SIDNEJO:** La 24-an de aŭgusto ni bonvenigis japanan paron, Hiroko kaj Masaki Katayama. Je la aĝo de 28, li estas asistanta profesoro ĉe la Toyo-hashi Universitato de Teknologio. Kvankam ili geedziĝis en majo, nur en aŭgusto ili mielvojaĝis. Ili montris bildojn de la edziĝiesto, kiu estis luksa kaj multekosta afero.

La 7-an de septembro, Tom Elliott parolis pri la aŭtoro H. A. Luyken, verkisto de "Pro Istar". Krom la stilo de la aŭtoro, Tom tre ŝatas la fakton, ke Luyken tre profunde esploris la temon antaŭ ol li ekverkis.

Semajnon poste, D. Gould parolis pri la antaŭkongreso en suda Pollando. M. Chaldecott montris diapozitivojn pri araneo, kiu arigis insektojn kaj tenis ilin volvitaj en la araneaĵo ĝis ĝi bezonis manĝaĵon. —M. CHALDECOTT.

Gesinjoroj Enderby en Gresillon

De la 23-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto Dorothy kaj Kep Enderby ĉestis Esperanto-seminaron en la Kulturdomo "Kastelo Gresillon" en la valo Loire de Francio. Ĝi situas en bela regiono de fruktĝardenoj kaj kampoj de grajnoj. Ĉirkaŭ la kastelo estas vasta ĝardeno, lageto kun fiŝoj kaj banejo. La kursoj okazas en konstruaĵoj malantaŭ la kastelo, kie studentoj kaj instruistoj loĝas. Oni servas bonegajn kaj abundajn manĝojn en tre eleganta manĝoĉambro.

Ges-roj Enderby partoprenis klason je la 2-a nivelo. La lecionoj komenciĝis matene je la naŭa kaj duono kaj daŭris ĝis la dekdua, kun paŭzo por kafe aŭ teo. Posttagmeze oni studis dum unu horo kaj duono. Estis bonega okazo por studi la gramatikon kaj paroli kun homoj de al'iaj landoj en bela kaj trankvila ĉirkaujaĵo.

• **TOOWOOMBA:** Granda grupo da esperantistoj, inter ili ankaŭ kelkaj el Brisbano, kunvenis, 25-an de julio, en restoracio MARS por kune festi la inaŭguron de la Universala Kongreso en fora Varsovio.

Du tagojn poste kunvenis la Konverŝacia Rondo. Sandra Connors parolis pri "Dorlotbestoj".

EL LA FEDERACIOJ

• **VIKTORIO:** La jara Seminario de la Federacio, kiu okazis je la 12-a de septembro en la Kvakera Domo en Toorak, kaj kiu allogis entute 31 personojn, komenciĝis akurate je la 9-a. Longdistancaj anoj Ted O'Brien kaj Cliff Hall, el Geelong, estis inter la unuaj alvenintoj por ĝui frumatenan refreŝaĵon kun la melburnaj anoj.

La programo komenciĝis kiel kutime per "studrondo" gvidata de s-ino Fay Koppel. Sekvis aro da diversaj informaj paroladetoj. Dua "Lingva Sesio" de S-ino Koppel sekvis la lunĉpaŭzon. La Waverley-Grupo ravis per 3 kantoj. Don Pescod kaj Val Fotheringham prezentis amuzan ŝkeĉon, S-ro Kanaĉki detale parolis pri "Esperanto en Radio", Nick Nicholas kaj John Coogans prezentis d'alogan poemon, kiun Nick tradukis el la greka lingvo. Fine Jack Fallu informis pri la nomoj de multaj insektoj.

• **KVINSLANDO:** La 2-a konferenco de la Esperanto-Federacio de Kvinslando okazis ĉe Redcliffe, la 10-11an de oktobro. Entute 32 anoj partoprenis kaj kelkaj ĝeamikoj/ vizitantoj sporade ĉeestis dum la semajnfino.

Kiel kutime okazis la General-Kunveno post la Malfermo. Raportis pri grupaferoj la jenaj: Tom O'Grady (Brisbano), Jean Lehane (Toowoomba), Decia Shonhan (St. Lucia), Ruth Morrison (Noosa). Telefona raportis Jim Dimo (Gatton), Kevin O'Brien (Ormarbordo), Jennifer Dimo (Skoltoj); perletere Joyce Turner (Emu Park).

Pri la venonta Kongreso en Brisbano raportis Ray Ross. Pro diversaj kialoj, Jennifer Dimo raportis, ke Esperanto-Budo bedaŭrinde ne estos starigata ĉe la Mondĉamboreo je la fino de la jaro. Kasista raporto montras kontentigan ŝtaton. Estis konfirmite, ke nur unu konferenco okazos en 1988, ĉe Bundaberg, do la Jarkunveno kaj Ĝenerala kunveno por 1988 okazos dum la Kongreso en la kadro de Kunsidoj de Fakorganizoj,

la 13-an de septembro, 1988, je la 3-a p.t.m.

Nova estraro por 1988 elektigis: Patrono Hon. Mike Ahern; Prez. Ray Ross; Vicprez: Tom O'Grady; Sekr. Kay Andersen; Kas. Merv Schramm; Publikaj Rilatoj: Peter Keates; Red. La Voĉo: Ray Ross; Komitato: Gaye Phillips, Jim Dimo, Decia Shonhan, Jean Lehane, Joyce Turner, Kevin O'Brien. La Prezidanto dankis al ĉiuj estraranoj kaj membroj, kiuj subtenis la Federacion dum 1987. Estis 102 anoj dum la jaro.

Sabatvespere okazis la kutima vespermanĝo, kiun partoprenis 30 anoj; poste okazis distra programo al kiuj kontribuis: Brisbana Kantgrupo, Triopo el Brisbano Gaye Phillips, Kaj Andersen kaj Peggy Ross; ŝercrakontis Tom O'Grady; Jean Lehane parolis pri raporto de Prof. Glossop, Universitato de Suda Ilinoio, kiu temis pri "Infano al Infano Korespondado" sub la kadro de "Mond-Konsilantaro Pri Talentaj Infanoj"; Stan Stokes kaj Annie Spencer deklamis poezion; Komunkantaĉo kaj Boŝdancado konkludis la programon. Estis plezuro bonvenigi 3 malnovajn anojn de la antaŭa Redcliffe E-grupo al la konferenco, Ges-rojn Jessie kaj Vic Clarke kaj Veronica Clark.

Dimanĉe, ĉ. 20 anoj ĝuis viziton al Gayunda-Memoraĵo kaj Sipperejo ĉe Woody Point; al Sutton House por teapaŭzo, kie EFK naskiĝis en 1971; al memoraĵo Oxley/Flinders; al Aera/Mara Sav-Establajo; al luncĉo ĉe Hotelo 'Captain Cook'. Poste anoj vizitis la Esperanto-Straton, Redcliffe Muzeon kaj Komunuman Centron. Peter Keates respondis pri ĉi tiu interesa kaj pleninforma programo. —RAY ROSS.

KAY MORRISON

Je la 14a de septembro, okazis memoriga diservo en la preĝejo de St. John. Dee Why, por Kay Morrison, kiu mortis la 6an de septembro.

Multaj parencoj kaj ĝeamikoj de Kay — inkluzive de proksimume 15 Esperantistoj — kunvenis en la eta preĝejo por fari la lastajn honorojn al nia amata Kav.

La sincera parolado de Pastro Harvey Perkins, kiu gvidis la diservon, kreis etoson de trankvileco, kaj la kvieta voĉo de Peg Ford-Lewis, kiu legis Esperantlingve la 23an Psalm, multe kontribuis al tiu etoso.

La pastro parolis pri la multaj kaj diversaj aferoj al kiuj Kay, dum sia

longa, aktiva vivo, tiel volonte kaj sindone etendis helpantan manon. La pastro menciis precipe ŝian viglan interesecon rilate al la problemoj de emeritoj kaj senlaboraj junuloj. Tiel, ŝia helpo inkludis la tutan gamon de domo.

Ŝia intereso pri Esperanto komenciĝis antaŭ multaj jaroj, kaj neniam senvigliĝis; estas multaj Esperantistoj kiuj gajnis inspiron pro ŝia instruado kaj konsilo. Ni memoros kaj honoros ŝin kiel grandan subtenanton de la movado.

—HELEN STONE.

Mortis Ralph Dearnley

La Esperanto-movado de Nov-Zelando suferis seriozan perdon pro la morto de ĝia vic-prezidanto Ralph Dearnley, kiu mortis en Varsovio post la Universala Kongreso.

Partoprenintoj de la 1-a Pacifika Kongreso bone memoras lin. Li estis la t.n. "Kviz-Reĝo" de Nov-Zelando kaj ofte lukta kontraŭ la aŭstralia "Kviz-Reĝo" Barry Jones, nun ministro de la aŭstralia registaro. Li estis esperantisto dum pli ol 50 jaroj kaj estis Prezidanto de la Wellington Esperanto-Klubo. Li estis UEA - Fakdelegito por Terkulturado. Ĉiam kompleza, li plenumis multajn taskojn en la Nov-Zelanda movado.

NOVA FAKA SOCIETO

En aprilo 1987 proksimume cent personoj ĉeestis kunvenon en Abergavenny, Kimrujo, por starigi Societon por Studo pri la Historio de Esperanto. La celo de la nove fondita societo estas la studo de la historio de Esperanto kaj ĝia parolantaro. Plua celo estas la eldonado de taŭga kaj regula revuo **Historiaj Studoj** pri tiu temo.

Dum la fonda kunveno oni diris, ke Esperanto atingis jarcenton de sia ekzistado dank'al la laboro de diversaj ordinaraj kaj neordinaraj homoj, pri kiuj ni ĝenerale scias malmulte.

En arĥivoj, bibliotekoj kaj privataj domoj tra la tuta mondo kuŝas kvanto da materialo uzinda por pli bone koni la originojn de la esperantistaro. La nova societo celas konstati, kie troviĝas taglibroj, protokollibroj kaj privataj leteroj de la frua epoko, kiuj helpas en la dokumentado de la historio de la lingvo. Kvankam en Britujo okazis la fonda kunveno, la nova societo ne pensas pri Esperanto nur en nacia kadro. Male, la ĵus elektita komitato forte deziras kunlabori kun historiamantoj en aliaj landoj.

Elektiĝis al la komitato de la societo Amador Diaz (Prezidanto), Hilary Chapman (Sekretario), Kate Hall (Redaktoro de **Historiaj Studoj**), Eric Fowden (Kasisto), Marjorie Boulton, kaj Stanley Nisbet. (Adreso de la Sekretario: **Bodfeio, 34 Llwyn Estyn, Deganwy, Conwy, Gwynedd LL31 9RA, Britujo.**)

FORM FOR BEQUESTS

We receive, from time to time, enquiries as to the correct form to be used in wills for bequests to the Association.

Our legal advisers inform us that, since the Association is incorporated the following are the essential words:

"I bequeath to the Australian Esperanto Association the sum of \$ (for the purpose of)"

Of course, instead of a sum of money, some specific property, such as a house, stocks, or library could be specified.

Some members, to avoid erosion of the value of the bequest by inflation, have bequeathed a set proportion of their total estate, say one third or one tenth, to the Association.

While many Esperantists prefer to give generously during their lifetime and not to accumulate capital, bequests are an important means of developing the movement. They form part of the capital of the Association, administered by trustees, with the income expended in accordance with the wishes of the testator. I shall be very glad to secure professional advice for any member or friend who wishes to draft special provisions.

—RALPH HARRY, President.

RECENZOJ

ĈU RAKONTI NOVELE? Ĉu vi ĝuas legi kriminalromanojn? Se jes, kaj vi ankoraŭ ne konatiĝis kun la "Ĉu . . ." — serio de Johan Valano, tro longe mankis al vi vera trezoro de tia malstreĉa legaĵo, kun atentotenaj intrigoj kaj sukcese klarigaj esploroj fare de profesie lerta kaj simpatia detektivo J'ano Karal, ofte helpata de psikologie sperta edzino Goja.

Tute egalas ĉu vi celas pli vori jam konatan frandaĵon aŭ nur prove manĝeti novan, jen libro por vi, verkaro, pri kies titolo "**Ĉu rakonti novele?**" vi certe respondos jese, fasko da detektivaj

rakontoj tre variaj, ĉiuj legeblaj en mal-longa tempospaco, des pli pro ties tene-gaj temoj. Krome, ĉio prezentigas per la kutime sendifekta, bonstila lingvaĵo en forte bindita, bone presita volumo en kiu, tra la tuta enhavo, vidiĝas nur du preseraroj (paĝo 50, linio 2 esti(s) kaj paĝo 55, linio 16 restadpermesa (. . . permeso).

Ne prokrastu! Mendu tuj vian ekzem-pleron ĉe A.E.A. Libroservo. La prezo de la libro estas 370 belgaj frankoj (ĉ. 20 guldenoj). —F. KOPPEL.

KIAMANIERE DISTINGI LA FUNGOJN ('Come distinguere i funghi') de Ing. Mario Simondetti, Eldonejo Gabrielli, Av. Daumesnil 166, F-75012 Paris. Prezo: 42 francaj Frankoj (c. 15 guldenoj).

Fungoj — Agarikoj — ŝajne estas nutraĵo, kiun oni aŭ ŝategas aŭ tute ne manĝas. Le temo tamen, estas unu, pri kiu la atento povas esti multflanka. Se la interesiĝo estas nur gastronomia por sendanĝere maĉi kaj engluti, se ĝo pri piknikekscursaj serĉoj kaj rikolto, por senerare rekoni, aŭ se sin trudas emo al scienca studado aŭ kultivado de tiuj neordinaraj plantoj, nepre necesas kaj egale utilos la jena informoplena volumo.

Ke la forte bindita, bone presita verko, kies alloga kovraĵo enfermas klarigan enkondukon, "Gravega Averti"n, priskribojn pri multaj specioj kaj konsilon pri manĝado, temas plejparte pri fungoj eŭropaj neniel deprenas de ĝia utilo, kiu ĉes pli grandigas por tiuj, kiuj aŭ konas aŭ studas la italan lingvon, ĉar ĉio prezentigas paralele dulingve. Krome troviĝas kelkaj paĝoj da ilustraĵoj por helpi distingon.

Oni rimarkos en la Esperanto kel-kajn nerekomendindajn esprimojn:

P. 8, 1.2: "popersone" — "por (unu) persono";

P. 8, 1.14: "tion kiu" — "tion kio";

P. 10, 1.4: ŝanĝas — "ŝanĝiĝas";

P. 10, 1.10: "pokvalite" — laŭkvalite";

P. 10, 1.15: "speco" — "specioj";

P. 10, 1.17: "specojn" — "speciojn".

Mendu ĉe: A.E.A. Libro-Servo.

—F. KOPPEL.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$6,057
Jack Walters, Canberra	10
S-ino E. Pianta, Perth	15
S-ino M. Chaldecott, Sydney	10
S-ino M. Miljons, Melbourne	10
Mrs. M. Duncan, Manly	100
S-ino Jessie Clarke, Brisbane	2
Dr. J. Walters, Canberra	35
South Australian E-Society	200
Dr. P. Ellyard, Adelaide	100
Armada Summer School	50
S-ino P. Anson, Canberra	10
Glen Bowditch, N.S.W.	10
Dr. J. Walters, Canberra	5
Ges-roj M. Leereveld, Melbourne	20
S-ino Toth, Melbourne	10
S-ro R. Alvaro, Perth	50
"Sciencisto"	10
S-ino Elsie Maddern, Morwell, V.	30
Kitty The, Melbourne	30
S-ro Evon Arthur, N.S.W.	20
S-ino Norma Walter, Victoria	20
S-ro Vlado Kosef, Cobar, N.S.W.	50
Ges. W. Graham, Perth	20

\$6,874

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1987

Antaŭe raportita	\$290
S-ino E. Pianta, Perth	10
Len Eddington, Perth	10
S-ino M. Chaldecott, Sydney	10
"Anonima", Canberra	10
S-ino M. Miljons, Melbourne	10
Brig. I. Gale, Melbourne	5
S-ino M. Duncan, Manly	20
S-ino G. Stanway, Creswick, Vic.	5
S-ro W. Harvey, Terrigal, N.S.W.	5
Ges. W. Leereveld, Melbourne	20
S-ro F. McDonnell, New Guinea	25
S-ino May Frogley, Melbourne	4
"Sciencisto"	10
S-ro Evon Arthur, N.S.W.	10
Ges-roj W. Graham, Perth	20

\$464

—ooOoo—

—"Kelnero! Bonvolu porti unu bieron!"

—"Ĉu elason, sinjoro, aŭ kruĉon?"

—"Barelon! Mi ne volas ĉiuminute ree mendi." (Hung. Vivo)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

39. JACK AND IVY FALLU

"One is nearer God's Heart in a garden . . ."

The Depression's ill wind blew Jack some good. He was unemployed in 1931, so instead of remaining a shop assistant, he was blown by circumstances into a new career — market gardening. He was used to hard work — his father had died when he was 6. He rented a block of land and began the large-scale cultivation of gladioli — selling blooms as well as bulbs. A risky, but eventually a most successful venture. He cross-pollinated different varieties and sold gladiolus seed which he advertised in a gardening magazine and received overseas orders from as far away as Latvia. The business grew and grew until the stock of bulbs grew too great for the site, so, at the request of his Banana-land uncle, he shipped 10,000 bulbs north and began his new enterprise on 34 acres in Rochedale. Having worked his way through the "growing pains" of the first few years, he built up his stock to 168 varieties and won many first prizes at the local shows including the champion bloom (all flowers) at Mt. Gravatt.

When Japan entered the war, Jack was not deemed to be a farmer so was inducted into the Army and joined the A.I.F. A friend took over his stock and equipment.

In 1944 Jack married Ivy, a Melbourne girl, so decided to remain in Melbourne. When war ended, he became manager of a flower farm in an outer Melbourne suburb, but after a few years became a postman, so flower growing became a hobby rather than a livelihood.

About 6 weeks after his "retirement" in 1972, Jack took over the job of despatching the A.E. magazine. He had commenced learning Esperanto in 1968, mainly because Ivy intended to go to the Perth Congress in 1970 and he wanted to be involved also. Encouraged by their understanding of much of our language during the Australian Congress, Jack and Ivy braved an overseas trip, visiting Kastelo Gresillon in France and taking part in the Friis course in Elsinore, Denmark, on the occasion of S-ro Friis' 50th anniversary as Head of the International Summer School.

In 1978, by now feeling at home in Esperanto, Jack was among the 4,414 who attended the Congress in Varna, Bulgaria. For some years, Jack has been corresponding with a Czech Esperantist. Now, for the first time, they met. After the Congress, he, Australian and his friend travelled together and stayed happily together, talking only Esperanto, for a week in Czechoslovakia. He moved on to Vienna, where his host, another Esperanto friend, induced Jack to make a short-wave broadcast so he had the honour and pleasure of speaking in Esperanto on Radio Vienna. Later, he stayed at an Esperantist's flat in Amsterdam and met many local "samideanoj" at a cafe for a very interesting evening.

As you can see, the Fallus have gained much in social contact and experience through Esperanto. Reciprocally, they have given much to the movement in long and devoted service. Jack was Secretary of A.E.A. during 1980 and 81 whilst Ivy was Treasurer. Ivy, who has an Honours Supera Diploma, was "Libro-Peranto" from 1967 to 1970. He for many years has been the President of the Esperanto Federation of Victoria, yet he happily fulfils the routine tasks such as sending out this gazette, and enclosing reminder notices where necessary. She was, for 2 years, Secretary of the Esperanto Federation of Victoria. Closer to home, Jack was, until this year, President of the Oakleigh group whilst Ivy has been Secretary and/or Libro-Peranto. Even closer to home, Jack and Ivy hold the meetings of the Oakleigh Group at their place.

—ARTHUR COCKING.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 245 (325)

MELBURNO

Novembro-December, 1987

ADIAŬA MESAĜO

RALPH HARRY EMERITIGAS

Karaj Amikoj,

Kutime en ĉi tiu sezono mi sendas Kristnaskajn Salutojn kaj bondezirojn por la Nova Jaro. Ankaŭ en 1987 mi tion faras.

Ĝi estis tre speciala jaro — la Cent-jara Jubileo de Esperanto, kaj mi gratulas kaj dankas ĉiujn, kiuj speciale klopodis por informi Aŭstralion pri la signifo de la Jubileo. Pri la "grandaj" eventoj oni jam legis en la paĝoj de "The Australian Esperantist". Aliaj raportoj aperis en la gazetoj kaj bultenoj de lokaj organizoj. La Komisiito, Trevor Steele, preparas kunordigitan raporton.

1988 estos ankaŭ gravega jaro — la jaro de la Kvara Pacifika Kongreso en Brisbano. Espereble la sperto de tiuj, kiuj vojaĝis al Varsovio, kaj aliaj jubileaj manifestacioj, kaj la informado en nia lando, certigos sukcesegan kongreson kaj progreson al nia celo.

Bedaŭrinde, pro la malbona stato de miaj okuloj, mi ne povas daŭrigi mian laboradon kiel Prezidanto, kaj devas tuj transdoni miajn respondecojn al la

Estrarar. Sed mi ĝojas, ke ni jam plenumis la ĉefajn projektojn, pri kiuj mi agadis dum la Jubileo. Mi petas al ĉiuj subteni la Vicprezidantojn kaj Komisiitojn same kiel vi subtenis min. Bonvolu sendi viajn proponojn kaj kontribuojn al ili:

- rilate la Kongreson al Ray Ross
- rilate la Instruadon kaj Informadon al Vera Payne
- rilate la Financojn al Owen Loneragan
- rilate la Organizadon kaj Administradon al Marj Ellyard
- rilate la Ekzamenojn al Trevor Steele
- rilate la Antologion al Alan Towsey.

Kompreneble mi restas preta helpi, laŭ mia kapablo, kaj klarigi pri la stato de iu afero, sed mi preferus, ke oni skribu al Marj, kiu povos konsulti min telefone. Mi transdonos al ŝi la esencan arhivon.

Sincere,

RALPH HARRY.

EKZAMENA KOMISIONO

La membroj de la Ekzamena Komisiono, kun la aprobo de la Estraro de A.E.A., invitis **D-ron Donald R. Broadribb**, kiu naskiĝis en la jaro 1933 kaj Esperantistiĝis en 1948, partopreni en la laborado de la Komisiono.

D-ro Broadribb eldonis en 1957, kun la helpe de P. E. Nace, suplementon al la Esperanta-Angla Vortaro de Millidge. En 1973, kiam li loĝis en Svislando, li fariĝis membro de la Akademio de Esperanto (ĝis 1982), kiel reprezentanto de la "angla komplekso" (Usono).

Transloĝinte en Okcident-Aŭstralio, D-ro Broadribb faris gravan kontribuon al la studado de Esperanto per sia verkado en gazetoj kaj revuoj. Li kontribuis spertajn kaj elegantajn recenzojn al "Australain Esperantist".

Dum la pasintaj du jaroj li estis redaktoro de la "Nigra Cigno" en kiu aperis notindaj prilingvaj rubrikoj.

D-ro Broadribb kontribuis ankaŭ tradukojn por la Aŭstralia Antologio, kaj servas en la Lingva Komitato, kiu kontrolas la lingvon de ĉiuj tradukoj.

Ĉu estas malmulte da periodaĵoj en Esperantujo?

Bernard Golden

Oni kutime aŭdas la kontraŭon: ekzistas superfluo da revuoj, gazetoj kaj bultenoj, do estas necese bremsi la papersvarmon. Mi ne konsentas. Antaŭ nelonge la redaktoro de periodaĵo en fora lando bedaŭris, ke unu el miaj artikoloj, kiun li recenzis, "estas kaŝita en preskaŭ nekonata organo", kaj li aldonis: "Ĝi meritis aperi en 'Esperanto' de U.E.A.". Jes ja, estas facile samonini kun tiu sinjoro, sed la reala situacio de la gazetaro en Esperantujo ne permesas tion. Mi ne dubas, ke troviĝas multaj legindaj verkoj, kiuj restas nekonataj por la plejmulto da esperantistoj, ĉar ili aperas en lokaj publikaĵoj kun tre limigita (t.e. ne-internacia) cirkulado, aŭ en specialigitaj revuoj, kiujn la ordinara esperantisto ne abonas. Ekzemploj de la unua speco estas landaj organoj kiel **The Australian Esperantist** kaj **Kataluna Esperantisto**; en la dua kategorio troviĝas la feminisma revueto **Sekso kaj Egaleco**, organoj de religiaj grupoj kiel **Katolika Espero**, kaj ankaŭ tuta serio da fakaj periodaĵoj kiel **Medicina Internacia Revuo** kaj **Filologo**. Tiuj "malgrandaj" revuoj kaj gazetoj kontrastas kun **Esperanto**, **Heroldo de Esperanto**, **Monato**, **Kontakto**, ks., kies abonantaro estas pli multenombra kaj pli internacia.

Kompreneble, la valoro de verko ne dependas de la speco de periodaĵo, en kiu ĝi aperas. Pro tute praktikaj kialoj — limigo de paĝnombro kaj malofteco de apero — Esperantaj revuoj ne povas publikigi ĉiun interesan kontribuon.

Restas, do, multaj artikoloj kaj beletraĵoj, kiujn aŭtoroj devas kolporti de unu redakcio al alia. Mi jam spertis, ke vere ne estas sufiĉe da periodaĵoj, al kiuj mi povas proponi materialon. La rezulto estas, ke pluraj verkoj ripozas en tirkesejoj kaj atendas publikigeblo.

Alia grava problemo prezentiĝas por esploristoj sur la tereno de Esperantostudoj; kiel ili eksciu pri tiuj verkoj kaŝitaj en ne vaste konataj revuoj aŭ gazetoj de lokaj organizaĵoj, por ke ili havu eblon mendi ekzempleron de la koncerna periodaĵo aŭ fotokopion de la artikolo? Evidenta manko estas regule aperantaj bibliografiaj informoj, kiuj povas faciligi la taskon de legantoj serĉantaj verkojn laŭ specifaj temoj. En **Heroldo de Esperanto** aperas de tempo al tempo rubriko titolita "Bibliografiaj Notoj", enhavanta du specojn de donitaĵoj: (1) interesaj artikoloj en la internacia lingvo (fakaj artikoloj originale verkitaj en Esperanto), kaj (2) interesaj artikoloj pri Esperanto. Ĉi-kaze la redakcio de **Heroldo** prijuĝas la verkojn por decidi, ĝis kiu grado ili estas signifplena aŭ "interesaj", sed ĉiokaze la listigo neniel estas kompleta.

Dum longa tempo mi revis pri valora speco de konsultlibro, kiu enhavus represaĵojn de la plej gravaj artikoloj publikigitaj ĉiujare en ĉiuj ekzistantaj Esperanto-periodaĵoj. Ne estus necese refoje komposti la materialon; per fotokopio de la originaloj, kaj aranĝado laŭ temoj, la artikol-kolekto povus esti

rapide kunmetita. Ankoraŭ unu fonto de kontribuoj estas prelegoj prezentitaj ĉe kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj similaj aranĝaĵoj. Multaj el ili estas publikigindaj, do la jara kompilaĵo povus inkludi ankaŭ tiajn verkojn en la formo de kopioj de tajpitaj manuskriptoj. Mia ideo ne estas tute nova, kaj mi scias pri du provoj parte realigi ĝin. Antaŭ kelkaj jaroj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio iniciatis kopi-servon por ebligi la mendon de fotokopioj de artikoloj, kiuj estis listigitaj kiel haveblaj. Oni povas mendi similajn kopiojn ankaŭ ĉe la libroservo de UEA, sed oni devas antaŭe scii la nomon de la artikolo, kaj la daton kaj periodaĵon, en kiu ĝi aperis. Ĉi-kaze ne temas pri libroforma eldonado de kopioj. Ĝuste tia verko estas **Akademijaj Studoj**, serio da jaraj volumoj komenciĝanta en 1983. La redaktoro kaj eldonisto, Rüdiger Eichholz, ne nur represas jam publikigitajn tekstojn sed ankaŭ kolektas originalan materialon. Tamen, **Akademijaj Studoj** ne ampleksas ĉiujn temojn; la ĝis nun eldonitaj volumoj emfazas nur esperantologiajn studaĵojn. Sed tiuj ĉi publikigaĵoj ja estas bona modelo por la jaraj artikol-kolektoj, pri kiuj mi revas. Ili povas esti dividitaj en plurajn partojn laŭ specifaj temoj: literaturo, movad-historio, recenzoj, sciencaj referaĵoj k.s.

Konklude, mi respondas la demandon en la titolo de tiu ĉi artikolo per "jes". La esperantistaro ĉiam bezonas ne nur pli da periodaĵoj sed precipe pli da altkvalitaj revuoj kaj gazetoj, por ke la homoj havu eblon libere komuniki siajn pensojn kaj ideojn. Kaj samtempe estas bezonata rimedo por pli vaste diskonigi la legindaĵojn.

LA THOMAS MANN-ARKIVO

Flanke de la universitato de Zuerich troviĝas patricia domo el la 17-a jarcento, en kiu vivis en la 18-a jarcento la literatura eminentulo J. J. Bodmer. En tiu domo oni povas trovi nun la Thomas Mann-Arkivon. Mi ne bezonas diri, kiu estis Thomas Mann, ĉar li ĝuas jam denost jardekoj internacian famon kiel romanaŭtoro kaj Nobelpremiito.

En la jaro 1956, unu jaron post lia morto, la familio Mann, precipe la edzino Katia, esprimis la deziron donaci la tutan libraron kaj ankaŭ meblojn al la svisa Federacio. Samtempe oni

opiniis, ke la fondota arkivo devus instaligi tre proksime al la universitato, por ke la literaturaj studentoj kaj profesoroj povu labori plej proksime de la fontoj de tiu verkaro. Pro tio estis elektita kiel akceptanto de la donaco la federacia teknika atletero de Zuerich kaj kiel ejo la nomita "Bodmerhaus".

Tiun arkivon administras nun tri personoj: Prof. Wysling estas konservatoro; S-ino Bernini funkcias kiel bibliotekistino; ŝi ankaŭ gvidas grupojn de vizitantoj tra la kvar ĉambroj kaj kunlaboras je eldonado de novaj broŝuroj koncerne Thomas Mann. Duontage laboras S-ino Hintermann en la sekretariejo.

Mi opinias tiun centran lokon de memoro kaj esplorado tiel signifa por la verkmaniero de Thomas Mann, ke mi decidis iom priskribi ĝin al vi. Sed antaŭe mi devas klarigi, kial la germana aŭtoro Thomas Mann, kiu naskiĝis 1875 en la nordgermana urbo Luebeck kaj vivis de 1893 ĝis 1933 en Munkeno, venis loĝi en Zuerich. Oni ne povas nomi lin fuĝinto; elmigranto estas pli ekzakta, ĉar li forlasis kun sia edzino Germanion en februaro 1933 por fari prelegvojaĝon en Nederlando, Belgio kaj Francio. Li intencis poste pasigi kelkajn semajnojn en Svislando. Tiu feria restado fariĝis kvinjara, dum kiu Svislando estis lia hejmo, ĉar li sentis sin ĉie hejme, kie oni parolis la germanan lingvon. Li antaŭvidis, ke li ne povos libere esprimi sin sub diktaturo, li ekde la komenco taksis la Hitler-reĝimon aro de krimuloj kaj admiris la racian spiriton de la svisa demokratio. Kiam la t.n. "paco" de Munkeno okazis en 1938, li antaŭvidis la mondmiliton kaj pro tio elmigris kun la tuta familio — li havis 6 infanojn — al Usono. Sed en 1952 li elektis Zuerich kiel loĝlokon. Li mortis 1955 okdekjara en Malanulejo de Zuerich.

La arkivo impresas la vizitanton kiel trezoro abunda kaj multflanka. Jam en la ŝtuparejo oni povas studi fotojn de la knabo kaj junulo Thomas kaj trovas jam la esprimon de skeptiko en la rigardo de la 5-jara knabo. Oni progresas al la vestiblo kun la mortmasko, dokumentoj de honorinoj kaj portreto de la oraavo, kiu estis Sviso. Sekvas la granda laborĉambro kun la mebloj, la skribotablo, kun amasoj da libroj, kun mem-

orajoj de vojaĝoj. De tiu granda salono kaj de apuda ĉambro oni ĝuas belegan elrigardon super la urbo. Je la dispono de studentoj estas alia agrabla ĉambro kun la ĝenerala katalogo, kun katalogo de la fonta literaturo, kun biografia katalogo, kompreneble kun tradukoj en multaj lingvoj. Plej menciinde estas, ke la arkivo posedas la manuskriptojn de ĉiuj verkoj aperintaj post 1933, do ekster Germanujo.

Tre interesa estas la kvara ĉambro kun longa vitrino, en kiu troviĝas tre valoraj eksponaĵoj, kelkaj el ili spegulas la plej maltrankvilan fazon en la vivo de tiu cetera burĝa animo. Kun bedaŭro oni ekscias de S-ino Bernini, ke la manuskripto de la unua granda verko, nome de la romano "Buddenbrooks", aperinta en 1901, estas ĝis hodiaŭ ne trovebla. Ĝi restis en Germanujo dum la milito kaj supezeble bruliĝis. Sed en la arkivo kuŝas folio malgranda, manskribita de la 24-jara aŭtoro, nome la unua malneto de la komenco de ĉi tiu romano, per kiu li tiel frue famiĝis. Tiun folion kaj aliajn valorajn dokumentojn savis la filino, la tiam jam konata kabaretistino Erika Mann, el la domo en Munkeno. Ŝi kuraĝe penetris en la tiam jam konfiskitan patran domon kaj kaŝe alportis la valorajn al Zuerich.

La aŭtoro kutimis kolekti fakturojn de hoteloj, en kiuj li estis loĝinta. La fakturo de dana banhotelo en Aalsgaard montras bildon, kies ekzaktan priskribon oni povas legi en la novelo "Tonio Kroeger". Sur la skribotablo en la granda ĉambro staras inter multaj vojaĝmemoraĵoj la foto de la du nepoj Fridolin kaj Antonio. . . Frido, eble sepjara, tre gracia kaj aminda knabo, pro tio la karulo de la avo, estas la modelo de Nepomuk Schneidewein en la romano "Doktoro Faustus", kiu mortas ankoraŭ infano pro meningito. Eksciantes tion oni sentas tremon. Tamen, ni ne rajtas kondamni pro tiu malgranda sento la nekutiman kreadmanieron de tiel eminenta aŭtoro. Certe estas, ke neniu, kiu okupiĝas pri la verkaro de Thomas Mann povas ignori la arkivon en Zuerich.

D-rino Heidi Baur en "Svisa Radio Internacia".

SIMPOZIO ESPERANTO CENTJARA

En la kadro de la Jubilea Jaro okazis grava scienca evento ĉe la Universitato de Vieno. La Laborkomitato "Esperanto

Cent jara", la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, la Lingvistika Instituto de la Viena Universitato kaj la Viena Lingva Societo organizis la internacian sciencon simpozion "Esperanto Centjara" en la Universitato de Vieno inter la 28-a kaj 30-a de oktobro, 1987.

Prelegis 22 sciencistoj kaj fakuloj el 9 landoj. La temoj estis multspecaj kaj respugulis la hodiaŭan staton de la sciencaj okupiĝoj kaj analizo de Esperanto. Alicja Sakaguchi (Frankfurt) prelegis "Pri la studobjektoj de interlingvistiko" kaj Otto Back (Vieno) prelegis pri "Divido kaj sciencoteoria situo de planlingvoj". Hermann Oelberg de la Universitato de Innsbruck prilumis la juĝon pri Esperanto flanke de la nuntempa lingvistiko. Heiner Eichner (Regensburg) faris analizon de la unua libro de Esperanto.

Helmar Frank (Paderborn) parolis pri la "Propedeŭtika valoro de Esperanto kaj Klaus Schubert (Utrecht) emfazis la gravan rolon de la Internacia Lingvo en aŭtomata traduka programo de nederlanda firmao. I'ona Koutny kaj Gabor Olszav (Budapest) paroligis komputilon en Esperanto. Parolis du literatursciencistoj (Nikola Rašić kaj Michel Duc Goninaz) kaj du verkistoj (Claude Piron el Genevo kaj Giorgio Silver el Milano).

Kulturaj eventoj de la dimensio kaj kvalito de la Simpozio "Esperanto Centjara" ludas eminentan rolon: Esperanto bezonas forumojn, kie povas renkontiĝi la intelektuloj por instiga interŝanĝo de spertoj kaj scioj.

LA PREZIDANTO DE LA POLA PARLAMENTO SKRIBIS AL GES-ROJ EINHIVICI

Post ilia reveno el Varsovio, resinioroj Einihovici sendis laŭdoplenan leteron al S-ro Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento. Per letero datita 7-an de oktobro, 1987 S-ro Malinowski respondis jene:

"Estimataj Gesinioroj, Dankon pro kortuŝa letero. Mi ĝojas, ke vi ĝuis la partoprenon en la Kongreso kaj la estadon en Pollando, Ankaŭ por mi la Kongreso estis impresiga travivaĵo. Mi

admiras la Esperanto-popolon pro ĝia entuziasmo, oferemo kaj praktika kontribuado al la monda paco kaj interkompreniĝo. Mi kredas, ke la Zamenhof-centro trovas fortan subtenon de la tutmonda Esperantistaro por akceli la realigon de la ideoj lanĉitaj fare de la Granda Bjalistokano.

Kun koraj salutoj kaj sinceraj bondziroj." (subskribo: Malinowski)

—ooOoo—

Letero al la Redakcio

I have read an opinion in 'A.E.' (June 1987) about the wearing of the Green Star. A contrary opinion exists, so needs expression.

The aim of Zamenhof was to bring understanding among peoples. His language was created for that purpose. It seems to me that the Star therefore symbolizes friendship more than language skill. I am supported in this view by people more knowledgeable than I. The "Interpolatojn" in "Teach Yourself Esperanto" (Cresswell & Hartley) says that you are an Esperantist after 5 lessons. I haven't bought a green star, but I have been given three. Does that say something? It seems to me that the wearer of a green star should be able to be termed "samideano", not necessarily an expert linguist.

—GEOFF CUTTER,
Bentleigh, Vic.

Vizito en la baŝkira ĉefurbo UFA

Nur tre malofte ni aŭdas ion en la okcidenta mondo pri agado de niaj samideanoj en la Sovet-Unio. Sed lastatempe D-ro Imre Ferenczy (Budapeŝto), kiu estas la prezidanto de la Universala Medicinista E-Asocio, akceptis inviton de la Baŝkiria klubo de medicinistoj-esperantistoj kaj vizitis la urbon UFA. Li priskribis sian vojaĝon en "Budapeŝta Informilo".

En la Ŝtata Medicina Instituto de UFA okazis scienca konferenco, kiun la vizitanto salute alparolis. Poste D-ro N. Ŝigajev parolis pri la laboro de la sovetaj medicinistoj kaj la konata rusa esperantisto Boris Kolker prelegis pri la agado de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE). Kadre de la konferenco okazis vizito al diversaj fakultatoj de la

medicina instituto. Krome aŭtobusa ekskurso ebligis konatiĝon kun la plej belaj partoj de la Baŝkiria ĉefurbo.

Du tagojn poste, en la Klubo de la Internacia Amikeco, la lokaj esperantistoj aranĝis amikan vesperon. Esperantistaj studentoj prezentis muzikaĵojn kaj poemojn. S-ano Kolker projekciis diapozitivajn pri la Budapeŝta UK en 1983.

Oni ellaboris kontrakton pri kunlaboro inter UMEA kaj la Baŝkiria Klubo de Medicinistoj-Esperantistoj. La kontrakto enhavas reciprokajn informadon, intersanĝon de eldonadoj kaj reciprokajn vizitojn.



• **PERTO:** La vojaĝanta ekspozicio de A.E.A., montranta la evoluon de Esperanto dum cent jaroj, estis prezentita en la bibliotekoj en Floreat, Manning kaj Nedlands, antaŭurboj de Perto. Poste ĝi alvenis al Mundaring, invitita de Debbie Forte. Ni multe dankas Len Eddington, kiu muntis kaj malmuntis ĝin en tiom da lokoj.

Ni bonvenigis hejmen John Mills post la longa grava malsano kaj deziras al li bonan kaj trankvilan resaniĝon. Ankaŭ ni bonvenigas hejmen Eric Hewitt el Sidnejo, dezirante al li finan resaniĝon.

Post la sukcesa Esperanto-kurso kaj la dediĉo de memoriga ŝildo al Wre Chandler ĉe la Birda Observatorio ĉe Eyre. Bill Graham pretigis alian ekskurson tien je Kristnasko por planti pli da herbo sur la aŭdmaraj sablaj dunoj. Li helpas stabiligi la dunojn, kiuj minacas kovri la malnovan historian konstruaĵon.

Esperanto-klasojn ni daŭrigas ĉe la Nedlands Kolegio ĉiun merkredon, por komencantoj, mezlernantoj kaj progresintoj. Aldone, ĉiun vendredon, kelkaj progresintoj renkontiĝas matene por babili kaj legi rakontojn el japana literaturo.

Antaŭ ol vojaĝi kun edzo Barry al Tajlando, nia ĉefa instruistino Vera

Payne gvidis rapid-kurson por komencantoj en sia hejmo.

La datrevenon de Zamenhof kaj la unuan jarcenton de Esperanto ni memorfestis per bankedo, kaj indiĝena arbo plantota en decembro.

La 20-an de novembro Bahaianoj gastigis Esperantistojn en la Bahai Centro por kune festi la Jubileon de la internacia lingvo. Bonega Festo!

—D. THRELFALL.

AEA — SOMERLERNEJO 1989

Ĉe la lasta Somerlernejo en Armidale en 1987, oni sugestis esplori la eblecon organizi Somerlernejojn en 1989 en alia loko de Aŭstralio.

Se vi povus proponi alian lokon, bonvole skribu al mi kaj indiku detalojn pri la speco de lernejo, prezoj k.t.p.

—MAX WEARING, 30 Westbury St., HACKNEY, S.A., 5069.

—ooOoo—

• **MELBURNO:** Je la 2-a de novembro S-ino Ali Leereveld montris diapozitivojn pri vizito al la grekaj insuloj Kithira kaj Kreto.

La Jarfina Festeto okazis en la Esperanto-Domo je la 7-a de decembro. S-ro Errol Chick prezentis video-filmon pri dumferia "lukto" de kvar aŭtomobiloj tra la Wonnangatta Valo dum pluvema vetero. Luksa manĝeto konkludis la vesperon kaj la kluban jaron.

La Esperanto-grupo en la "Adult Education Association" havis sian Jarfinfeston je la 1-a de decembro. Ĉeestis 14 personoj, inkluzive de vizitanto Gerhard Fuhl, esperantisto el Germanujo. S-ino Ruth Tumman preparis bonan distran programon. La vespero finiĝis per bonega festmanĝo.

• **KANBERO:** Pro peto de la Bahaianoj en Tumut, Ralph Harry kaj Marj Ellyard veturis al Tumut je la 6-a de novembro por paroli al la grupo kaj montri librojn. Unu instruisto intencas lerni tuj kaj poste instrui la grupon, kiu estas tre entuziasma.

Nia ĉi-jara komencanto, Tim Curnow, kiu jam sukcesis kun honoro en la elementa ekzameno, foriris por pasigi tutan jaron en Eŭropo, kie li intencas rilati kun Esperantistoj rondo.

—MARJ ELLYARD.

• **GUNNEDAH, NSK:** Nia klubo gajnis novan membron — Gloria Jarratt, kiu kantas en la Presbiteriana Horo en nia urbo. Prepare al la venontaj kongresoj en Brisbano, nia klubo jam lernis la kantan "Himno de la Junularo".

Nia loka konsilantaro invitis nin ĉeesti kunvenon por diskuti la uzadon de la nova art-centro, kiun oni nun konstruas. Ŝajnas ke ni povos partopreni en la uzado de tiu nova konstruaĵo en la venonta jaro, por niaj ĉiusemajnaj kunvenoj kaj por montri ekspozicion.

—BILL LEAH.

—ooOoo—

• **SIDNEJO:** La 28-an de septembro ni bonvenigis S-inon Hanna Messner, el Ĉeĥoslovakio. Ŝi interese priskribis sian belan landon per bildoj el diversaj broŝuroj. Ŝi rakontis, ke ĉiusemajnaj okazas tendaraj kunvenoj en bela parto de la lando.

Je 12-a de oktobro Brian Currie parolis pri "Mia plej satata aŭtoro". Lia plej satata aŭtoro estas Julio Baghy, de kies verkoj li legis kelkajn poemojn kaj prozajn verkojn.

Je 2-a de novembro Kitty Gassner rakontis pri siaj spertoj dum kaj post la Varsovia kongreso. Rene Asselin rakontis pri sia vizito al Nov-Zelando. Du semajnojn poste nia parolanto estis John Aboud, kiu parolis pri sia neebleco labori en Nov-Gvineo pro sanaj problemoj. Li reiros al Lae, kie li estas dentisto. Li estas Bahai-ano kaj intencas instrui Esperanton al siaj samreligianoj.

Je 23-a de novembro David Gould sugestis, ke ni subtenu lernantojn en Afriko. Tom Elliott sugestis, ke ni propagandu inter lernantoj de pli proksimaj landoj, kiel Nov-Gvineo kaj Indonezio.

—M. CHALDECOIT.

—ooOoo—

• **MANLY:** La 1-an de decembro, finiĝis la tria trimestro en la Vespera lernejo. Je la 6-a de decembro membroj kunvenis en la hejmo de Eunice Graham por Kristnaskfestoj. Margaret Robertson, kun la helpo de pluraj aliaj membroj, bonkore laboris por pretigi tre bongustan festan manĝaĵon kiun, pro la bela sunbrila vetero, ni povis ĝui en la ĝardeno.

Post la lunĉo Arthur Cocking gvidis entuziasman kantadon de kristnaskaj kantoj. Sekvis aferkunveno dum kiu la

"nedormantoj" diskutis aranĝojn por la venonta jaro. Ni tre sentis la ne-ĉeeston de Marjorie Duncan, kiu ankoraŭ malsanas en hospitalo.

—EUNICE GRAHAM.

—ooOoo—

• **BRISBANO:** La jarkunveno de 1987 okazis la 26-an de oktobro, kiam estraro por 1988 elektigis: Prez. Trevor Steele; Vic-prez-oj: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekr. Cath Sullivan; Kas. Jack Carroll; Libro-peranto: Lillian Newman; Biblioteko: Ruth Morrison Analisto: Ray Ross; Estraranoj: Jay Grant, Merv Schramm, Stan Stokes.

La prezidanto raportis pri sufiĉe kontentiga iaro, sed emfazis, ke la grava kongresjaro 1988 baldaŭ aperos kaj bezonos ĉian subtenadon. Kvin anoj, Gave Phillips, Kay Anderson, Alan Grant, Peggv kaj Ray Ross partoprenos en la 53-a Kongreso de Esperanto en Nov-Zelando, la 12-an ĝis la 16-a de januaro, 1988 en Auckland. Felician Kristnaskon al ĉiuj. —RAY ROSS.

EL LA FEDERACIOJ

N.S.K.: La Federacio havis sian jarkunvenon je la 18-a de oktobro. Oni elektis novan estraron: Prezidanto: Betty Cleminson; Sekretario: Brian Currie; Kasisto: Eve Matasin; Redaktoro: Margaret Chaldecott. Estraranoj: Rene Asselin, Eunice Graham, Volo Guelting, Roger Springer. La membrotizo por 1988 restos same kiel nun, nome \$5.

—ooOoo—

26-a AŬSTRALIA/4-a PACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

11-a-20-a de septembro, 1988,
Brisbano.

4-a Listo de Aliĝintoj:

28. Chris Dean, Perth
29. Gave Phillips, Brisbane
30. Cathy Schulze, Hillsborough, USA
31. Rita Dunbar, Sydney
32. Jeff Bell, Brisbane
33. Isabel Gale, Melbourne
34. Beatrice Clarke, Hove, England
35. Edna Giles, Bayview, NSW
36. Margaret Robertson, Sydney
37. Robbie Robertson, Sydney
38. Stan Stokes, Brisbane
39. Lilian Harrison, Brisbane

40. Connie White, Brisbane
41. Merv Schramm, Brisbane
42. Arthur Cocking, Manly
43. Ivy Fallu, Melbourne
44. Jack Fallu, Melbourne
45. Phil Thompson, Brisbane
46. Cath Sullivan, Brisbane
47. Ellen Lymbourn, Auckland, NZ
48. Irina Timonin, Manly

Statistiko: Kvinslando 20, N.S.K. 11, Viktorio 5, A.C.T. 2, Suda Aŭstralio 2, USA 2, Nov-Zelando 2, Okc. Aŭstralio 1, Ĉinio 1, Belgio 1, Britujo 1.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de
Cina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$15,
2 jaroj \$25, 3 jaroj \$35.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:
Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,
Parramatta, NSW, 2150.

JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita	\$6,874
Kay Howe, Rockhampton	120
Gerald & Ruth Tumman, Melb.	180
Anonima membro de Melburna E-Soc.	200
Kevin Riley, Sydney	10
H. W. Gilbert, Cairns	9
	<hr/>
	\$7,393

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1987

Antaŭe raportita	\$464
Sylvia Burkitt, Sydney	30
	<hr/>
	\$494

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

40. GAYE PHILLIPS

"SINJORINO MUZIKO"

The Esperanto Movement, like love, is a many splendoured thing. Gaye contributes to its splendour through music. She has a gift for verse and even before she knew the grammar of Esperanto was keen to translate poems and songs. Outstanding was her presentation of excerpts from "The Mikado" at the Sydney Congress in 1980. Gaye does not aspire to office (though she will be in charge of Entertainment at the Brisbane Congress). Her "job and joy" is to brighten up our gatherings through singing — often of well known songs, but with that subtle "Phillips touch" which makes them different. To that end, she has recruited, organised and enthused local talent so, no matter what the occasion, she can be relied on for a polished presentation of "singing with a smile". With the help of Kay Anderson, she has gone beyond the "grandmother's day" songs we use in community singing and has "hepped up" some comparatively modern pieces. She and Kay compiled a collection of Australian songs "Australio Kantas Sian Historion" and a "kantlibro" for the 1988 Pan Pacific Congress in Brisbane. Gaye is also happy to take part in sketches and plays, and was a devilishly attractive imp some years ago in Trevor Steele's brilliant play about Hell.

The young Gaye was a rebel. Before she was 12 she had run away from home twice — to seek fame and fortune on the stage. When an angry police inspector threatened the reformatory, and an equally angry but relieved mother the wrath of God should such wickedness ever recur, Gaye decided that in the future it would be safer to restrict her ambitions to the "Walter Mitty" stage, so in succeeding years became — in her own imagination — a world famous author, singer and dancer.

The future of a girl growing up in the depression was dictated by economic pressures and, in Gaye's case, by what she regarded as the prudish Victorian thinking of her parents. She felt constrained to seek employment after 2

years at High School to help meet household costs, and to marry — not so young as to cast doubt on her virtue, but not so old as to risk being "left on the shelf".

During the war she was refused permission to join one of the women's services because "only bad girls wear uniforms", but was allowed to join the Land Army, away from the temptations of the Big City teeming with soldiers and sailors. However, there were many army camps in the country and hundreds of Italian prisoners of war working on the farms. So, with weekly dances and a clandestine meeting of two with the enemy, the life of a Land Girl differed little from that of her city sister — except that she worked harder.

The stay in the Land Army was short. (Surprise! Gaye became homesick!) Back to Brisbane and into the Public Service. Right after the War, good legs (not talent, Gaye modestly asserts) got her into the chorus line of an amateur concert party which entertained returned servicemen. (Mum thought she was in a singing act.)

From time to time our rebel deliberately did things that would shock her parents — but didn't tell them about it till afterwards. For a while she was a barmaid and was in tears for days as she struggled to "put the froth at the bottom of the glass, luv". Another time she hitch-hiked to Sydney (unheard of for a girl about that time), lived in a slum, worked in a factory and was recalled home in disgrace when her suspicious mother got a relative to "check up" on her.

Yet Gaye settled down. In 1949 she married and devoted the next 32 years to the raising of her 4 successful and happy daughters. She now lives with the youngest in an old, time-consuming weatherboard home in Brisbane — content to walk no longer "on the wild side", and happy to contribute to the Esperanto cause through another universal language — song.

—ARTHUR COCKING

CONTENTS

- A history of Esperanto • (Trevor Steele)..... 1
- The role of Esperanto in education • Vera Payne.. 6
- The Academy of Esperanto • Donald Broadribb... 10
- Which international language:
English or Esperanto? • Alan Towsey..... 13
- Esperanto after 100 years • Ralph Harry..... 15

A HISTORY OF ESPERANTO

by Trevor Steele

